

Bô Yin Râ

PLI DA LUMO

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG
BERN

Refoje reviziita,
parte modifita, aŭtentika
fina eldono

El la Germana originalo
(„Mehr Licht“, eldono de 1938)
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

Tiu ĉi libro originis el kolekto da traktaĵoj, antaŭe jam *un-uo*pe publikigitaj, kiu estis aperinta en unua kunligita formo jam en 1921. Kelkaj definitivaj modifoj, pliprecizigantaj la koncernan sencon, ebligis per la represado.

Intertempe mi *finis* mian spiritan verkaron per la lasta libro „Hortus conclusus“, kies titolon mi donis *ankaŭ al la tuto* kiel simbolan nomon. Sed tio, kion mi postlasas en la tridek du instruaj partoj, organe unuigitaj, de tiu ĉi tuto, – kaj sekve ankaŭ tiu ĉi libro, – estus traktata en tre neadekvata maniero, se oni volus rigardi ĝin sole kiel „verkista produktaĵo“. Kvan- kam la tuta verkaro ne ekzistus, se mi ne estus kreinta *ĝian lingvan formon*, tamen *ĝia enhavo* estas *identita* kun mi mem: – kun *mia nepereema esto*, el kiu mi vivas, – kaj ne estas nur la *rezulto de tereca impulso al formado*. Ĝis hodiaŭ, inter ĉiuj popoloj de la tero malpli ol dek teraj homoj estis en tempa ekzisto, kiuj kapablis *estigi* la lingvan identecon de sia eterna esto kun tera sentado. Kiu tion fari *kapablis*, tiu ĉiutempe povis diri kun plena pravenco: „La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos.“ – Ankaŭ tio trovebla en la „antaŭ-“ kaj „postparoloj“ de miaj instruaj tekstoj pleje apartenas al tiuj „vortoj“ kaj ne estu apartigata disde tio, al kio ĝi antaŭas aŭ sekvas.

Kiel gemoj, kiuj jam de longe ŝajnis havi sian definitivan formon, kelkfoje estas nove tajlataj, por ke ili povu elradii pli da lumo, tiel same la enhavo de tiu ĉi libro estis denove „tajl-ata“, kaj neniue, kiu konis la iaman formon, hodiaŭ povos dubi, ke la nova tajlado donis al la kristala materialo la plial- tigitan validecon vere adekvatan al ĝi. Mi povas rigardi tiun ĉi libron *nur en la formo nun donita al ĝi* kiel validan parton

de mia nun finita instrua verkaro. Tio aplikiĝas precipe al la ĉapitroj kiuj, pro ĉiuflanka pliklarigo, devis ricevi novajn titolojn.

Multaj el miaj vortoj estis kontraŭvole jungitaj al neadekvataj vehikloj, tiel ke mi devis protekti ilin kontraŭ ĉiu misa kaj erara uzado, kvankam tia protekto certe devus esti nenecesa, ĉar mi neniam lasis ekesti iun dubon, ke mi ne servas *ian homan institucion* kaj spirite ne dependas de iu homa ideologio. En ĉiu el la tridek du partoj de mia spirita instrua verkaro temas pri tio, ke mi *formas al mi mem lingvan korpon*, per kiu mi povu fariĝi *enprenebla* por aliuloj. Eĉ se mia spirita vivo fariĝas, en la fluo de estontaj jarcentoj, spiritamane la propraĵo de sennombraj homoj, ĝi tamen apartenos *nedividite* al ĉiu unuopulo: – substance kunfandiĝinte al lia *propra* eterna spirita substanco.

Enkonduko

Estas tempoj en la homara historio, en kiuj la homo de la tero sentas sin tute forlasita de sia spirita prahejmlando, aŭ ne plu kapabla eĉ nur suspektante kredi je tiu prahejmlando.

Sed estas aliaj tempoj, en kiuj multaj serĉantoj el la tuta homaro ree turnas sin al tio *spirita*, malklare sentante, ke ankaŭ *la homo sur tiu ĉi tero povus* akiri la heredaĵon de la spirito, sed ne plu estas *konscia pri la vojo*, kiu kondukas al la esenca spirito. Oni do serĉas kaj palpadas en mallumo, – ja *penante* trovi tiun ĉi vojon, sed ankaŭ blinde fidante ĉiun malĝustan vojon, se ĝi aspektas sufiĉe stranga kaj mistera.

„*Pli da lumo*“ estu nun alportata en la konfuzantan tenebron, ĉar dum tiaj tempoj sennombraj homoj senplane erarvagis en la labirintoj de spekulativado, aŭ sekvas laŭsupoze spiritajn „gvidantojn“, kiuj delogas siajn anojn nur al si mem kaj al sia propra malsaĝo.

Ni staras meze de tia tempo de serĉado de la spirito, kvankam samtempe la bruska *animala homo* ĉie celebras banalajn triumfojn.

Estus senrespondece, se oni dirus, ke nur „avido je sensacio“, vanta scivolemo kaj orgojla dezirego pri plivastigo de ilia scio gvidas ĉiujn serĉantojn, kiuj spite de ĉia kontraŭfluo hodiaŭ strebas al la lumo de la spirito.

Estus malsaĝe, malestimi tiujn serĉantojn, kiuj esperas trovi en la formoj de *malnovaj religioj* la ruĝan fadenon, kiu

povus elkonduki ilin el la mallumaj ĉenoj de filozofia spekulativado, al vera ekkonado.

Ekzistas *multaj* ebloj eskapi el la mallumo, kaj kiu *kapablas* eskapi el ĝi, tiu ne demandu, ĉu ekzistas „ankoraŭ aliaj“ vojoj por atingi la liberan elirejon, se lia propra vojo vere kondukis lin al la lumo.

Sed inter la serĉantoj de la nuna tempo jam ekzistas tro multaj, kiuj estas *lacaĵ* de la serĉado, ĉar *ĉiu* vojo prenita de ili montriĝis *malĝusta*, kaj ĉar ĉiu laŭdire spirita „gvidanto“ fine montris sin same *senscia* kaj *sensperta pri la vojo*, kiel la aro gvidita de li.

Precipe por tiuj ĉi multaj inter la serĉantoj mi skribas, kiel unu, kiu parolas nur pri aferoj, kiujn li *konas* tiom, kiom ili nur rare *povas* fariĝi konataj al tera homo. Sed la alia speco de serĉantoj, kiu laŭ sia *opinio* jam *trovis*, tie ĉi ricevos *provilon*, kiu *sentrompe* apartigas ion aŭtentikan de io trompa.

La traktaĵoj en tiu ĉi libro estiĝis aparte kaj povas esti legataj aparte.

Ili estis verkataj por doni al multaj demandantoj komunan respondon, ĉar miaj tempo kaj forto jam tiutempe ne estus sufiĉintaj por pritrakti ĉiun personan demandon en aparta respondo. La temoj rezultis el la demandoj. Tial estis menciendaj kelkaj aferoj, kiujn mi sen vere bazita demando certe ne estus rigardinta kiel inda je priparolado. Ankaŭ la neeviteblaj ripetoj estas pravigitaj de la specoj de demandoj.

Tamen ĉiuj ĉapitroj de tiu ĉi libro nature estas plej intime interligitaj en spirita rilato, kaj en sia tuto formas bazon, sur kiu ĉiu unuopulo povas *sekure* plukonstrui laŭ *sia* maniero, *ĉiam starante sur firmaj fundamentoj*.

Do probable ekzistas neniu leganto, kiu ne tiros plej riĉan profiton el tiu ĉi libro, – al kiu ĝi ne vere povos alporti „*pli da lumo*“. Sed leganto dezireganta ekkonon devos atingi klarecon pri tio, ke *vera* ekkono de la sekretoj de la spirita, nedetruenda vivo ne povas esti akirata per *nova religia aŭ filozofia instrusistemo*. Tial la serĉanto apenaŭ renkontos en miaj skriboj tiel nomatan „teoremon“, kiu sisteme aliĝus al alia. Anstataŭe, mi montras al la serĉanto tion spiritan, al kio li strebas, el la plej diversaj vidpunktoj en ree kaj ree novaj bildoj, fidante lian sentadon kaj alvokante lian propran juĝon, por ke li *mem* havigu al si el tiu vasta diverseco la internan certecon, kiun *nur* ĉiu animo *mem* kapablas *doni* al si. Estas tute malgrava al mi la konsento de la intelekto, kiun miaj vortoj eble renkontas en la leganto. Mi volas nur helpi al li atingi la internan staton, en kiu sola povas malkaŝiĝi al li tio, kion la mallumo ĉirkaŭ li kaŝas al lia animo.

Estus *tute malĝuste*, pene eltrovi en mia verkaro „teoremojn“, do: asertojn definitive formulitajn kaj sole en tiu formo validajn. La instruon, alportitan de mi en tiun ĉi tempon, oni atingos nur tiam, se oni lasas ĉiun unuopan instruan tekston efiki sur la propran animon, provante senti en ĉiu el ili unue nur *mian eternan spiritan eston*. Kiam oni fine sentis tiun mian eternan, veran „eston“, oni el ĝi ricevos en si mem ĉiun „respondon“, kiun oni deziras, kaj samtempe la certecon de ĝia nerenversebla vereco *kiel atesto de eterna realo*.

Ankaŭ estas eraro kredi, ke oni povus *en persona interparolo* kun mi eble ricevi pli da informo, ol troviĝas en la instruskriboj formitaj de mi. Kiu parolas kun mi, tiu staras vidalvide de *mia korpa paseema aperaĵo*, – *ne de mi mem*, por kiu mankas al li ĉiuj organoj de percepto. Mi ja povas respondi al li pere de la cerbo disponigita al mi dum mia surtera

vivo, sed estas tute neeble krei al mi en lia ĉeesto la lingvan formon, en kiu mi povas substance eniri en lin. – Por tio estas necesaj *soleco* kaj *absoluta izolado disde vibroj de aliulaj cerboj*: – neimageble intensa koncentriĝo.

AL TIUJ, KIUJ LACIĜIS DE DORMADO

Preludo

Okazas signoj kaj mirakloj en nia tempo, kaj la spirito rapidas kiel ventego super la teron, sed la homoj de tiu ĉi tero kuŝas en profunda dormo kaj estas eĉ ne skue vekeblaj.

En siaj *sonĝoj* ili serĉas la *miraklon*, kaj dume preterdormas la *realon* de la miraklo.

Sed eĉ en siaj sonĝoj ili serĉas nur la signon de la *mallumo* kaj suferus teruron kaj timon, se la signo de la lumo povus atingi ilin en sonĝado.

Tiel iuj sonĝe lalaas pri *apogado* de la *kredo*, kariĝinta al ili, per sia *scienco*, dum la aliaj opinias ĉiun kredon *superita* per ilia scio.

Sed neniu suspektas, ke maldorma *realo*, netuŝita de lia sonĝado, bezonas nek pensan *scion* nek *kredadon* en la senco de „akcepti kiel veraĵon“, por estigi miraklojn kaj signojn.

Neniu suspektas, ke mirakloj kaj signoj *ĉirkaŭas lin*, dum li, serĉante en sonĝo, maltrankvile kaj sovaĝe ruliĝas en dormo.

Se ne ĉiutempe estus estintaj almenaŭ kelkaj *malmultaj*, kiuj perforte eltiris sin el sia dormo, tiam ankaŭ al la aliaj neniam *vekigo* estus eble, kaj en siaj sonĝoj ili devus malaperi el la kosma konscio kiel sonĝo.

Sed princoj de la lumo trovis almenaŭ *kelkajn* maldormajn okulojn kaj orelojn, al kiuj ili povis interpreti la *signojn*

de la lumo, kaj konigi la *vorton* de la lumo, kaj tiuj malmultaj vekigintoj estas la *solaj*, kiuj ankaŭ hodiaŭ, en tiu ĉi tago, povas skue veki vin el la dormo, se vi vekigi volas, kaj via dormo ne jam estas la plumba envolvaĵo de la morto.

Kiu legas tiujn ĉi vortojn, eĉ se li troviĝas en profunda *songo*, tiu serĉu en si *rememoron* en siaj plej profundaj ŝaktoj! Eble tie, en malklara krepuska lumo, ankoraŭ troviĝas juvelo, kiu, kiel kara trovaĵo, montras al li kvazaŭ de fore la riĉan trezoron, kiun ankaŭ *li* iam posedis.

Sed kiu estas tiom ligita en dormo, ke li ne plu povas trovi en si tiun lastan *brileton* de rememoro pri sia *maldorma* antaŭa esto, tiu *ne* legu tiujn ĉi vortojn, ĉar, senpovaj eltiri lin hodiaŭ el lia dormo, ili povus nur perturbi liajn plej karajn, longe kutimajn *songojn*, kiuj ĝojigas lin ĝis nedezirita tago, en kiu li devas ekkoni, ke ĉio antaŭe tiom „konkreta“ estis nur *songo* kaj *eraro*.

Se mi donu al vi pli ol *vortojn senenhavajn*, tiam mi devas meti finon al kelkaj arde amataj *songoj*.

Se mi vere malligu vin el *dormo*, tiam mia parolo ne devas timi la uzon de malmolaj vortoj.

Se mi veku vin hodiaŭ por via *tago*, tiam mi devas eviti ĉiujn vortojn senfortajn, lacajn, dorme pezajn de viaj *songitaj* savantoj.

Ankaŭ mi iam estis, – kvankam nur de *ekstere*, – *songanta* disĉiplo de tiuj *songitaj* savantoj, antaŭ ol oni skue vekis min kaj mi tiam ekkonis, ke nur unu *sola* „savanto“ estas naskita al ni ekde pratempo, kiu neniam povas esti eĉ nur suspektata el la dolĉa mucida aero de la *songo*.

Certe venis al vi voĉoj de vokantoj en viajn dezertojn, certe la *unu sola savanto* de la maldorma *realo* estis en ĉiuj tempoj naskata de „virgulino“, sen genero, sed la muĝanta tono de la konka korno, kiu vokis al li ĉiujn, kiuj estis fariĝontaj majstroj de fortaj artoj, estis por vi multe tro raŭka kaj sovaĝa, kaj perturbis la ludon de viaj songoj.

Tiel vi transformis la pratempajn sonojn, kiujn lia spiro nove kaj nove eligis, en mildan, dolĉe delogantan paŝtisto-melodion, por ke ĝi agrable lulu vin en novajn revojn.

Malantaŭ ĉiu, kiun vi nomas „savanto“, staris unu, kiu *vere estis* tio, ĉar ĉiu, kiun vi tiel nomis, vere portis en si tiun *unu eternan* savanton en si kaj, vekiĝinte el dormo kaj songo, estis atinginta en si la manifestiĝon de „*la Filo de Homo*“. Sed viaj fantastaj *bildoj* de tiuj granduloj, kiujn vi nun honoras kaj laŭdas en viaj revoj, estas *faritaĵoj de viaj songoj*: – nerealaj ombroj. –

Ĉu vi nomas vin *kredantoj* aŭ *neantoj* de Dio: – ĉiuokaze vi parolas pri „dio“, kiun vi mem *songas*, – kiun vi *ne plu* volas sonĝi.

Vi praktikas la plej ridindan idolservon kaj songas, ke vi „*konas*“ kaj „*honoras*“ la „unu“ veran Dion. – Vi *neas* la ekziston de via dio, kaj kreas al vi *novajn* diojn, kiuj *ne malpli* estas formitaĵoj de viaj *songoj*. – *Ne unu* el vi suspektas en sia songa duonsveno, ke ĉia kverelo, kiun vi faras pri dio kaj ne-dio, kontraŭmetas nur nerealan nenion al nereala nenio.

Sed same kiel malantaŭ viaj songitaj savantoj staras *reala* „savanto“, tiel ankaŭ via *pridia* *songo* estas kondicita de *realo*, kiu ignoras la mezuron de viaj songoj.

Ankaŭ mi, kiu hodiaŭ maldorme parolas al vi, iam kuŝis en viaj pridiaj sonĝoj, *kredis* je via „dio“ kaj *neis* lian ekziston, ĝis mi – vekigante en tio mia eterna – vidis, ke neniam ia sonĝo, egale al la nekonscia sonĝo de la tera homo, povas ampleksi la grandecon de la *vivanta Dio*.

Per tondraj paroloj mi dezirus veki vin el la *dormo*, por konduki vin al la sensona kvieto de la eterne maldorma vivo de la *realo*, en kiu *sola* la „vivanta Dio“ povas esti naskata en vi!

En ĉiu el vi li devas povi *naski sin mem* en la tera konscio, por ke li estu spertebla al vi! –

Nek *en* la kosmo nek *ekster* la kosmo li povas esti trovata de vi por vi, antaŭ ol li naskiĝis en *vi* – kaj *sole en vi* reale por *vi*!

Vi blasfemas *vian vivantan Dion*, indifere, ĉu vi *kredas* je la „dio“ de viaj sonĝoj, aŭ ĉu vi sonĝe *neas* lian ekziston!

Vi blasfemas la eternan eston, *tion solan realan*, kio en vi volas formi sin en *vian vivantan Dion* kaj *kies formo* vi estas, dum en via sonĝo vi rigardas vin kiel „la kreitaĵon de liaj manoj“!

Kvazaŭ birdoj pelitaj de la vento, viaj imagoj pri „dio“ atingis sferon fore *trans* ĉia maldorma *realeco*. Songante vi inventis fikcion de „dio“, kiu estas nur *intelekta fetiĉo*. – La sovaĝulo kreas al si „dion“ el arba bloko, kiun li formas per tranĉilo, ĝis ĝi parolas al lia animo. Sed vi kreis al vi *vian „dion“ en pensado el pensoj!* – Laŭ via opinio li „devas“ esti tia, kia vi volas ke li estu, kaj se vi, eĉ songante, malkovras, ke *neniam io reala* parolas el via idolo, vi tamen ne rezignas

la imagon, ke „dio“ *povus* ekzisti nur *tia*, kia *vi mem* formis lin, – se li *fakte* ekzistus.

Vi ne scias, ke la vivanta *spirito*, se ĝi estu „*Dio*“ de la tera homo, *bezonas* la homon elirintan el li, por formi sin „laŭ lia bildo“. La *neformitan maron de la spirito* vi volas kapti, kaj dum vi kredas, ke vi tenas ĝin, ĝi elglitas el viaj manoj!

Iam unu diris al vi: „*La Spirito* esploras ĉion, eĉ la *profundaĵojn* de *Dio!*“ – Sed vi aŭdacas en viaj sonĝoj, esplori ankaŭ la *spiriton*, donas al ĝi dezirindajn atributojn, kaj nomas ĝin, – ĝojante pro via saĝo, sed ĉe ĉiom de via laŭsupoza respekto estante senrespektaj – via „*dio*“!

Tiuj, kiuj neas lin, *tamen* restas ligitaj al sia iluzio, ĉar ilia *neado* estas iluzio, same kiel la sonĝa *kredo* de la aliaj. Pensoj *kreas* la idolon, kaj pensoj *detruas* la pensaton, sen tuŝi la *realon* eĉ nur de fore.

Vere, *realo* estas la kaŭzo de tiu iluziado de la sonĝantoj, sed ĝi *ne estus* realo, se *sonĝa iluzio* iam povus pripalpi ĝin.

Nealirebla kiel la fulmo, kiu transsaltas de nubo al nubo, blindiga kiel la suno en tagmezo kaj tuj ree vualita de nokto, tiu realo estas *eterne vivanta*, kaj *estiganta sin mem* en siaj vastegaj potenco kaj grandeco.

Sed ĝi estas senfine fora de via imago pri la „*spirito*“, – senfine fora de ĉia imago pri „*dio*“, kiu sur tiu ĉi terglobo kreis „*religiojn*“.

Kaj tamen: – se iam „*dio*“ elaŭdas kredanton, indifere ĉu tiu kredanto vokas al Brahmao, Alaho, „*Patro*“, „*Sinjoro*“ kaj „*Savanto*“, Kristo aŭ Budho, estas sole *tiu realo*, kiu havigas al li elaŭdon. –

Nur al veraj *vekiĝintoj* ĝi *malkaŝiĝas*.

Nur al tiuj, kiuj *por ĉiam* forlasis la dormon kaj ĝiajn songojn, ĝi *rekonigas* sin.

Nur tiu, kiu vekiginte povas *percepti per maldormaj sensoj* sian Dion, rajtas esperi, ke Li parolas en li mem *la vorton de vivo*.

Dum vi ankoraŭ kredas, ke vi povas renkonti la Diecon en viaj *songoj*, vi devas toleri, ke viaj memkreitaj idoloj vin mistifikas kaj vi fariĝas ilia ludilo.

Ne kredu, ke tiuj idoloj estas *senpotencaj*, kiel vi mem ŝajnas al vi.

Vi *mem* donis al ili potencon, kaj vi mem tion ne scias.

Vi ankoraŭ ne suspektas, ke vi *povas* doni potencon, kaj ke konsistas *via* potenco ĝuste en tio, ke vi povas *estri* potencojn, kiuj estas *multe pli grandaj* ol vi mem ...

Tiel vi elpensis al vi idolojn, kaj pensante donis al ili potencon per via *kredo*!

Vi *mokas* pri kredo aŭ volas apogi ĝin per *scienco*, sed vi ankoraŭ ne scias, ke via kredo estas *pli* ol tio, *kion* vi kredas!

Kredo estas via *plej alta forto*, ĉar per *kredo* vi povas *servigi* al vi potencojn, kiuj efikas per praa forto tie, kie ili senkateniĝas *per via kredo*.

Per la kredo vi povas devigi tiujn ĉi potencojn *servi* al vi, kaj vi povas devigi ilin *turmenti* kaj eĉ *perei*gi vin!

Per tio, kion vi *kredas* pri viaj idoloj de vi mem elpensitaj, vi donis al ili abundan *potencon*, – kaj vere, tiu ĉi potenco ne fariĝis *beno* por vi, ĉar per via kredo vi *mem* faras viajn idolojn viaj karcerestroj!

En nia tempo oni ofte diris al vi, ke pensoj estas „aĵoj“, „realaj“ kiel la palpebla „realeco“ de la aĵoj de tiu ĉi tero, sed mi diras al vi, ke viaj pensoj estas vere *pli* ol la „aĵoj“ de tiu

ĉi tero, – estas fortoj: *unucelaj konsciaj fortoj*, kompareblaj kun *nenio* sur tiu ĉi tero, plenaj de avida *vivovolo*, al kiu vi kreas nutraĵon per via pensado!

El tiaj fortoj vi formis viajn idolojn, kaj per via kredo vi donis al ili la potencon fari al vi bonon aŭ malbonon laŭ sia volo.

Vi diras: „Kiun la *Eternulo* amas, tiun li *punkorektas*,“ – kaj via „dio“, – *kreita de vi el unucelaj konscioenergioj*, – estas *devigata* de vi mem turmenti vin, ju pli arde vi amas la imagan bildon, kiu formis lin...

Sed vi ne povas tuje neniigi la dion de viaj sonĝoj, kiun miliardoj kreis ekde fora pratempo, eĉ se vi fiere proklamas: „Dio estas morta!“

Li ree kaj ree montros al vi, ke li ankoraŭ estas viva, nu-trante sin per sennombraj homoj, kiuj denove lin *elpensas*, kaj restas en sia potenco, kiun ĉiutage nova *kredo* donas al li.

Li mokas pri via sonĝa superhoma paradado kaj trankvile lasas vin voki: „Dio estas morta!“ – dum lia vivo estas *seku-ra por jarmiloj*, surbaze de kredo jarmile repetita.

Ne pli frue vi eskapos lian potencon, ol ĝis aperas al vi la tago, kiu eltiras vin el dormo kaj sonĝo.

Sed ankoraŭ vi estas sklavoj de la sonĝo!

Ankoraŭ vi amas la sonĝon, kiu kaŝas al vi la tagon, kaj vi opinias ĝin maldorma vivo.

Vi apenaŭ suspektas, ke eĉ la sonĝoj de viaj teraj noktoj estas *pli proksimaj* al la reale maldorma vivo, ol tio, kion vi nomas la realo de la luma tago ...

Vi ankoraŭ tro *amas* la malvastecon de viaj sonĝoj, same kiel la birdo, kiu eloviĝis en kaĝo, ne fuĝas, eĉ se la pordo de lia karcero estas malfermita.

La birdo sentas sin *hejme* en ĝi, ĉar ĝi konas kaj *amas* nur la metalfadenojn de sia kaĝo, kiuj rabas al li la liberecon, kaj vi same sentas vin *hejme* nur en via *scio* pri la aferoj, pri kiuj vi kredas, ke vi scias ilin bone.

Estas *terure* al vi fuĝi el la karcermuroj de tiu ĉi *scio* en la liberan, maldorman mondon de la *realo*, kiu estas *transe* de ĉia *scio*, – kiun spertas nur tiu, kiu fariĝas *reala* en ĝi, kaj do venas al si mem, liberigita de ĉiu turmento de la *volo scii*.

Sed kiam vere parolas al vi iu, kiu *kapablas* paroli pri tiu mondo de *realo*, kiu ĉirkaŭas lin, kvankam li mem ankoraŭ konas ankaŭ la regnon de sonĝo, en kiu vivas, – vi tuj estas pretaj superŝuti lin per mil demandoj, kies respondoj plimultigu vian *scion*, sed nur malofte iu el vi volas fordonaci ĉiom de sia *scio* al siaj *sonĝoj*, kaj fariĝi *reala* en la mondo de *realo*, eble jam suspektata de li ...

Sed tie ĉi kuŝas kaŝita en profunda ŝakto la ŝlosilo, gardita de la „patrinoj“ ekde antaŭ eterneco!

Kiu ne malsupreniras al ili, tiu ne ricevos ĝin.

Kiu ne lasas sian sonĝan scion al sia *sonĝo* kaj, kuraĝe rezignante sin mem, volas turni sin al *tio nesciata*, al tio *neniam* subigita al lia *scio*, tiu povos, erare supozante sin *sci-anta* en siaj sonĝoj, eterne *serĉi* sen iam trovi tion, kion li serĉas.

Li tro *amas* sian sonĝon, ol ke iam povus kreski en li potenco *volo* al vekigo.

Estas via *volo scii*, kiu baras al vi la vojon al *ekkonado*. – Estas via *volo scii*, kiu ne lasas vin *vekigi*.

Estas via *volo scii*, kiu faras vin sklavoj de viaj idoloj, kiun ajn nomon vi donas al ili.

Sed dum vi estas subigitaj al *idolo* kreita de vi mem *el „pensaj impulsoj“*, eĉ se vi kutimas nomi ĝin „la unu, vera dio“, neniam la vivanta spirito povos naski sin mem en vi kiel vian „*vivantan Dion*“.

Antaŭ ol la „vivanta Dio“ estas naskita en vi, vi necese devas esti „sendia idolservanto de via sonĝa mondo“.

Antaŭ ol la „vivanta Dio“ estas naskita en vi, vi estas vivante morta kaj ne suspektas eĉ en viaj plej aŭdacaj sonĝoj, kio via *vivo vere estas*, – via vivo, kiun vi, sonĝante, opinias koni jam de longe.

Antaŭ ol la „vivanta Dio“ estas naskita en vi, la „scio“ de via *sonĝa mondo* devas konduki vin je la nazo, kaj ĉio, kio ŝajnas al vi *pli vera* ol tio antaŭe pensita, estas nur *nova eraro, nova sonĝo*, – valida nur por via sonĝa mondo ene de *ĝiaj* sferoj.

Nur via *volo vekigi* povas tiri vin el viaj sonĝoj, kaj helpi al tiuj jam vekigintaj liberigi vin el via dormo.

Nur en *vekiĝintaj* animoj la „vivanta Dio“ povas naski sin mem el „spirito kaj akvo“. (Ne estas postulate de vi „scii“, kion tiu vorto signifas. Sed se vi volas *sperti* ĝin, vi devos *antaŭe vekigi*.)

Vi ankoraŭ nur *ŝatus* vekigi, sed vi *volas* ankoraŭ *plue* sonĝi viajn sonĝojn.

Ankoraŭ ligas vin la sonĝa mondo, kiu ĉirkaŭis vin ekde via juneco.

La sonĝoj de *aliuloj* ankoraŭ tro katenas vin, kaj vi ne kuraĝas ekiri viajn proprajn vojojn, ĉar timigas vin la *soleco*, tra

kiu vi devas senlace migradi, se vi volas iam atingi la novajn kunulojn de la mondo de *realo*.

Sed vi devos superi ĉiujn ĉi malhelpojn, se vi volas iam atingi la klarecon de la maldorma tago.

Mi konsilas al vi: estigu en vi ankoraŭ *hodiaŭ*, dum vi legas tiujn ĉi vortojn, *la firman volon* ne plu doni vin al la komuna dormo de viaj dorm- kaj songĉkunuloj!

Mi konsilas al vi: estigu en vi ankoraŭ *hodiaŭ* la firman volon uzi ĉian energion por *ekkoni*, en la lumo de mia instruo, viajn songĉojn kiel tiajn!

Mi konsilas al vi: trankvile lasu vian tutan ĝisnunan „*sci-on*“ al la *songĉa mondo*, kiu ĝin donis al vi, trankvile plue uzu ĝin, kiom vi plue restas en ligiteco kun songĉantoj, sed ne plu atendu de *ĝi* la solvon de la finaj demandoj, kiuj movas la homan koron!

Kaj mi ankaŭ konsilas al vi: malfidu ĉiun amaskredon, kiu kontentigas sin per piaj formuloj kaj ofte atingis vin en via songĉa mondo, – aparte se ĝi volas gajni vin per *timigo!* Ankoraŭ pli malfidu tiujn, kiuj volas unuigi ĉiujn erarajn kredojn de la songĉantoj en nova erara kredo, kiu ĉion ĉi intermiksas!

Malfidu tiujn, kiuj kaŝe kovras la malnovan kredon de siaj songĉoj per nova laŭdira „*scienco*“!

Penu liberigi vin de ĉiu imago, kiun *aliaj* songĉantoj alportis al viaj songĉoj kiel respondon al via demando pri finaj aferoj!

En ĉiu erara kredo troviĝas grajneto da *vero*, same kiel la songĉoj de viaj teraj noktoj ofte estas ekigataj de ekstera okazaĵo aŭ korpa stato, sed ĝuste *pro* tiu malgranda vualita vero ĉiu erara kredo de la songĉa mondo, en kiu vi ĝis nun opinias

vin „*maldorma*“, povas fariĝi fatala por vi kaj delogi vin al tio, ke pro la malgranda vero vi prenas la *eraron* por *vera*!

Gardu vin, ke tion, kion vi penas atingi: – *la veron de la luma tago de la realo*, – vi ne volu konkludi per via *pensado*, aŭ ekzameni laŭ la leĝoj de pensado konataj al vi!

Tio, kion vi nun volas atingi, staras *super* la pensado, kaj nur *post* kiam vi atingis ĝin, vi povas levi vian pensadon al ĝi!

Tio, kion vi nun volas atingi, vi mem devas *fariĝi*; ĝi neniam povas malfermiĝi al vi per viaj diversaj ĝisnunaj provoj ekkapti la veron.

Via komenca klopodo devas direktiĝi al tio, ke vi kreu en vi *vastan malplenon*, por ke *tio nova*, kio plenu vin, trovu *spacon* en vi.

Ne atendu, ke tio nova montriĝos al vi tuje!

Estos necesaj *jaroj*, eble jardekoj, eble – pro via naturo – ankoraŭ pli longaj tempoj, ĝis oni povas tiri vin el la dormo sen endanĝerigi vin.

Je la komenco de via vojo nur via persista kuraĝo povas konduki vin.

Sed se vi serioze penas malligi vin el la katenoj de viaj sonĝoj kaj la sonĝa mondo de la aliaj, tiam jam post malmulta tempo la aferoj, kiujn vi ankoraŭ sonĝante nun supozas ekkonni, montros al vi jen tiun ĉi, jen tiun *alian* flankon, kaj tiel sciigas vin, ke vi jam estas sur la ĝusta vojo.

Ne kredu, ke subite la sonĝataj mirakloj, kiujn oni en via ĝisnuna sonĝa mondo rigardas kiel signojn de vekigo, pleniĝos vian vivon!

Certe okazos signoj kaj mirakloj sur via nova vivovojo, sed mi tre dubas, ke vi perceptos ilin, antaŭ ol „la tria okulo“ sur via frunto estos malfermiĝinta ...

Sed *ne estas necese*, ke vi ilin antaŭe perceptas.

Iuj homoj estis proksimaj al vekiĝo kaj refalis en dormon kaj sonĝon, ĉar ili ankoraŭ ne estis kapablaj elteni la misteran okazadon super sia vojo kaj lasis sin surdigi de mistikaj superpotencaj voĉoj.

Ju pli sobre kaj ju pli libere de romantikeco vi migras sur via pado, des pli bone!

Vi nenion atendu kaj nenion alstrebu krom *unu*: voli *vekigi* el via dormo, el la sonĝa mondo de la aliuloj!

Ju pli forte kaj pli koncentrite animas vin, en konstanta egalanimeco, nur tiu *unu* deziro, des pli baldaŭ estos espero, ke oni povas *helpi* vin, kaj oni *devas* vin helpi, ĉar tiun laboron vi neniam plenumus *sola*, sur kiu ajn alta ŝtupo de tera ekkonado vi eble staras kiel homo de la sonĝa mondo de tiu ĉi tero.

Ne rigardu kiel „maljustaĵon“ tion, ke *vi* atingu ion, kion aliaj *ankoraŭ ne* atingas!

Mi parolas al vi kiel al iu, kiu *povas proksimiĝi* al vekiĝo en tiu ĉi tempo, – eĉ se li perceptas ĉirkaŭ si nur sonĝantojn en iliaj pezaj, timoplenaj sonĝoj. Se vi ankoraŭ ne *povas* vekiĝi, tiam miaj vortoj estos, kaj iomatempe restos, nekompreneblaj al vi. Vi tiam aŭdos en pli malfrua tempo, eble nur post jarmiloj, en *alia* formo de ekzisto, similan vekvokon kaj tiam ankaŭ *povos* kompreni ĝin!

Tio nomata „eterna justeco“, kiu en la sonĝa mondo de tiu ĉi tero estas *serĉata* kaj tro ofte *ne trovata*, estas nura postulo de laŭsonĝa ligiteco.

En tiu mondo de *realo*, kiu ĉirkaŭas vin kiel min kaj kiun vi neniam povas vidi, dum vi serĉas *sonĝante en dormo*, regas nekontesteble sekurigita *justeco*, kiu fariĝas perceptebla al viaj okuloj nur tiam, kiam *vi mem* fariĝis *realaĵoj* en la mondo de realo!

Nur tiam vi vidos, ke multo, kiun vi nun atendas en via sonĝo kiel „dian justecon“, devus esti nomata horore *maljusta*, se ĝi plenumiĝus tiel, kiel vi esperas...

Kaj multo, kiu hodiaŭ ŝajnas al vi krianta *maljustaĵo* en la „mondoordo“, tiam montros al vi sian neskueblan justecon, ĉar *ne nur post la morto* de la tera korpo komenciĝas la efikoj en la bordoregnoj de la spirita mondo – la lastaj kaj *senindulgaj* sekvoj de tergeneritaj impulsoj.

Ne volu ekkapti anticipe tion, kio povas juste fariĝi via propraĵo *nur tiam*, kiam vi pagis la „prezon“ por tio en multjara fidela sindonemo.

Ĉiu *plenumo* en la mondo de *realo* povas esti donata al vi nur kiel sekvo de ekzakte difinitaj, *plenumitaj leĝoj*.

Tie ĉi, nenio povas esti ĉirkaŭirata aŭ negoce akirata en pli malmultekosta maniero. – Tiuj, kiuj volas helpi al vi akiri *ruze aŭ trompe* tion alstrebatan, estas viaj plej mizeraj *malamikoj*, ankoraŭ pli kruelaj ol ĉiu *honest*a malamiko, kiu povas iam renkonti vin sur via rekta vojo. –

Ne fidu iun vorton, kiu promesas fari vin ekkonantoj *rapide* kaj *sen malmola disciplino!*

Ne fidu iun instruanton, kiu instruas al vi „metodojn“, per kiuj vi faru vin vidantoj de spiritoj per la rimedoj de via songa mondo!

Ne fidu la komunikaĵojn, kiujn oni povas ricevi de virinaj kaj viraj somnambuloj kaj „mediumoj“ en la atakoj de iliaj nervokrizoj!

Ne fidu iun instruon, kiu faras la plej altan homan privilegion dependa de la speco de nutraĵo aŭ de fakiraj „ekzercoj“.

Ĉio ĉi sole kondukas vin al novaj songoj kaj ankoraŭ pli profundigas vian dormon, el kiu vi volas eskapi!

Kiu volas vere vekigi, tiu *fidu sin mem!*

Kiu vere volas eniri *la mondon de la realo* kiel „releviginto“, tiu provu, *por si mem sola*, en sia koro, la veron de miaj vortoj, kaj tiam agu persiste laŭ la instruo, kiun mi donas al li!

Tiel li fariĝos mastro de sia eterna sorto!

Tiel malfermiĝos al li la pordoj de la temploj de luma ekkonado, kiuj hodiaŭ estas ankoraŭ fermitaj al li, ĉar nur tiu en si mem vekiginta trovas *en si mem* la ŝlosilojn por ili.

Spiritaj helpantoj estos ĉiutempe *spirite proksimaj* al li, tiom ofte kiom li bezonas ilian helpon!

Sed ili kapablas helpi lin sole nur tie, kie temas pri *lia spirita vekigo*, kaj pri la memformado de lia animo, kondiĉita de lia vekigo kaj estonta eterne valida.

Neutila kaj absurda estus ĉia fido al spirita helpo, kie la propraj fortoj de la tera homo sufiĉas kaj estu uzataj de li, por ke ili lernu disvolviĝi en ago kaj farado.

Tiun, kiu, fariĝinte laca de dormado, *rememoras siajn proprajn fortojn*, oni povos plej frue alkonduki al vekigo en la spirito!

La arkitektoj je la katedralo de la homaro

Ekzistas sur tiu ĉi tero malgranda nombro de viroj *pure spirite* interligitaj, – konvento starigita *en la eterno*, – kiu agadas jam tra jarmiloj en kvietaj kaŝiteco, kaj tamen kapablas atingi, sur *spiritaj* vojoj – *sen* vorto parola aŭ skriba –, ĉiujn homojn, kies interna animkulturo estis tiom progresigata per propra laboro je si mem, ke la radioj de spirita lumo, elirantaj el tiu kaŝa komuneco aganta nur *el la eterna spirito*, povas plenigi iliajn korojn.

Al homo de la okcidenta mondo tio eble ŝajnas stranga kaj dubinda, dum homo de la Oriento – *space* pli proksima al la geofizike difinita, *ankaŭ al li kaŝita* metafizika kampo de forto de la spirita agado de tiu komuneco – pli facile inklinus dubi pri la ekzisto de la suno ol li povus dubi pri tio, kion tie ĉiu informito scias pri la agado de tiuj malmultaj, kaj ofte ankaŭ mem spertis.

Ankaŭ en Okcidento homoj zorge kaj kviete gardis – jam de la tagoj de la *Edao* – internan scion pri tiu spirita realo. Kvankam tiu scio ne ĉie montriĝis tiom klare kiom en la legendo pri la sankta Gralo kaj ĝia kavaliraro, tamen la tuta okcidenta mezepoko estas plenigita de alta sciigo el sublima rondo de unuiĝintoj kun Dio, tiel ke spuroj de tiu sciigo estas ĉie troveblaj en legendoj, popola kredo, kaj poezio.

Lastatempe, rondo de religie pensantaj esplorantoj de mistikaj tradicioj sciis pri la „*saĝaj viroj de Oriento*“, kaj ekde antaŭ duona jarcento tiel nomataj „teozofiaj“ libroj parolas pri „*mahatmoj*“ kaj ties komuneco en „*blanka loĝio*“,

kvankam la malmultaj, kiujn oni opinias koni sub tiu ĉi nomo, staras *tre malproksimaj* de la *instruoj* en tiuj libroj, kaj formas *nek framasonan loĝion aŭ similan rondon, nek sekretan societon*, sed estas pure *spirita* komuneco, *neniel komparebla* kun *iu* alia homa unuiĝo.

Sed ĝuste al la sciigo originanta el „teozofia“ flanko, la membroj de tiu ĉi spirita komuneco ŝuldas misterecan renomon, kiun ili mem neniam kaŭzis, kaj en kiu ili povas vidi nur malestimindan, *fantastan karikaturon* de si mem.

Oni faris el ili specon de *sorĉistoj*, aŭ oni prezentis ilin kiel *duondiojn*, plenajn de naturscienca „scio“, kiu reale estas *tute indiferenta* al ili; oni malavare atribuis al ili dian ĉiosciantecon rilate al teraj okazaĵoj, kaj preskaŭ nelimigitan potencon super spirito kaj materio.

Oni rigardis sin rajtigita fari ĉion ĉi, ĉar komence de la movado, kiu unuafoje en Okcidento parolis pri „mahatmoj“ kiel pri mirindaj superhomoj, okazis certaj aferoj sufiĉe strangaj, por ke ili povu esti atribuitaj de nesciantoj al „*duondioj*“, kaj oni kredas en hipnota ligiteco, ke la *kaŭzintoj* de tiuj okazaĵoj kaj la „*saĝaj viroj de Oriento*“ estas identaj.

Sed la *veraj* „mahatmoj“, – se oni volas plue uzi tiun ĉi vorton, en Hindujo multe uzatan kiel honora titolo kaj eluzitan, kiel nomon ankaŭ por membroj de la rondo de lumantoj de la pralumo, kiuj manifestiĝas en terhoma ekzisto, – neniam kreis „spiritajn movadojn“ aŭ fondis unuiĝojn per tio, ke ili provis influi homojn per *fakiraj artoj* kaj laŭdira *ĉioscianteco en scienco*.

Ili rigardas la impetan *volon scii* de la okcidenta scienco kiel specon de *spirita* „*vivisekcio*“ kaj rigardas la homan soifon al scio kiel laŭorde direktitan nur *tie*, kie ĝi ne transpaŝas

la cirklon de la mondo de spertado normale kondiĉata de la terhoma ekzisto.

Ilia spirita „scio“ estas de tute alia speco: ĝi estas absoluta certeco de la animo en spiritaj aferoj, kaj havas absolute nenion komunan kun scienca ekkono.

Certe, estas terhome dezirinde al ili, ke iu el ilia rondo havu intelektan enrigardon en la kampojn alireblajn al la intelekto – ili do atendas, ke ĉiu el ili havu sufiĉe bonan ĝeneralan klarecon de siaj tempo kaj popolo –, sed, laŭ la strikta senco de iliaj pure spirite difinitaj leĝoj, ankaŭ ĉiu paŝtisto, kiu eĉ ne povas skribi sian nomon kaj pasigis sian junecon malproksime de ĉia kulturo, povus aparteni al ilia rondo, kondiĉe ke li estas *naskita* por tio, ĉar „majstro“ ne estas „farita“, tiom malmulte, kiom oni povas *fari* el artisma netalentulo artisman genion.

Oni propre ne bezonas emfazi, ke „majstro“ de la alta rondo, – kiun la groteska „teozofio“ de la lastaj jardekoj nomis „blanka loĝio“, – *reala „mahatmo“*, en la vera senco de l' vorto: „*granda animo*“, *povas naskiĝi en ĉiu loko de la tero*, kaj ne nur en Hindujo, Ĉinujo aŭ Tibeto, kaj ke estas tute indiferece, ĉu li venas en kontakton kun la *centra punkto* de „ĉiuj fratoj sur la tero“ en *fruaj aŭ malfruaj vivojaroj*, ĉu li trapasas *kiel junulo aŭ kiel maljunulo* la spiralojn de la spirita instruado, kiu igas lin iam vekiĝi *kiel legitima sekvan-to kaj heredanto de forpasinta majstro*, kiu plue restas ĉe la tero, tiel ke li nun *unuigas* sin kun la spirito de sia sekvinto kaj tiumaniere transmetas al li sian jam *perfektiĝintan* majstrecon.

Nur *tiam* tiu *naskita* por esti majstro estas ankaŭ *fakte* „majstro“, nur tiam li estas *konscia* pri sia *pastreco* „laŭ la maniero de Melkicedeko“. –

En la paso de siaj jaroj de disvolviĝo li devis trapasi la plej diversajn fazojn de okultspiritaj eblecoj, tiel, kiel infano en la patrina ventro trapasas ĉiujn stadiojn de la estaĵoj, kiuj kuŝas *sube* de la ŝtupo de l' tera homo.

Tiamaniere la ankoraŭa neperfektiĝinto iam staris je punkto de decidiĝo, kiu lasis lin libere elekti, ĉu li volas fariĝi *fakiro* aŭ spirita *majstro*. –

Li estis malkovrinta en si fortojn, kiu baldaŭ faciligus al li la faradon de plej eksterordinaraj, ŝajnaj „mirakloj“, kaj la *tento resti* sur la ŝtupo de fakiro estis granda por li. Per tio, ke li posedis la forton *kontraŭstari* tiun tenton, li montriĝis kiel unu de la treege raraj, veraj *elektitoj*, sed per tiu decido li premis *nelezeblan sigelon* sur la okultajn fakirfortojn de sia naturo, per kiu ili restas por ĉiam *ligitaj*, escepte se la prasankta „Plejaĝulo“, restanta en la substanca pura spirito, *de la fratoj sur la tero* spirite permesas al la estonta majstro *forigi* tiun sigelon, kio dum multaj jarmiloj eble okazas *unufoje*, kaj nur en la servo de misio, kiu estus plenumebla en absolute neniu alia maniero.

Tio permeso kompreneble *neniam* estas donata por krei, helpe de vera majstro, „movadon“, kiun estigis la fondintino de la „teozofia“ societo, apogante sin sur siaj *laŭsupozaj* „majstroj“, aŭ por akiri la kapablon fari la spiritismajn artaĵojn kun taso kaj leteroj, laŭdire okazintajn en la proksimeco de tiu nenorma virino, artaĵoj, pri kiuj moke ridus ĉiu fakiro kaj ĉiu lamaa sorĉisto. Mi esperas, ke oni komprenos mian ironion.

Estas preskaŭ nekompreneble, ke seriozaj personoj, plej forte impresitaj de la raportitaj fenomenoj, povis veni al la opinio, ke *pure spirita* komunumo ne nur etike elstaranta, sed ankaŭ radikanta en la *spirita vivo de la kosmo*, estus preta montri per tiaj trivialaj petolaĵoj sian „suverenecon super la naturaj leĝoj“.

La fortoj, kiujn disponas lumanto de la pralumo, naskita kiel tia kaj, en tio sia tereca, atinginta perfektecon, – *vera* „majstro“ de la spirita „blanka loĝio“, se ni restu ĉe tiu ĉi esprimo ofte uzata, kvankam pure arbitra – estus apenaŭ taŭgaj por estigi *eksterajn fenomenojn*, per kiuj li kapablus ekkonkuri kun iu ajn disvolviĝinta fakiro.

En la ekstera vivo sur tiu ĉi tero ĉiu vera spirita majstro estas subigita al la *samaj naturaj leĝoj* kiel ĉiuj aliaj homoj, kaj antaŭ longa tempo libervole rezignis la uzadon de fortoj, per kiuj li, kiel kaŝa aŭ malkaŝa fakiro, estus devinta atingi la renomon de miraklo-faranto.

Sed por tiu ĉi rezigno li akiris forton, kiu, kiel la reĝino en abelujo, unuigas sub si sennombrajn aliajn fortojn, kiuj ĉiuj per tiu forto servas *nur la volon de la majstro*, kaj devus kaŭzi *pereon* al ĉiuj *aliaj*.

Certe, tiu alta forto kaj la fortoj subordigitaj al ĝi retroefikas ĝis en la ekstera fiziksensa fenomena mondo, kvankam ĉi tie ĝia *origino* estas *ne* plu perceptata, sed la sfero, en kiu tiuj fortoj estas *aktivigataj* de vera spirita majstro, estas malfermita al ĉiuj, kiuj ne estis *naskitaj* kiel lumantoj de la pralumo kaj perfektigitaj kiel tiaj en multjara instruado.

Nur *nekonscie* ĉiu homa spirito sur tiu ĉi tero etendiĝas en tiun altan sferon, kaj tial rezultas la ebleco atingi de tie ĉiujn homojn.

Dum ĉe la plejmulto de homoj inspira okazo en tiu sfero restas tute senefika, ĉar iliaj pli altaj spiritaj organoj restadas en speco de kadavra rigideco, tamen ekzistas en ĉiu epoko granda nombro da homoj, en kiuj la pli altaj spiritaj organoj jam estas aktivaj, eĉ se tiu aktiveco ankoraŭ ne estas registrata de la cerba konscio de la tera homo.

Tiuj ĉi *progresintoj*, kiuj per *propra* laboro je si mem jam atingis specon de spontanea, senvola aktiveco de siaj pli altaj spiritaj organoj, propre formas la komunumon de homoj, kiuj, – kvankam *ankaŭ ili ne scias tion* en sia tera cerbokonscio, – spertas la spiritan influon de la „majstroj“, de la lumantoj de la pralumo.

Homo ekkonscias tiun influon nur tiam, kiam liaj pli altaj spiritaj organoj estas sufiĉe disvolviĝintaj, kaj kiam la volo, vekiginte el latenteco, klopodas plenumi la inspirojn, kiujn ĝi ricevas el sia pli alta spirita sfero, ĉiam tiom honeste, ke la danĝeroj, kiuj minacas nepreparitan homon je la vekigo de liaj pli altaj spiritaj organoj, povas esti rigardataj ĉe li kiel eliminataj.

Estas nur *ŝirmo*, kiun la naturo donas al senhelpuloj, ĉar homoj ne naskiĝas kun plene vekigintaj pli altaj spiritaj organoj, se ĝi metas la kondiĉon, ke *multjara persista* laboro je si mem devas antaŭiri al tiu vekigo, kaj ke tiu strebanta al vekigo ne atingu la vekigon, antaŭ ol li trapasis la provojn, kiuj garantias lian moralan forton de rezisto.

Se *ne* estus tiel, tiam la pli altaj spiritaj organoj de homo, kiuj kondiĉas lian *plej altan beatecon*, servus al li nur por tio, ke li en absoluta senespereco spirite *neniigus sin mem*, kaj li eĉ ne iomete suspektus, *por kio* li uzis ilin.

Sed aliaflanke oni ne opiniu, ke tiuj, kiuj ankoraŭ ne „vekigis“ kaj tamen jam ricevas la spiritan influon de la „majstroj“, povas *neniel senti* tiun influon.

Ĝi *ja* estas *sentata*, sed oni ne ekkonas ĝian *originon*, kaj pleje interpretas en tute racia maniero, aŭ implikite en supersticiaj aŭ religie koloritaj imagoj, tion kion oni ŝuldas sole al la influo de la „pli aĝaj fratoj“ en alte spirita sfero.

Tiu ĉi influo ne konsistas, kiel oni povus opinii, en la inspirado de apartaj ideoj el la mondo de ekkono de la spiritaj majstroj, kvankam tia influo ne povas absolute ekskludata ĉe pli alte disvolviĝintaj individuoj, sed ĝi pleje konsistas en *alkonduko de fortoj*, – en spirite *ekigita* helpo, – kiu kapabligas la koncernan homon, ekkoni en sia interno per siaj spiritaj pli altaj organoj tiaspecajn aferojn, kiuj kuŝas en la direkto de liaj *propraj* pli altaj impulsoj.

Estis dirate, ke la majstroj scias spirite atingi „ĉiun popolon kaj ĉiun individuon“, sed kvankam tutaj popoloj jam staris sub ilia longedaŭra influo, tio okazis nur, ĉar en tiuj popoloj estis estiĝintaj rimarkinde multaj *unuopuloj*, kiuj kapablis veni en la influosferon de la majstroj de la lumo sur alta spirita nivelo. Flanke de tiu *pure spirita* komuneco oni konas nek privilegiojn nek antaŭjuĝojn rilate al „popolo“, „nacio“ aŭ „raso“, kiom temas pri homoj kapablaj enpreni spiritan lumon. Oni havas rilatojn ĉiam nur kun la *unuopuloj*, el kiuj konsistas ĉiuj tiuj surtere apartigitaj homgrupoj. La aparteno al *rasoj* kaj *popoloj* aŭ al ties *partioj* estas, – sur tiu alta nivelo, sur kiu la lumantoj en la pralumo agadas, – ne nur *tute malgrava*, sed ankaŭ plu neniel efika aŭ eĉ nur *rimarkebla!* Tie ĉi *reale* regas, – *pure spirita*, – „*ĝenerala frateco*“ de tiuj, kiuj povis atingi tiun ĉi sanktigitan regionon. Ĉio *de-*

truema restas malproksima de tiu regiono *pro sia propra antipatio* kaj estus *neniam asimilebla* al ĝi.

Sed en tiuj altaj spiritaj sferoj ekzistas „*libereco*“ nur tiom, kiom ĝi estas atingebla per *eniĝo* en la *ligojn* de la kosma leĝo, dum *neniam* ekzistis nek ekzistos „*egaleco*“, ĉar en tiuj regionoj regas sole la leĝo de la *hierarkio*, leĝo, kiu asignas al ĉiu unuopulo kun senindulga neceso la lokon rezervitan al li. La *gotika katedralo* estas la perfekta *bildo* de tiu ĉi hierarkia kosma ordo. Dum la *murŝtonoj* nombras je miloj, la nombro de ŝtonoj taŭgaj por *pilaŝtoj* jam estas malpli granda, kaj tiu de la *pinakloj de la turo* fariĝas pli kaj pli malgranda, ĝis fine *unu sola* ŝtono formas la *krucofloron*.

Kiom ajn *diversa* estas la *valoro* de tiuj ŝtonoj, ili ĉiuj estas de *egala neceseco* por la harmonio de la tuto, kaj *sole* tio povas esti rigardata kiel esprimo de „*egaleco*“. Regas *absoluta subordigo*, ekde la krucofloro kaj la foren videblaj pinakloj de la turo ĝis la plej kaŝaj ŝtonoj de la fundamentoj, kiuj havas neniun alian taskon ol porti la tutan konstruaĵon.

Ne estas alie en la spirita mondo, kies eterna harmonio estas sekurigita nur per la neindulga efiko de la hierarkia leĝo.

Se ni volas resti alisence ĉe la bildo de la gotika katedralo, tiam la kaŝa spirita tasko de la lumantoj de la pralumo, kiel majstroj de la templokonstruado, estas kvazaŭ: spirita helpado en la „*ŝtontajlado*“ de la unuopaj „*ŝtonoj*“ laborantaj je si mem, kiuj *bezonas* helpon en sia *memformado*. – Sed estus senutile, ke spirita, viva „*ŝtono*“ plende demandus, kial ĝi ne povas fariĝi *pilastra ŝtono* aŭ *pinaklo de turo*, dum ĝi estas nepre bezonata eble kiel unu de la multaj murŝtonoj, kiuj apogas la volbon de la katedralo de ekstere.

La „scio“ de vera majstro de la *kosma* konstruarto, kiu posedas la eternajn konstruplanojn, estas absolute certa *anima scio*, ne la rezulto de konkludado kaj kalkulado, neniam scio laŭ tera *scienco*.

Tion pliklarigu jena ekzemplo:

Ĉiu homo kun sanaj okuloj scias, ke ĉe malfermitaj palpebroj li kapablas vidi.

Sed la procezo, kiun ni nomas „vidado“ estas, science rigardate, ekstreme kompleksa, kaj estas bezonata granda kvanto da pensa laboro por kompreni ĝin tiom, kiom ĝi estas pense kaptebla.

La majstroj kondutas en tiu ĉi okazo kiel la plej naiva homo aŭ la infano ...

Ili volas ne pli kaj ne malpli ol *povi* vidi, kaj al ili sufiĉas „scii“, ke ili vidas.

La *tera, scienca esplorado* de tiu procezo estas tute malgrava por ilia supermateria mondo, sed aparte de tio ĝi estus treege *malutila* kaj plejaltgrade *kondamninda*, ĉar pro tio, ke tie ĉi farado kaj esploro de la farado ne povas esti apartigitaj kiel en la tera scienca procezo de ekkonado, *la esploro de la farado malebligas la faradon mem*.

Per aliaj vortoj: en la pure spirita, supermonda sfero, *absolute certa sperto* estas akirebla nur *ĉe plej perfekta naiveco*, kaj tre multaj aferoj, kiuj aperas al la tera scienco tiom gravaj, ke pie kredantaj scienculoj aŭdace esperas, ke en la „*transa mondo*“ ĉiuj iliaj demandoj trovos „*plenplenan klarigon*“, estas rigardataj sur *spirita* nivelo ne nur kiel *nesciindaj*, sed kiel *pereigaj*.

Oni tie vidas en ĉiu analiza *sciemo* nenion alian ol la *mal-feliĉon*, kiu ĉasis la homon el la „paradizo“: – oni vidas en ĝi

esprimon de *malprudento*, kiu agadas ne pli bone ol homo, kiu por esplori la sekretan mekanismon de horloĝo metus ĝin en akrajn acidojn, por ke ĝi, dissolvite en atomojn, donu al li eksplikon.

En tiuj sferoj oni scias, ke ĉiu analiza sciemo kondukas en la direkton *kontraŭan* al la kosma leĝo, kiu estigas el fortopunktoj en la kaoso *formojn*, kies vera ekspliko troviĝas nur en *plej altaj* spiritaĵoj. Oni tie scias, ke ĉiu *pli alta* formo tralumas la *pli malaltan*, sed ke ĉiu konkludado el io pli malalta al io pli alta, eĉ se ĝi inter certaj limoj ŝajne donas kontentigajn rezultojn, estas *trompa* konkludado.

Tial neniu vera spirita majstro dediĉos pli grandan atenton al la ĉiutaga okazado en sia tempo, kiu el lia vidpunkto povas ĉiam signifi nur plej etan tempo-*atomon*, ol estas neeviteble bezonata por sia persona surtera vivo.

Atavismaj okultaj restaĵoj, kiel „klarvidado“ kaj similaj aferoj, estas ekskluditaj dekomence pro lia naturo denaske donita.

Ne ekzistas pli certa signo por „falsa“ majstro, eĉ se eble li bonafide *rigardas* sin kiel spiritan majstron, ol se oni scias pri li, ke li estas „klarvidanto“.

Ĉiu klarvidanto vidas, en la *plej favora okazo*, kaŝajn aferojn, kiuj apartenas al la regiono de la nevidebla *fizika* mondo. Se li opinias vidi ion *spiritan*, li nur subfalas al reflektitaĵoj de imagoj terece originintaj, reflektitaĵoj kiuj plenigas la *fizikan*, ordinare nevideblan aŭron de tiu ĉi planedo kvazaŭ fatamorgano de miloj kaj miloj da bildoj.

Neniam ekzistis vera spirita „majstro“, kiu en iu ajn rilato estis „*ĉioscia*“! Ĉio, kion superstiĉaj entuziasmoj aŭ sen-

konsciencaj trompistoj tiurilate disvastigis, apartenas en la regionon de fabelo.

Se vera spirita majstro montrus neordinaran sagacecon pri aferoj de la surtera vivo, tio estus bazita sur lia *persona homa talento*, ĉar neniam li povus en tiuj aferoj uzi okultan helpon, sen rompi la striktan leĝon, de kies libervola *absoluta agnosko* li definitive dependas.

Ankaŭ spirita „majstro“, kiom temas pri tio lia surtera, ankoraŭ povas „*fali*“, sed ankaŭ nur *li* kiel surterulo povas fari la solan „*pekon*“, por kiu ekzistas „*nenia pardono*“ – „*la pekon kontraŭ la sankta spirito*“, – kiu en lia okazo estas rezistema, aroganta ignorado de tio en si, kio volas malkaŝi sin tra li. Li tiam malaperas el la spirita mondo, sensone, kiel estingiĝinta stelo malaperas en la universa spaco. Lia nomo estas elstrekita el la „libro de la ŝafido“, kiu portas „sep sigelojn“.

Certe, *tio eterna* de tia krimulo en la spirito neniam povas *neniigi* rezulte de lia spirita memmortigo, sed lia *individua konscio* iom post iom, en procezo daŭranta jarmilojn, dissolviĝas en la ĝenerala *planeda* konscio, kaj lia lasta individua scio pri si mem diras al li nur, ke li *kondamnis sin mem* malleviĝi en turmentoplenan nokton.

Li estas „*Lucifero*“, la falinta lumilo, kiu staris antaŭ la trono de la Eternulo, kaj vere *ne* estas „inventajo de regemaj sacerdotoj“, ke, dum la tero portas homojn, ekzistas „*infero*“, ke tiu ĉi planedo estas ĉirkaŭita de armeo da „*diabloj*“, kiuj estas nenio alia ol falintaj „*filoj de Dio*“, kiuj post sia falo ne povas trovi kvieton, ĝis la abismo de la kaoso englutas la lastan fajreron de ilia konscio.

„La diablo kiel leono blekeganta ĉirkaŭiras, serĉante, kiun li povos forgluti.“

Tiuj ĉi falintoj havigis al si helpantojn el inter homoj vivantaj sur la tero, per tio, ke ili spertigis siajn disĉiplojn pri ĉiuj fakiraj artoj, kiujn ili mem iam estis forĵurintaj.

Ili tenas ilin en la erara opinio, ke ili *ne „falis“*, sed *supreniris* super iliaj iamaj fratoj, kaj ke ili nun scias, ke ties memsurprenita ligiteco al eternaj leĝoj estas pia trompiĝo. Al siaj disĉiploj ili eksplikas, ke ĉio, kio surtere estas rigardata kiel *diabla*, *malbona* kaj *malica*, estas permesita al ili, kaj tiel ili konservas, en la interno de Azio ĝis la hodiaŭa tago, satanan karikaturo de la spirita komunumo de lumo: – kloakon de abomenaj hororaĵoj, kies venenaj miasmoj infektas ĉiujn malaltajn gentojn de la homaro, sed kiuj ankaŭ en la Okcidento postulas ne malmultajn nekonsciajn viktimojn. Tie ĉi inkluditaj estas ankaŭ la sekretaj societoj, frataroj kaj sekretaj sektoj disvastigitaj en la tuta Azio kaj aliaj kontinentoj, kiuj pro religiaj kaŭzoj rigardas la homon kiel *ion neestindan*, sed kiuj karakterize celas la ekstermon precipe de la *blanka* homo.

Mi bone scias, ke kelkaj legantoj barakte rifuzos akcepti *tiujn ĉi* informojn eĉ pli ol *tion*, kion mi diris pri la tiel nomata „*blanka loĝio*“.

Ili tie ĉi flarsentos la „superstiĉon de antikvaj religioj“ en nova vesto.

Sed la instruantoj de la antikvaj religioj, la sacerdotoj de antikvaj kultoj, pleje estis „*sciantoj*“, kaj do la afero estas *inversa*: la antikvaj prezentaĵoj enhavas pli aŭ malpli vualitan scion pri la *realo*.

Mi tie ĉi ne prezentas fantaziojn kaj ne rakontas fabelojn! Mi parolas nur pri *faktoj*, kiuj ne estas forigeblaj per tio, ke oni *kontestas* ilian faktecon.

La nerefutebla privilegio de vera spirita majstro kompare kun aliaj homoj estas *absoluta certeco de sperto en pure spiritaj aferoj* kaj lia potenco krei sur alta spirita nivelo kondiĉojn, per kiuj, en pli malaltaj spiritaj sferoj ĝis malsupre en la nevidebla *fizika* aŭro de tiu ĉi planedo, malfeliĉo estas laŭeble *preventata*.

La batalo kontraŭ siaj iamaj fratoj, kiuj en sia „falo“ emas tiregi kun si ĉion, kion ili povas atingi, estas unu el liaj plej gravaj taskoj.

Sed ĉar tiu ĉi batalo povas esti kondukata *neniam agrese*, sed nur per *preventado de la atakoj*, la tasko estas faciligata tiom same, kiom oni sukcesas *atentigi* homojn pri la danĝero.

Sed la homoj de la nuna tempo ne kapablos preni serioze la danĝerojn, kiuj ĉirkaŭe nevideble minacas ilin, tiom longe dum la nocio pri „spirita majstro“ restas tiom neklarigita kaj problema kiom ĝis nun.

Tiom longe, dum oni postulas de la sana homa menso kredi je „majstroj“ vivantaj sur tiu ĉi tero kaj samtempe starantaj kiel duondioj super la vivo de la homoj, tiom longe dum oni postulas de homoj kredi je „mahatmoj“, kiuj superas eĉ ĉiun hindan fakiron je la trivialeco de siaj eligaĵoj, tiom longe dum oni postulas de homoj vidi en la frataro de lumantoj „Granda Skolo de la Scienco“ (kiu kompreneble scias senlime „pli“ ol ĉiuj reprezentantoj de la scienco en niaj universitatoj!), tiom longe oni ne rajtas ofendiĝi, se persono serioze pensanta povas nur kompate rideti pri la sciigo rilate tian komunumon.

Tamen, multo rilatanta al la vera spirita majstro restas „mistera en luma tago“, kaj ne estas necese drapiri lian ekziston per dubindaj misteraj vualoj.

En la ekstera vivo li estas *homo kiel ĉiu alia* kaj neniam devas misuzi siajn pure spiritajn eblojn por plialtigi sian eksteran homan vivon.

Krome, li tute ne estas, sekve de sia spiriteco, „*geniulo*“ aŭ eĉ „*sanktulo*“.

En lia ekstera homa vivo, nur *tre* spertaj okuloj kapablos ekkoni lin.

Tie ĉi li estas *homo* kaj nenio alia!

Nur sur *spirita* nivelo komenciĝas lia „majstreco“; kaj ke li, kiel tera homo, kapablas esti konscia *samtempe en ambaŭ* regionoj kaj *aktivi* ankaŭ en la *spirita* mondo, tion li ŝuldas al tiu majstreco, kiu estas *denaskiĝa*, kaj al sia firmigita homa volo, kiu ekde certa tago kapabligis lin, trakuri la spiralojn de spirita instruado ĝis *perfektiĝo* en la spirita sfero, spite al ĉiuj eksteraj kaj internaj danĝeroj kaj obstakloj.

Mistera en la *ekstera* vivo, – ankaŭ por la partoprenantoj mem, – restas *la permanenta spirita ligiteco* inter individuaj majstroj, eĉ se ili vivas en lokoj plej foraj unu de la alia, kaj la ligiteco de *ĉiuj* majstroj kun *ilia kaŝita, tera centra punkto* en la interno de Azio. Sed neniu vera majstro tie ĉi iam fortrus la vualon, eĉ se estus eble al li. Kaj ĉiuj belaj eksplikoj troveblaj en okultismaj libroj, ĉiu uzo de la banala nocio „*telepatio*“ neniam povas komprenigi la „metodon“ al iu homo, kiu ne *mem kapablas* apliki ĝin. Sed al tia homo plene sufiĉas, ke li *povas* apliki ĝin, kaj li neniam venos en la tentiĝon voli „*science*“ ekspliki ĝin, eĉ se nur por si mem.

Al ĉiu alia sufiĉu la scio, ke vera membro de la „blanka loĝio“ – do vera lumanto de la pralumo – neniam instruos per parolo kaj skribo ion rilatantan al *pure spiritaj* aferoj sen plena akordo kun siaj fratoj kaj kun ties kaj sia spirita estro en la eterna pralumo.

Spirita “majstro“ posedas absolutan certecon nur rilate al *spiritaj* aferoj! En ĉiuj aliaj aferoj kaj homaj fakoj de scio, lia fidindeco dependas sole de lia sperto kaj de liaj scio kaj povo lernitaj en ĉiutageca maniero.

Tiuj ĉi klarigoj servu al tio, ke en la spiritaj okuloj de la homoj de mia tempo estu forigata la „blinda punkto“, kiu estas la kaŭzo de tio, ke ĉiu mondebildo devas resti malkompleta, indiferece kiom multe ĝi alie aperas logike formita kaj harmonie perfektigita.

Al kelkaj, kiuj entreprenas *serĉi* „la lumon“, estu nun pli facila la fido, ke ilia vojo estas gardata „de la majstroj de la luma tago“, de la arkitektoj je la katedralo de la homaro, al kiuj la *majstro de ĉiuj majstroj* donis la mezurunuon de la „bazangula ŝtono“, kiu entenas en si ĉian spiritan „ĝustmezurecon“!

Teozofio kaj pseŭdoteozofio

Se iam *ebligŭs* al la homoj de la okcidenta mondo en ĝia tuteco, forskui de si la diversajn *narkotecojn*, kiuj rabas al ili ĉiun daŭran, klaran memkonsideradon, tiam tremo de hororo devus kapti ilin ĉe la ekkono de la terura mallumo, kiu ĉirkaŭas ilin rilate al *spirita* scio.

Certe, sur tiu ĉi duono de la tero laŭdire regas la „kristanismo“ kaj ĝiaj anoj apogas sin sur la skriboj de la kvar aŭtoroj nomataj „evangelistoj“, la alportintoj de la „bona mesaĝo“ kaj de la lumo por lumigi la „paganojn“...

Sed la skribintoj de tiuj „evangelioj“ raportas, ke ilia alta majstro parolis al siaj disĉiploj:

„Al *vi* estas donite *ekkoni* la misterojn de la regno de Dio, sed al la aliaj per *paraboloj*, por ke, vidante, ili *ne* rimarku, kaj aŭdante, ili *ne komprenu*.“

Parolo malmola kaj terura, se ĉiuj homoj – kiel oni volonte opinias – estus „egalaj antaŭ Dio“, se do „la aliaj“ havus *rajton samamaniere* esplori „la misterojn de la regno de Dio“?! –

Sed la sanktaj libroj, sur kiuj la tuta kristana instruo baziĝas, scias *nenion* pri tiu ĉi „egaleco antaŭ Dio“. Ili distingas akre kaj klare inter „filoj de *ĉi tiu* mondo“ kaj „filoj de la *lumo*“. –

Ili diras, ke ilia majstro avertas, ke oni ne donu „sanktaĵon al la hundoj“ nek „ĵetu perlojn antaŭ la porkoj“; komparoj certe sufiĉe klaraj por ne montri lin ligita al la opinio, ke ĉiuj homoj estas „egalaj antaŭ Dio“!

La antikvaj raportoj pri lia vivo kaj morto diras, ke li *silentis* demandite de Pilato: *kiu li estas*; sed al tiuj ekkonintaj tion, kion „ne karno kaj sango malkaŝis“, li majeste donis la konfirmon, dirante al ili:

„Vi nomas min *majstro*; kaj vi pravas, ĉar tia *mi estas*!“

Sed kie en la kvar skriboj nomataj la „evangelioj“ troviĝas la vortoj, kiujn tiu ĉi majstro parolis *sole al siaj konfiduloj*, al tiuj de li *elektitaj*?

Ekzistas vortoj, kiuj ebligas *konkludi* al instruo konata *sole al la disĉiploj*, sed la instruon mem oni serĉos vane.

La eklezio de Romo certe ne malpravas asertante, ke la instruo de la majstro el Nazareto baziĝas ne nur sur la „*skriba vorto*“, sed ankaŭ sur la „*tradicio*“; sed ĉu tiu ĉi „*tradicio*“ ne estas jam de longe *ŝutkovrita* kaj *distordita*, eĉ se reale tie kaj tie ĉi eble troviĝas la lastaj *spuroj* de ĝia ekzisto ĝis la nuna tempo?

Oni diras, ke la majstro de la evangelioj ne faris nek postlasis iajn *skribajn notojn*.

Ĉiu estas libera kredi al mi aŭ ne, kiam mi diras, ke sur tiu ĉi malgranda planedo vivas homoj, kiuj scias kun *ĉia certeeco*, *superanta ĉiun alian certecon*, ke la majstro el Nazareto postlasis *skribojn* de siaj *sekretaj instruoj*, – ke la lastaj de ili ekzistis ĝis la tempo de persekutado de kristanoj kaj estis detruataj en Romo fare de fidelaj pli malfruaj disĉiploj, por ke ili ne falu en la manojn de la „*paganoj*“, – kaj ke en la *evangelio laŭ Johano* grandaj partoj el tiuj propramanaj skriboj estas *redonitaj* en la formo de eltiraĵoj, kiom ili estas formulitaj en vualita lingvaĵo kaj povis enigataj en la tekston kiel *parolaj vortoj*.

Kiuj scias tion, tiuj ankaŭ scias, ke la *propramanaj* skriboj de la majstro estis disvastigataj en la formo de kelkaj *kopioj*, kaj ke eltiraĵoj el ili troviĝis ankaŭ en skriboj *aliaj* ol la evangelio nomata „laŭ Johano“ kaj tradiciita ĝis la nuna tempo.

La scio de tiuj malmultaj rilate al la majstro de la evangelioj tute ne estas limigita al tiu supre menciita, sed ankaŭ ili, kiel la unuaj el liaj disĉiploj, estas devoligitaj al leĝo, kiu igas ilin gardi kiel sekreton tion, kio ne povas esti donata al ĉiuj. – Ankaŭ ili parolas al „la aliaj“ nur per „paraboloj“ kaj vualigantaj simboloj.

Ili estas la gardantoj, renovigataj en ĉiu generacio, de sankta trezoro, kiu restas konservita sur tiu ĉi planedo fare de ili: – la veraj „kavaliroj de la sankta Gralo“ de la legendo, – praktikantoj de spirita servo, por kiu nur *tre* malmultaj homoj en ĉiu generacio estas kapablaj, ĉar nur *tre* malmultaj estas naskataj por ĝi.

Sed oni devas esti „*naskita por tio*“, kiel homo devis esti naskita por esti *Mozart*, alia por esti *Beethoven*, kaj neniu homo povus „fariĝi“ iu de ilia speco, eĉ ne per la plej granda diligenteco de la mondo.

La viroj tie ĉi priparolitaj – inter kiuj en la fluo de jarmiloj nur malofte troviĝis *eŭropano* – estas ĉiutempe la solaj, kiuj posedas en pli aŭ malpli alta grado tiun sekretan „scion“, kiun posedis la majstro de la evangelioj, kaj *li* posedis ĝin nur pro tio, ke li estis *unu el ili*. Sed li ankaŭ sciis, ke ekzistis „aliulo“, al kiu li, samamaniere kiel liaj spiritaĵoj, *ŝuldis ĉion*, kaj pri kiu li mem respektoplene konfesis, ke li estas „pli granda“ ol li, kiu parolis pri li. –

Li povis pretigi ĉe li „loĝejojn“ al la siaj, kaj li pretigis ilin; *li mem vivas en sia spirita formo ankoraŭ hodiaŭ inter tiuj*, kiuj estas la filoj de sia „Patro“, ĉar tiuj ĉi homoj, ennaskitaj en la eterna spirito, estas ankaŭ *post* la procezo, kiun oni nomas la morto de la korpo, en libera posedo de siaj fortoj kaj ne, kiel „la aliaj“, subigitaj al la leĝoj de la planedo.

Ili estas la solaj veraj spiritaj „*majstroj*“ sur tiu ĉi tero, la *lumantoj de la pralumo*, la vivantaj portantoj de la eterna „*Christos*“-spirito, la transformiloj de eterna, dia saĝo en terhoman komprenkapablon...

Al kiu tio aperas nekredbla, aŭ kiu vidas sian pian ekleziokredon endanĝerigita per tio, tiu pridubu ĝin; sed li neniel povos ŝanĝi la al li nekonatan fakton.

La miloj el ĉiuj „kristanaj“ kredkomunumoj, kiuj en sia interna animkulturo leviĝis super la tro fervora ekleziismo kaj kredas senti la realan *ĉeeston* de sia majstro, *ne estas subfalintaj al eraro!*

Sed oni gardu sin, kiel mi jam diris, kontraŭ la supozo, ke la lumantoj de la pralumo, *inter kiuj la majstro el Nazareto vivas ankoraŭ hodiaŭ en sia spirita formo sur tiu ĉi tero*, povas esti egaligataj al la „majstroj“, pri kiuj rakontas certaj skriboj nomataj „teozofiaj“, aŭ eĉ al la supre menciita „granda skolo de la scienco“, kiu estis kreita en Ameriko kaj, por ĉiu vidanta, portas sur sia frunto la stampon de neaŭtentikeco, malgraŭ ĉiuj bombastaj, pseŭdomoralaj deklaroj de sia inventinto, intertempe demaskita.

„Sed venos *falsaj* kristoj kaj *falsaj* profetoj, kiuj faras signojn kaj mirindaĵojn, por ke ili delogu ankaŭ la *elektitojn*, se tio estus eble.“ –

„Ĉar la filoj de *tiu ĉi mondo* estas en sia maniero *pli prudentaj* ol la filoj de la *lumo*.“ –

La „*filoj de la lumo*“, la veraj reprezentantoj de la „*teozofio*“ sur tiu ĉi tero, estas vere „*sciantaj*“ homoj, sed ilia scio estas de *alia* speco ol la scio de iu ajn *scienco*.

Spite al ĉiu rajtigita dubo mi devas konfesi, ke *ekzistas* tia sekreta „scio“ por tre malmultaj sur tiu ĉi tero.

Temas pri „scio“, kiu baziĝas sur *certeco rezultanta el praktikado* kaj kiun atingas neniu, kiu ne havas la *denaskan* kapablon *praktiki* ĝin, ĉar ĝi ne estas sciado „*de*“ io, aŭ scio „*pri*“ io, sed konsistas nur en permanenta *agado*: – en konscia, viva *unuigado kun la objekto mem de la scio*.

La hinda saĝulo Patânjali diras pri tio laŭsence jenon: „Kiel akvo *alprenas* la *formon* de la ujo, en kiun oni verŝas ĝin, tiel la spirito de la jogano *alprenas* la *formon* de la objekto, kiun li volas eksciante penetri.“ (Ke li per tio ne celas la „*joganojn*“ sur stratoj kaj ĉe temploj, estas memkompreneble.)

La stato de tiuj kapablaj atingi tiun „scion“, povas esti nomata per la vortoj: „*scianta per memtransformado*“.

Krom tiu ĉi spirita „scio“ ekzistas „instruo“, kiu ne povas esti „instruata“ per vortoj, – kiu neniam *povis* esti skribata en libro, ĉar ankaŭ ĝi estas alirebla sole al la memspertado, – kaj kiu, ekde la plej malnovaj tagoj de la homa animalo vekiĝinta al *homeco*, estis *spirite plutransdonata* de majstroj „*sciantaj per memtransformado*“.

Ankaŭ por *ricevi* tiun ĉi sekretan „instruon“ oni devas esti taŭga laŭ sia naturo, sed ja *pli* da homoj estas taŭgaj por rice-

vi *tiun* ĉi specon de instruado, ol naskitaj por sciado per *memtransformado*.

Ekzistas plej interna, sekreta regno de la spirito kaj de spiritaj potencoj, en la *spirita* regiono de nia planedo, al kiu ĉiuj vivantaj sur la tero ŝuldas *tion sian plej bonan*.

Ekzistas eterna *antaŭvivo* antaŭ la eniro de la homspirito en tiun ĉi mondon de la videbleco, kaj ekzistas eterna *pluvivo* post la „morto“ de la tera korpo.

Ekzistas spiritaj „mirakloj“, kiuj eklipsas eĉ ĉiun orientan fabelon, kaj tamen estas realaĵoj.

Sed ĉio, kio *povas* esti dirata pri tiuj ĉi aferoj per vortoj de homa lingvo, kaj kio fluis tra sublimes hierarkio de spiritaj estaĵoj el la „pralumo“ malsupren ĝis la „lumantoj“ surtere kaj tra ili en la kanalojn de homaj lingvoj, estas *nedireble malmulta* kontraste kun tio, kion tiu „*scianta per memtransformado*“ ŝuldas al sia *spertado*, kiu rajtas diri pri si, kiel la majstro de la evangelioj: „Ĉio, kion la *Patro* havas, estas *mia*.“ – „Sed mi kaj la *Patro* – estas unu.“

La komuneco de la malmultaj „sciantaj per memtransformado“ estas la prezentaĵo de la eterna „*Christos*“ sur tiu ĉi tero, kaj la majstro de la evangelioj estas unu el la plej altaj filoj de tiu spirita komuneco de la lumantoj de la pralumo, kiuj solaj *konas* la „*Patron*“ kaj do povas fari, kiel la „*Patro*“ instruas al ili.

La klerikoj de lia tempo nomis la spiritan majstron el Nazareto „manĝegulo kaj vindrinkulo“, ĉar ili ne povis kompreni, ke homo, kiu venis „el Dio“, tiel vivas kun „pekuloj“, sen malestimi la donojn de tiu ĉi tero.

Ili sciis nenion pri tio, ke en li „la regno de la ĉieloj“, en kiu li spirite vivis, estis *alproksimiĝinta*, mezen de la vivo de

la tero, kaj estis fremda al ili la ekkono de Petro: „Sinjoro, al kiu ni iru? – *Vi havas vortojn de vivo!*“

Sed al la „filo de Dio“ de la evangelioj *neniam* venis la penso, rigardi sian homan personecon kiel la *solan* portanton de tiu fileco sur la tero.

Nur pli malfruaj ekzegezistoj miskomprenis liajn vortojn en tiu maniero, kaj tordis kaj misinterpretis ilin en *sia* senco.

Sennombraj estas la eraroj originintaj el la neekkono de la *Christos-mistero*, kaj oni estus povinta facile preventi iun aŭ alian eraran instruon, se oni komprenus la parolon: „*Mi estas la pordo; se iu tra mi eniras, tiu estos savita.*“ –

Tiel la „ŝtono, metita kiel ŝtono bazangula,“ estas „forĵetita de la konstruantoj“, kaj la homoj serĉas sur *malĝustaj* vojoj, ĉar la vojo, kiu estas „*vero*“ kaj „*vivo*“, ŝajnas al ili ne irebla.

En nia tempo ekŝajnis al la mondo kiel ordono de la justeco, ke la virino estu *samrangigata* al la viro, kaj la admono de vera spirita disĉiplo de lia majstro – disĉiplo ricevinta sian scion per „spirita transdonado“ – : ke la virino „silentu“, ke ŝi *ne instruadu* en la eklezio, ĉar ŝi *nekapablas* fariĝi scianta, ĉu per „spirita transdonado“, ĉu per „memtransformado“, estis priridata kiel „antikviĝinta kaj malinda koncepto pri la esenco de la virino“ kaj rigardata kiel malestiminda.

Sed ĉiu, al kiu doniĝis „scio“ per „spirita transdonado“ aŭ per memtransformado, devas, kun la plena pezo de sia devoliganta ŝarĝo da ekkono, malgraŭ ĉia adorado de la virino, baziĝanta sur sankta respektigo antaŭ la „esenco de la virino“, *konfirmi* la vortojn de Paŭlo, kiuj staras pravigitaj *eĉ hodiaŭ*, kaj *neniam* povas perdi sian validecon eĉ post jarmiloj.

Oni ne vane faris en Hindujo la *lingamon* kaj en antikva Helaso la *faluson* plej sanktaj spiritaj simboloj, kaj eĉ la homoj leviĝintaj nur malmulte super la *ekzotera* scio de la antikvaj aziaj kultoj al pli alta *kompreno* tamen ekkonis, ke oni povas *posedi* certajn sekretajn, altajn spiritajn fortojn *nur tiam*, se oni kiel tera homo posedas *reale* tion, kion tiuj simboloj reprezentas. Formoj de androgino ĉiam estis ekskluditaj el eĉ la plej eksteraj „misteroj“, kaj la virino estis allasata nur al la *antaŭŝtupoj de ĝenerala instruado*, dum nur la *viro* povis fariĝi „inicito“, kvankam oni volonte donis ĉiutempe ankaŭ al virinoj tion, kion ili kapablis *porti*. (Degenerintaj misterokultoj, kiuj akceptis *virinojn* kiel membrojn, povis fari tion nur pro tio, ke la *vera* mistero estis profanita de ili kaj tial oni jam antaŭ longe forprenis ĝin de ili.) Ĉiuj plej altaj misteroj en la plej sublima senco de la vorto – indifere, en kiu *formo* ili aperis en la ĝisnuna historio de la homaro, – esence estas puraj, *spiritaj seksomisteroj*, kaj „kundalini“, la spirite transformita forto de generado, ne vane estas sankta por la hindoj kiel la plej alta el la joganaj fortoj, – kvankam oni ne serĉu la spertulojn de tiu transformado inter la joganoj, kiujn la vojaĝanto renkontas.

Ĉiu praktikado de *spiritaj* fortoj bezonas korelativajn *kor-pajn* organojn, por entute povi evidentiĝi en tiu ĉi tera vivo.

Femala spirita „majstro“ estas *kontraŭdiro en si mem*, ĉar virino ne *povas* plenumi la korpa-spiritana kondiĉon por la *praktikan akiradon* de la „*povo scii*“ de spirita majstro, – ĉar tio postulas la distingan kaj nedifektitan *masklan* seksecon. –

Virino povas esti naskita kiel *somnambulo*, kiel *viziulo*, sed ŝi *neniam* povas fariĝi „inicito“.

La virino atingas sian spirite *plej altan* ŝtupon senescepte nur en *postsurteraj* statoj per sia kunfandiĝo, sia unuiĝo kun

*vir*polusa homspirito diece transfigurita, kiu portas ŝin *en si mem*, en mistera unuiĝo – kie ŝi estas kvazaŭ ŝirmita en tabernaklo, envolvita en amo – tra la senfineco de la spiritaj sferoj.

Oni rigardu la diversajn *tipojn de viro* en la evangelioj, ekde la majstro ĝis la plej distanca el liaj disĉiploj, kaj komparu kun ĉiuj tiuj viroj kaj ilia potenca parolo – post ilia maturiĝo – la *figurojn de virino* priskribitajn en la evangelioj, por kompreni, en kiu pozicio *sola* la virino povas trovi sian lokon, se la *Christos-mistero* de la viro efike tuŝu ŝian ekziston.

La du polusoj de sekseco havas *eternan* naturon kaj etendiĝas supren en la plejinternon de la *pralumo*.

Kontraŭe al populara pseŭdosaĝo, *virino neniam estis viro* „en pli frua enkarniĝo“, *neniam ŝi povus fariĝi viro* „en pli malfrua enkarniĝo“.

Tio, kio surtere hodiaŭ estas „viro“, estis *ĉiam*, eĉ antaŭ eternoj, *vir*polusa en *origina spirita naturo*, kaj tio, kio surtere hodiaŭ vivas kiel „virino“, eterne estis *virin*polusa el la *virina* esto en la dieco, kiu estas „viro“ kaj „virino“.

La absurda supozo, ke la poluseco de la sekseco baziĝas nur en tio fizika kaj povas *ŝanĝiĝi*, montras absolutan nesciaron de la primaraj leĝoj de la spirito, en kiu ĉia polusa sekseco, ankaŭ tiu aktivanta en la tuta nehoma *fizika* mondo, *ekzistadas ekde antaŭ eternoj*.

Ke kelkaj virinoj deziras „prefere esti viroj“, baziĝas nur *en ilia virina spirita naturo*.

Se ili iam estus „*estintaj*“ viroj, tiu deziro estus fremda al ili.

Krome, tio kio sola „reenkarniĝas“ en normalaj okazoj, estas nur la kompleksoj de pli malaltaj *animo-elementoj* (*ani-*

meroj) ne saturitaj, kiuj ree kaj ree aperas en la animo de novaj homoj, ĝis la *impulso*, per kiu ili estis *formataj* en pli frua homo, definitive elĉerpiĝis.

Ili certe povas esti transdonataj de viroj al virinoj kaj de virinoj al viroj, sed *sen* ŝanĝi la specifan seksecon de siaj respektivaj portantoj.

Sed ĉiu homo estas tute *unika* emanaĵo el eterna spirito „ŝarĝita“ per volo al individuigo, kun vir- *aŭ* virin-polusa tensio, – *kvankam* en viro vivas ankaŭ io virina, kaj en virino io vira, – kaj homo atinginta tie ĉi surtere la finon de sia vivojo, normale *neniam* revenas sur la teron kiel pli malfrua homo.

La okazoj *nenormalaj*, en kiuj *povas* fakte estiĝi „reenkarniĝo“ en la plumpa senco de ekzotera instruo: – *memmortigo*, *morto en frua infaneco* aŭ *sur tute brutiĝinta* spirita ŝtupo – estas preskaŭ sensignifaj por tiu regulo kaj tie ĉi devas resti ekster konsidero, ĉar ankaŭ en ili *neniam povas* estiĝi ŝanĝiĝo en la seksa poluseco ekzistanta ekde antaŭ eterneco.

Tio, kion oni hodiaŭ nomas „teozofio“, certe diras *ion alian* pri tiuj aferoj, kaj la anoj de modernaj „sekretaj instruoj“ vidos en miaj vortoj atakon kontraŭ ilia plej kara dogmo.

Sed *kiu* donis tiujn „sekretajn instruojn“ en tia abundo al la mondo?

Ĉu ĉiuj tiuj instruoj, ĉu ĉia tia laŭdira „senvualigo“ de sekreta saĝo, katenanta tiom da mensoj ekde antaŭ duona jarcento, ne devenas de *virino*?

De virino tamen certasence „genia“, kiu povis ekkapti kelke da vera saĝo el tio, kio venis al ŝi per ŝia somnambula dispozicio, sed kiu bedaŭrinde estis ankaŭ devigata lasi sin anime treege *misuzi* de *viraj regantoj de fortoj*, ĉar ŝi, kiel vi-

rino, simple ne *kapablis* rezisti al tiaj fortoj, kaj kiun oni fine, de flanko aŭtoritata, devis irigi en malĝustan direkton, ĉar alie ŝi, ne povante ekkoni la konsekvencojn de sia agado, estus fariĝinta „danĝero por la mondo“.

Bedaŭrinde estis *virino*, kies ambicio *volis* doni ion, kion estus povinta doni nur unu el tiuj, kiuj „scias per memtransformado“, sed kion tia homo *neniam* estus doninta en la formo dezirita de ŝi.

Oni hodiaŭ diras: „Sed ŝi ja estis nur instrumento en la mano de ŝiaj ‚majstroj‘, al kiuj ŝi memdone servis!“

Certe! – Tio bedaŭrinde estas prava, kaj ĝuste tial ŝia dono, prezentita en orgojlo miksitita kun blinda fido, fariĝis dono fatala.

En ŝiaj skriboj troviĝas fragmentoj de vera, eterna saĝo, arabeske traplektita de la superstiĉo de ĉiuj jarcentoj kaj ĉiuj zonoj.

En ŝiaj skriboj troviĝas antaŭsentoj de plej alta ekkono, ĉirkaŭondata de nebulaĵo de ŝajna „scio“, originanta el kavoj de plej malluma homa erarado kaj rigardata de tiuj, kiuj donis ĝin al ŝi, kiel „sankta“, ĉar ĝi estiĝis nur per fordono de tio plej sankta, kion la homa spirito posedas.

En ŝiaj skriboj troviĝas spuroj de praantikvaj spiritaj vojoj, kovritaj de parodiitaj provoj ekspliki ilin, kiujn oni donis al ŝi por trompi ŝin.

La *fontoj* de ŝiaj inspiroj estas de treege diversa valoro, kaj al tio ĉiukaze respondas la valoro de tio donita de ŝi.

La malfeliĉa virino devis pro sia nenorma somnambulmedia dispozicio – estante kvazaŭ speco de vivanta „radio-

ricevilo“ – enpreni ĉion, kio atingis ŝin el la tuta mondo kaj transe.

Mankis al ŝi, kiel virino, *ĉia ebleco* mem fari sekuran kontrolon de la *fontoj*, ĉar ŝi ne *povis* posedi la necesan kapablon por tio.

Fidoplene ŝi kredis je la „elstara saĝo“, transdonita al ŝi inter alie de flanko, kiu eĉ hodiaŭ trovas strangan plezuron en la parodiado de „la saĝo de okcidentuloj“, – kiu eĉ hodiaŭ en „spiritismaj sesioj“ kaj en aliaj okazoj, se ĝi povas ekhavi eŭropanon kun mediuma dispozicio, utiligas ĉiujn okultajn artojn por tiu ĉi celo; – sed tio eble ŝajnas tre stranga aŭ nekredebla al tiuj, kiuj ne konas tiun regionon de homa farado surbaze de propra supersenseca sperto, kvankam ili eble mem jam fariĝis spirite viktimoj de tiaj homoj, sen eĉ nur iomete ekkoni tion.

En plena pasiveco ŝi subfalis al la influoj de alia sekreta sekto, disvastigita tra la tuta Azio kaj radikanta plej profunde en kelkaj regionoj de Tibeto, sekto, por kiu estas *religia devo* utiligi ĉiujn okultajn rimedojn abunde konatajn al ĝi por damaĝi eŭropanojn kaj, se eble, neniigi ilin.

Krome ekzistis influoj de noblaj revemuloj, kiuj celis savi ŝin el tiuj katenoj, sed *mem* havis por doni nur *senvalorajon* anstataŭ *oro*, kaj kiuj krome agis kontraŭ ŝi en dubinda maniero per tio, ke ili volonte lasis ŝin en la naiva fido, ke certaj *aliaj* manifestaĵoj *fizikaj*, kiuj tre impresis ŝin, ankaŭ devenis de *ili mem*, kaj tiam senhezite *uzis* tiajn manifestaĵojn por *siaj* celoj.

La turmentita virino estis troe inklina, en senkritika vanto, rilati *ĉiujn* manifestaĵojn al la *plej alta* kaj *plej nobla* fon-

to, kies *ekziston* ŝi estis *ekkoninta* en somnambula maniero, sed kun kiu ŝi *neniam* venis en *kontakto*.

Ofte okazis vera infera festo de la plej diversvaloraj okultaj influoj sur la ekscitebla animo de tiu ĉi bedaŭrinda virino, kaj se sinjoro *Hodgson* estus sciinta iom pri la realaj okazaĵoj ĉirkaŭ ŝi, tiam la „*Proceedings of the Society for Psychical Research*“ ampleksus kelkajn pliajn numerojn, kiuj apenaŭ trovus ion simile interesa en la tuta mondo. Tial li povis malkaŝi nur ŝiajn eksterajn *provojn de trompado*. (Vidu la menciitajn raportojn.)

Mi jam diris, ke *krome* oni estis, je flanko *aŭtoritata, devigata igi konfuzi en maniero nereakta* ĉiujn komunikojn al tiu virino, kiuj rilatis al certaj aferoj, kies sekretigo estas plej strikta devo de ĉiu scianta pri ili, se li ne volas, ke al la horora abundo de detruaj inventaĵoj, pri kiuj disponas la okcidenta „kultura“ homaro, estu aldonataj la plej teruraj okult-spiritaj fortoj de eksplodo kaj dissolvado. –

(Kiel fajro kaj elektro funkcias kiel bonfaraj servantoj de la homo, sed ankaŭ povas neniigi ĉion, kio estas valora por la homo, tiel la menciitaj fortoj agas en la mano de respondecaj *vokitoj* por la *beno* de la homaro, dum en la mano de *ĉiuj aliaj* ili fariĝas *neniigaj fortoj*, eĉ se tio kontraŭas la volon de tiuj aliaj.)

Oni komprenos, ke el ĉiuj tiuj influoj kaj kontraŭinfluoj *povis* rezulti nenio alia ol la praarbara densejo trateksita de la plej strangaj volvoplantoj, kiu vaste etendiĝas en la skriboj kaj raportoj pri la vivo de la stranga virino.

Sed el la strangaj orkideoj kaj ebrige odorantaj ĝangalaj floroj de tiu tropika praarbaro estas plektitaj la kronoj, kiujn oni laŭopinie devis solene oferi sur la altaroj de la templo de

la „majstroj“ ekde la surtera vivo de la viziuleca, malfeliĉa somnambulino ...

Sur la instruoj de tiu ĉi virino, tiom ege mistera por eksteraj okuloj, baziĝas preskaŭ ĉio, kio ekde ŝia tempo uzurpis por si la nomon „teozofio“.

Viroj, kiuj per sia *propria* somnambula dispozicio sentis sin altirataj al tiu virino, al ŝiaj skriboj aŭ al la raportoj pri ŝia vivo, subfalas al la samaj influoj kiel ŝi, kaj tiam „konfirmis“ en „spirit-sciencia esplorado“ (termino uzita de ili mem) tion, kion ilia profetino ardanta en subtermondaj bruloj estis diskoniginta.

Virinoj kun alte sentiva dispozicio kaj plenaj de plej pura entuziasmo enprenis en sin tiom plene la imagaron de sia fama antaŭulino, ke ili baldaŭ lernis „vidi“ ĉion en la sama maniero, kiel *sinjorino Helena Petrovna Blavatskij* tion volis, kaj je ĉiu milda dubo pri iu aserto bazita sur ŝia aŭtoritato aperis al ili kiel krimo kontraŭ ĉiu spirita vero.

Tiel estis fine kreata grundo, sur kiu povis troe prosperi la plej diversaj spiritaj parazitoj, kaj iliaj fokusoĵoj de inflamo povis nemalhelpate pli kaj pli disvastiĝi, ĉar estis treege facile, apogi ĉiun instruon kiom ajn abstruzan per diraĵoj trovitaj en la skriboj de la „servantino de la majstroj“, aŭ prezenti ĝin kiel plej novan rezulton de la „spirit-sciencia esplorado“.

Aparte la *laste* menciita metodo ĉiam efikis, ĉar la esprimo „spirit-sciencia esplorado“ sonis tiom *fidinda* al la okcidentulo kutimiĝinta al la severe ekzaktaj esplormetodoj de la natursciencoj, ke li senhezite akceptis de aparte lertaj nocioĵonglistoj „rezultojn de esplorado“, kiuj *en la plej favora okazo* estiĝis en la *memhipnoto* de la „spirit-esploristoj“ kaj nun

kaŭzis fatalajn *kolektivajn hipnotojn*, prosperigitajn de diversaj flankaj influoj.

Ĉiu, kiu eĉ nur tolereble bone konas la historion de la angla-hinda „teozofia“ movado kaj ties sekvoj, facile trovas ekzemplojn, al kiuj miaj vortoj rilatas.

Ke tiu movado povis disvastiĝi ankaŭ en Hindujo, ne estas favora atesto pri la juĝokapablo de modernaj, duone eŭropanigitaj hindoj. Sed certe *ne* povas esti taksata *pli alte* la juĝokapablo de multaj *eŭropanoj*, kiuj grandare postkuras ĉiun azian trompiston lertan en negocado kaj vojaĝantan tra la tuta mondo, kondiĉe ke la laŭdira „viziulo“, „majstro“, „jogano“, aŭ kia ajn li sin nomas, portas ekzotan kaftanon aŭ ion similan, kaj aldone eĉ havas malhelan haŭtkoloron.

Kiu kapablas legi la skribojn de la *fondintino* de tiu movado ne nur kun kredanta miro kaj respektoplena, pozitiva antaŭjuĝo, – kiu aŭdacas *kritike* traekzameni tiujn skribojn kaj kiu entreprenas rigardi la vivon de la aŭtorino kun la sama kritiko, tiu baldaŭ kapablos mem ekvidi konfirmitaĉion, kion mi diris pri la *fontoj* de ŝia inspiro. Li baldaŭ ankaŭ malkovros, ke provo – siatempe kaŭzanta sensacion – prezenti la malfeliĉan virinon kiel la viktimon de *eŭropaj* okultistoj, baziĝis sur plena malkapableco trapenetri la *realajn* aferojn.

Mi ne kredas, ke, inter homoj certagrade juĝokapablaj, mi devas ankoraŭ doni klarigan informon pri la fonto de *mia* scio en tiu ĉi afero.

Post ĉio, kion mi ĝis nun tie ĉi prezentis, oni eble rifuzas kredi al mi, se oni – ekzameninte tion, kio estas facile ekzamenbla – ankoraŭ havas la dubindan kuraĝon por fari tion. Sed ke mi, estante konscia pri mia respondeco, parolas el *ab-*

soluta sciocerteco, probable estis ne tute pretervidata ankaŭ de tiuj, kiuj ŝatus, por siaj propraj celoj, ke tiuj ĉi vortoj neniam estus skribitaj.

Ankaŭ *mi* estus preferinta *ne* skribi ilin kaj anstataŭe kviete gardi mian scion, se mi ne estus *devoligita* skribi ilin.

Mi parolas en plena akordo kun tiuj, kiujn sinjorino *Blavatskij* somnambule *suspektis*, – pri kiuj ŝi *kredis*, ke ŝi estis en kontakto kun ili, sed kun kiuj ŝi *neniam estis en ia „okulta“ aŭ nur plej ekstera kontakto*.

Nia scio pri la afero ne baziĝas sur iaj eksteraj observoj, sed rezultiĝas el speco de perceptado, por kiu ne *povas* ekzisti vualoj kaj kovraĵoj, kiom ajn densaj ili eble ŝajnas al niaj *eksteraj* okuloj.

En la nomo de tiuj, kiuj estas „sciantaj per memtransformado“ kaj kies kvieta, kaŝa spirita komuneco jam transvivis multajn jarmilojn, mi deklaras, ke *sinjorino Helena Petrovna Blavatskij eraris*, kiam ŝi *kredis*, ke ŝi iam venis en *rektan okultan aŭ eksteran kontakton* kun iu el ni, kaj ke ŝi havis absolute *nenian scion* pri tio, *kiuj* reale estis iliaj inspirantoj, kies instruojn ŝi trovis bone nomi „teozofio“, per la arbitra ŝanĝo de nomo de la societo fondita de ŝi, societo kiu *antaŭe* havis nomon esence *diferencan*, malkaŝe nomiĝinte: „spiritisma“.

La instruoj diskonigitaj de ŝi estas stranga miksaĵo el plej heterogenaj imagoj de ĉiuj tempoj kaj popoloj, plus personaj aldonoj de la editorino kaj ŝiaj ekstere helpantaj anglaj kaj aliaj okcidentaj amikoj, kaj havas tiom malmulte komunan kun *vera* „teozofio“, – en la senco en kiu la vorto estis uzata dum jarcentoj, ekde la tempo en kiu ĝi disvastiĝis fare de la

apostolo Paŭlo, – ke temas pri *falsaĵo de nocio*, se oni signas ilin per tiu ĉi nomo.

Vera „teozofio“ certe kapablas vuali sin per la *plej diversaj* religiaj vestaĵoj, sed mantelo kunflikita el la restaĵoj de sacerdotaĵ vestoj de ĉiuj religioj neniam povas doni al sia portanto „teozofion“: – scion pri Dio aŭ ekkonon de Dio.

Oni povas apliki la esprimon „diskonigantoj de vera teozofio“ al *Laocio*, al la grandaj hindaj kaj tibetaj religiaj instruantoj, al la apostolo *Paŭlo*, kaj al la aŭtoro de *la evangelio laŭ Johano*, same kiel al la saĝoebriaj islamaj „sufioj“ en la antikva Persio, al la „lasta hinda profeto“ *Ramakrishna*, la mistikaj filozofoj *Tauler* kaj *Majstro Eckhart*, aŭ al *Jakob Böhme*, kiu ankoraŭ ne estas plene komprenita, – sed estas nepravigeble nomi „teozofio“ la rezultojn de okulta obsedito, kiuj konsistigas la „sekretan instruon“ de sinjorino *Blavatskij*.

La vera merito de tiu ĉi stranga virino konsistis en tio, ke ŝi donis al la okcidenta mondo indikojn pri la *ekzisto* de fonto de saĝo en la „plej interna oriento“, kiun ŝi, kiel Moseo la promesitan landon, *suspektante viziis*, sed kies akvo neniam tuŝis ŝiajn impete postulantajn lipojn.

Kiel oni povas *reale* alproksimiĝi al tiu pura fonto, kiu „fluas de altaj montoj“, mi ree kaj ree montris en miaj skriboj.

Kiu volas atingi tiun fonton, devas serĉi *en sia propra interno* kaj *tie ĉi* supreniri la „altan vojon“.

Li trankvile restu en la kredoformo konata al li de sia juneco kaj „traduku“ al si tion, kion mi donas en miaj skriboj, en la nociojn antaŭ longe formitajn de tiu kredoformo, bone konsiderante, ke mi skribas *antaŭ ĉio* por homoj, kiuj *ne* tro-

vis sian kontentecon en la nuntempaj kredoformoj kaj tamen strebas por *atingi sian vivantan Dion*.

Kiu pensas, ke li bezonas pluan instruiĝon, kaj ankaŭ kapblas legi inter la linioj, tiu sobramaniere esploru la skribojn de la supre menciitaj filozofoj, al kiuj plenrajte apartenas ankaŭ *Angelus Silesius* kaj *Thomas à Kempis*.

Li elektu al si tion, kio parolas al lia animo, kie ajn li trovas ĝin, sed li evitu la eraron, ke „la scio de la animo“ (– la vera „teozofio“ de ĉiuj popoloj kaj tempoj –) estas ia „scio“ en la senco de „*scienco*“; kvazaŭ tiu ĉi „scio de la eterna animo“ bezonas progresigon fare de ekstera socia unuiĝo aŭ povas esti akirata per la studado de dikvolumaj libroj. – Sed estus laboro de tuta vivo, se iu volus meti al si la taskon *konatigi sin* kun ĉiu ekzistanta skribaĵo de homoj *vere* spirite vivantaj, kaj vivo tiumaniere konsumita eĉ kondukus *tre foren* de la vojo de l' animo al lumo. Ĉiuj, kiuj dediĉis sian vivon al tia esplorado, fine ĉiam forlasis tiun ĉi teron en plej profunda anima mizero.

„Kiu serĉas, tiu trovos, kaj kiu frapas, al tiu estos malfermite“: – sed nur konstanta *persisteco* dum serĉado kaj frapado *en la propra interno* kondukas al la *celo*, kiun la majstro de la evangelioj montris al siaj elektitoj, dirante:

„Kiu kredas al *mi*, tiu kredas ne al *mi*, sed al *tiu*, kiu min *sendis*.“

„Ĉar mi ne parolis de mi mem; sed la *Patro*, kiu *sendis* min, ordonis al mi, *kion mi parolu kaj instruu*. Kaj mi *scias*, ke Lia ordono venas el eterna *vivo*. Kion do mi parolas, mi parolas tiel, kiel la *Patro* diris al mi.“

En tiuj ĉi vortoj li parolas por ĉiu, kiu *konas* la „Patron“, indiferente ĉu tio lia tereca vivas en Hindio, Ĉinio, Tibeto aŭ nun en la moderna Eŭropo. La vortoj de ĉiu, kiu instruas, kiel

la „Patro“ *ordonis* al li, kondukas al *vera* „teozofio“, kiu estas identa kun la prae donita, mistera spirita „*kristanismo*“ el la eterna „Kristo“ en la pralumo, kies plej subluma templo sur la tero troviĝis sole en la „plej interna oriento“, longe *antaŭ* ol la majstro de Nazareto, kiel enmetito en tiu ĉi templo, instruis la spertadon de la eterna amo. Tie ĉi la templo *restos* ekzistanta ĝis la lasta tago sur tiu ĉi tero, kaj kun ĝi por *ĉiuj* tempoj tiuj eterne komisiitaj, kiuj estas enigitaj en ĝi kiel „*pastroj laŭ la ordo de Melkicedeko*“: – la „ordo“, kiun tio eterna metas *al si mem* en la tempo.

Nur al tiuj treege malmultaj teraj homoj, kies eterna spirito ricevis el la „*sóphia*“ – *la saĝo* de Dio, estanta la eterna *virina* poluso de la substanca spirito – la konscioformon por tio taŭgan, estas *eble* laŭ tiu ordo *peri* al siaj teraj kunhomoj la ekkonon kaj la scion pri la „*sóphia*“ en Dio.

Pri la tri ŝtupoj

Ĉirkaŭite de mondo malkaŝiĝanta nur al *fizikaj* sensoj, – *mem* estante, laŭ la ekstera korpo, parto de tiu ĉi mondo, – la homo kaj lia ekzisto tamen ne limigas sin al la vivo en tiu ĉi mondo.

La esploranta pensado penetras profunde en la internan aktivadon de tiu ĉi mondo, sed *io multe pli profunda* de tiu aktivado restas al ĝi *neesplorita*.

Misteraj fortoj kreas formojn en la plejinterno de tiu ĉi mondo, kio estas ekkonebla nur al malmultaj homoj. Sed ree kaj ree homoj lasas sin delogi per la iluzio, ke ili povas „*primajstri*“ tiujn fortojn, dum tiuj fortoj servas sole al *siaj* iminentaj leĝoj, kaj pli aŭ malpli frue devas *neniigi* ĉiun, kiu malsaĝe arogas al si voli deturni ilin de ilia vojo.

Tiu ĉi *okulta regno de la naturo*, pri kiu mi tie ĉi parolas, fine alportis al neniu, kiu eniris ĝin, ian ĝajnon.

Kiel muŝo en la reto de araneo estas kaptata kaj elsuĉata, tiel estas kaptata, ĉirkaŭŝpinata kaj elsuĉata ĉiu, kiu kuraĝas antaŭeniri tro foren en tiun regnon.

Kaj kiel granda kaptita insekto vibrige skuas la reton de araneo, tiel ankaŭ la troaŭdaculo skuas je la teksaĵo de *okultaj fortoj de la naturo*, kaj liaj anoj staras mirante kaj diras: „Vidu, kiom bone li primajstras la okultajn fortojn!“

Ili ne suspektas, ke li movas nur la fadenojn, kiuj tenas lin *kaptita* kaj baldaŭ *tute katenos* lin por lin detruiri. Destinite *perei*, li ankoraŭ delogas *aliulojn* al la *vojo de neniigo*.

Sed la ekzisto de la homo limiĝas nek al la naturo perceptebla per la sensoj, nek al la *okultaj* fortoj en la plejinterno de tiu ĉi naturo, kvankam li mem povas manifestiĝi nur kiel *efiko* de tiuj *okultaj* fortoj, – kvankam li *mem* prezentiĝas kiel *okulta* forto.

La homo de la tero certe estas *mem* unu de tiuj *okultaj* fortoj de la naturo, sed li estas *samtempe* ankoraŭ io *alia*!

Mi bone povas kompreni, se oni diras: „Ne ekzistas io *supernatura*!“ – „Eĉ tio plej nekomprenebla, kion povas renkonti niaj terecaj sensoj, estas *ene* de la limoj de la naturo!“ – kaj se oni tiumaniere volas gardi la *unuecon* de ĉia vivo por la propra kompreno kaj interpreto.

Sed per tiaj vortoj ni tamen trompas nin mem, ĉar *vere* ekzistas io, kio havas *tute alian* esencon ol ĉio, kion ni ĝenerale, kaj eĉ en la *plej vasta* senco, rigardas kiel „la naturon“.

Vere ekzistas io, kio *ne* estas *ene de* la okazado, kiun ni ekkonis kiel „laŭleĝe kondiĉita“, – kiu obeas *tute aliajn* kondiĉojn ol ĉio, kion ni ekkonas kiel fizikan „naturon“.

Se ni volas rigardi tion ĉi plene alispecan kiel parton de la „naturo“ en la komunlingva senco, ni *interkonfuzas en nia imago* du aferojn, kiuj *reale* estas *klare apartigitaj*, malgraŭ la unueco *superordigita* al ili.

Tiu ĉi konfuziĝo estas favorata per la neekkono de la eternaj *praesto-elementoj* de la naturo, „okultaj“ por la ĝenerala ekkonkapablo, kiuj estas tio sola *reala* en la eterna ŝanĝiĝo de la eksteraj fenomenoj.

Nur tre malmultaj sur tiu ĉi tero suspektas, kion tiuj elementoj kapablas efiki, – ke multo, kion oni nomis „supernatura“; estas klara efiko de tiuj elementoj.

Tiel restas sur bona bazo, se oni rigardas eĉ plej misteran okazadon *kiel ankritan ankoraŭ ene de la „naturo“*, sed ekzistas, *fore trans la plej misteraj procezoj ene de la okulta fizika „naturo“*, regionoj de okazado, kiuj restas plene ne ekkonitaj, tiom longe, dum oni opinias, ke ili estas en daŭra interrilato kun la eblecoj de okazado, kiuj aperas al ni kiel bazitaj sur *naturleĝoj*. –

Du vortoj estas je mia dispono por nomi tiujn pli altajn regionojn: *„animo“* kaj *„spirito“*.

Dum la lasta tempo ekzistas multaj, kiuj donas pli altan rangon al la vorto *„animo“*, sed mi pensas, ke la genezo de la responda vorto en la germana lingvo rajtigas min elekti ĝin kiel nomon por la *„fluadanta“* luma regno kuŝanta meze inter tio, kion oni kutime nomas la fizika *„naturo“*, kaj la pra-funda, esenca regno de plej altaj fortoj kaj saĝo, kiun mi nomas la regno de la *spirito*.

La regno de la *animo* egalas al *„fluadanta maro“* de misteraj fortoj superradiataj de la regno de la spirito, kiuj superas ĉion, kio estas trovebla en la regiono de la okultaj fortoj de la fizika *„naturo“*, kaj kiuj estas *tute nedependaj* de la leĝoj, per kiuj la aktivado de la okultaj fortoj de la fizika *„naturo“* estas *determinita*.

Ankaŭ en tiu ĉi regiono de la animo la homo estas en sia propraĵo, same kiel en la fizika *„naturo“*. Ankaŭ tie ĉi *li mem* estas parto de la nemezurebla tuto, kaj lia propra animo estas komplekso el miriadoj de tiuj fortoj de la *„maro“* de la animo.

Sed tie ĉi li havas *rajton* submeti fortojn al si! Tie ĉi estas *ordono* por li lerni *primajstri* la fortojn! –

Kuŝante inter la fortoj de la fizika „natur“ kaj tiuj de la pura *spirito*, la regno de la „*animo*“ estas atingebla por la influo de ambaŭ. Sed ĝiaj fortoj *ne* estas *subigitaj* al la fortoj de la fizika „natur“!

La homo estas vokita meti sin mem, kiom li apartenas al tio malalta, en la *servon* de *tio pli alta* en si. Nur tiumaniere li povas krei al si *eternan formon*, kiel individua estaĵo.

Tial li devas reatingi, *trans la regno de la animo*, sian *spiritan praeston*, kiun li iam forlasis.

Nur *tie ĉi* li vere estas en sia „hejmlando“, kaj nur de *tie ĉi* li kapablas *eterne konservi sin*.

Tie ĉi la alta komunumo de la spirito, el kiu mi parolas, havas sian templon, kaj de *tie ĉi* venas gvidado por ĉiu homo, kiu serioze deziregas ĝin per sia agado.

Ni estas fratoj en la *spirito*, naskitaj el la pura spirito, kiuj agadis en la homaro ekde praaj tempoj, *tie ĉi* unuigitaj en sol-eco: sed „frato en la spirito“ ĉiam fariĝis al ni nur *tiu, kiun ni trovis preparita fare de la „vorto“ de la pralumo, antaŭ ol li naskiĝis*, tiel ke ni, kompletiginte lin en lia tera spertokapablo, povis konduki lin en nian mezon.

Malsaĝo ĉiutempe arogis al si atingi nin sur kaŝitaj vojoj, sed la netranspasebla remparo de eternaj leĝoj de la pura, esenca *spirito* lasas ekvidi *eĉ de malproksime* nian templon neniu, kiu en memkontenta aroganteco eble rigardas sin vokita trovi la vojon al la spirito, sen iri *la solan vojon*, kiun la spirito ekde praaj tempoj *mem* preparis al tiuj, kiuj ĝin serĉas.

„*Neniu venas al la patro krom per mi.*“ Antaŭ longa tempo povis tiel paroli unu el la niaj, kiu vere estis fariĝinta „*vojo*“, sed oni ne komprenis lin kaj faris el li – konforme al la imagaro de lia tempo – dion fariĝintan homo.

Sed li vere estis „filo de Dio“, *naskita el la pura spirito* same kiel liaj spiritaj fratoj, kaj ne kaŝis, ke en la domo de lia patro estas „*multe*“ da loĝejoj. –

Rifuzante li diris: „Kial vi nomas *min* bona? *Sole Dio* estas bona!“

Ne li estas kulpa, se volviĝas ĉirkaŭ lia nomo instruo, kiu, – origininte el antikvaj instruoj pri dioj, – kreis el li la homodion de tiu ĉi malgranda planedo.

Li certe estis pli intense traardita de la pralumo, ol tiu hinda reĝido, kiu estas konata al la mondo kiel Gotamo, la Budho, ĉar en la Budho vivis nur homo kiu lumon *akiris*, ne homo kiu estis *naskita en la lumo de la spirito*. –

Tiu budho ne *mem* estis fariĝinta „vojo“, ne *preparita* de la spirito kiel vojo. Nur lia nemezurebla amo al ĉia kreitaĵo kapabligis lin fosante eltrovi vojon, kiu kondukas al iluminiĝo, al spirita lumo, sed ne al vera *reatingo de spirita unueco kun Dio*, kvankam tiu ĉi vojo *povas* fine konduki, laŭ certaj debranĉiĝoj, al tiu celo, sed tiuokaze *ne* plu estas la *historie* konata vojo de la Budho, sed sekvas *pratempajn aliajn* vojosiĝojn.

En nia tempo oni inklinas *forviŝi* la rimarkeblajn diferencojn, kiuj akre *apartigas* disde la instruo de tiu ĉi saĝulo la vivan spiritan potencon de la majstro el Nazareto.

Oni unue devas lerni ekkoni, kiu tiu ĉi majstro *vere* estis, kiu povis diri pri si, ke li estas „*la vojo, la vero kaj la vivo*“.

Oni unue devas lerni ekkoni, kial li havis la rajton diri: „Kiu ne estas *kun mi*, tiu estas *kontraŭ* mi; kaj kiu ne *kolektas* kun mi, tiu *disĵetas*“.

Sed tie ĉi mi parolas pri la historia homo, pri kiu raportas la evangelioj, – ne pri la kulta figuro, pri kiu multaj kredas, ke ĝi estas identa kun li.

Mi ankaŭ parolas nur pri la viro, kiu kiel Gotamo, la Budho, migris instruante tra la landoj de Hindujo.

Akre apartigenda de tiuj *homaj personecoj* estas la sublima *dia estaĵo*, kiu trovas adoradon kaj honoradon ĉe la nordaj budhanoj kiel plej alta ĉiela „Budho“, ĉe la kristanoj kiel „Kristo“ en la senco de „persono en la Dieco“.

La teologia intermiksado de terhoma persono kun la *plej alta memmanifestiĝo de la eterna pralumo*: – de la eterna spirito, kiel *individua plej alta spirita estaĵo*, – ne malmulte kulpas pri tio, ke oni nek vere ekkonas, *kiu la majstro el Nazareto* estis, nek atingas la altan ekkonon de la „Logos“, de la „Vorto“, kiu estas „Dio“, de la *individuigita mem-elparolo de la eterna pralumo*.

Sed tiu ĉi individuigita mem-elparolo de la spirito estas *la eterna deirpunkto de ĉiuj spiritaj hierarkioj*, ĝis sube al la malmultaj spirite vekiĝintaj de tiu ĉi tero, en kiuj tiuj ĉi hierarkioj havas sian lastan influon, kaj kiujn ili mem preparas al si por reunigi la homan spiriton kun tiu eterna deirpunkto, en la konscio de la tera homo. Tio unua kaj tio lasta do estas intermiksitaĵ en la teologia instruo, ekkoneble nur al malmultaj.

Sur tiu alto, al kiu Gotamo, la budho, povis levi sin, la preĝo ne plu havas logike pruveblan rajton, – sed ekzistas *multe pli alta* stato, kiun eĉ la plej alta ascendo de l' budho ne atingis, kaj kiu povas esti ne *suprenirata*, sed nur „*alflugata*“ per spiritaj flugiloj, kaj en *tiu ĉi* stato de unuiĝo kun Dio

en la pura spirito, la preĝo vere fariĝas *esprimo de plej intima unuiĝo de la individua eterna spirita homo kun la pralumo*, el kiu li vivas.

Nur tie ĉi malkaŝiĝas tio, kion volas diri la vorto de la majstro de Nazareto: „Petu, kaj estos donite al vi, serĉu kaj vi trovos, frapu, kaj estos malfermite al vi.“

Kaj plue: „Kion ajn vi petos de la Patro en mia *nomo*, tion li donos al vi.“

Sed li, kiu promesis *eternan* vivon al ĉiuj, kiuj fidis al li kaj vivis laŭ lia vorto, bone sciis, ke, por kompreni lin, estas necesa pli ol tio, kion la „naturo“, nome „karno kaj sango“, malkaŝas.

Li parolas pri tiuj, kiuj estas „ekstere“, kiuj „vidante, vidas sed ne rimarkas, kaj, aŭdante, aŭdas sed ne komprenas“.

Sed *ĉiutempe* ekzistos iuj, kiuj estas „ekstere“ ...

Kiu ankoraŭ celas regadi la okultajn fortojn de la plej interna fizika „*naturo*“, kiu kondukas kiel instruanto sen suspekti, *de kie* venas al li lia laŭsupoza saĝo, kiu ankoraŭ troviĝas en profunda mallumo kaj tamen deziras esti rigardata de aliuloj kiel lumilo, kiu adoras la opinion de sia *pensado* kiel idolan bildon, kiu ne ŝatas ekiri *tiun unu* vojon al la spirito, kiu estus irebla al li, al tiu ni *ne povas* sendi la helpon de la spirito, kiom ajn profunde ni bedaŭras lin en lia erarado.

Kiu en „blinda neekkonado“ kredas, ke li estas ŝirmata en la regno de la *animo*, *sen vere primajstri la fortojn de tiu ĉi regno*: – ankaŭ tiu vokos vane por „spirita helpo“.

Nur kiu *eligas sin* el la okultaj fortoj de la tera „naturo“, scias *primajstri* la fortojn de la *animo*, kaj tiam strebas *pli alten* al la regno de la *pura spirito*, al tiu la spirito donas sian *helpon*, ĉar nur tiam tiu ĉi helpo povas esti *enprenata*, – kaj

nur al tiu, al kiu helpi *ordonas* al ni la *spirito*, al tiu ni rajtas *alporti* helpon el la fortoj de la *spirito*.

Li estas liberigata de ĉiu malalta deziro regi, kaj *en la pura spirito*, el kiu li eliris antaŭ eterneco, li reakiros sian antaŭan propran konscion.

Fariĝinte viva en la *pura spirito*, li vivos en kaj por la *amo*, sciante, ke *nenio havas ekziston en la spirito, kio estas malinda je amo*, – *nenio*, kio povus eksciti lian *malamon*. –

Jam antaŭ jarmiloj, insultema senpotenceco vane provis makuli per venena salivumo la spiritan komunumon, pri kiu miaj vortoj atestas, sed tia naŭza elĵetaĵo ĉiam refalis sur tiun, kiu volis per ĝi malpurigi nin.

Vivas kun ni en la pura spirito *tiuj eterne vivantaj*, al kiuj iam direktiĝis tiu blinda, sputanta furiozo, sed vane oni serĉus en ĉiuj regnoj de la kosma fizika „naturo“, en la regno de la *animo*, kaj en la regno de la *pura spirito* eĉ nur *lastan spuron* de ilia iama, nedireble malsaĝaj kontraŭuloj.

Nenio malpura povas atingi la eternan vivon en la pura spirito.

„Ĉar *ekstere* estas la hundoj kaj la sorĉistoj kaj la malĉastuloj kaj la mortigistoj kaj ĉiuj, kiuj *amas* kaj *faras mensoĝon*.“

„Sed feliĉaj estas la *invititaj* al la edziĝa festeno de la *Ŝafido*.“

Tiel estas skribite ekde antaŭ du jarmiloj, kaj kiu skribis tion, tiu bone sciis, de kie venis al li la *voko* por ĝin skribi; tiel ke necesas scii, ke nur malmulto el tio, kion oni al li atribuas, vere estas skribita de li.

Li parolis, kiel ne malmultaj aliaj vokitoj, pri la *samaj* aferoj, pri kiu mi hodiaŭ parolas per *aliaj metaforoj*.

La spirita komunumo, kiu malkaŝis sin al li, ĉiutempe uzis la *laŭtempajn* simbolojn.

Malsamaj en ĉiuj popoloj kaj religioj estas la *formoj* de tiu malkaŝado, sed tiu homo, kiun ĝi *atingis* en nur *unu* el tiuj formoj, havas *sekuran grundon* sub siaj piedoj! – Li iras sur la vojo, kiun la spirito preparis, *kiel ajn li nomas tiun ĉi vojon al la spirito*. En la diversaj tempoj, la plej intimaj malkaŝoj de la substanca eterna spirito estis ĉiam spertataj de spirite vokitaj homoj, eĉ en la formoj de la *Islamo* tiom strikte difinitaj de la Korano, same kiel *aŭtentika* Hinda jogano, aŭ ano de antikvaj misterioj en Helaso spertis ilin.

Kion oni plene ekkomprenu

Ĉiuj religioj en la mondo iamaniere vokas la homojn al *returniĝo*, por serĉi kaj trovi sian *spiritan prahejmlandon*, kiom ajn diferenca estas la *imago* pri tiu ĉi „*prahejmlando en la spirito*“, kiom ajn diferenca la *vojo* irenda.

Al ĉiuj religioj estas komuna la ekkono, ke en tiu spirita hejmlando ne montriĝas la sama *stato*, en kiu la homo troviĝas ĉi tie surtere, kaj ke tiu nova stato estas atingebla nur per ia *nobligo de la farado*, per *subordigo* de *malaltaj* impulsoj sub la *pli altaj* kaj *plej altaj*, troveblaj en la homo.

En preskaŭ ĉiuj religioj oni trovas la imagon pri *individuigita memmanifestiĝo de la eterna pralumo* kiel spuron de profunda ekkono de la realo. Nur en taoismo, ŝintoismo kaj en la kredo de la *sudaj* budhanoj, la „*Hĭnayĭna*“ skolo, *ne* troviĝas tiu ekkono, sed estas eraro nomi tiujn religiojn tutsimpe „*ateismaj*“ nur pro tio, ke iliaj imagoj pri tio dia ne povis levi sin super la neformita maro de la dia estoprofundo.

La budhismo de la *nordo*, la skolo de „*Mahĭyĭna*“, la „*Granda Vehiklo*“, kontraste al la „*Malgranda Vehiklo*“, la „*Hĭnayĭna*“, montras la imagon de individuigita memmanifestiĝo de la eterna pralumo en plej pura formo en sia ĉiela *Pra-Budho*, „*Adibudho*“, kvankam la diversaj instruopinioj faras la purecon de tiu imago multe malpli klara. Estas eble, ke tiu imago havas *gnostikan* originon kaj nur en pli malfrua tempo atingis, sur la vojo tra Persio kaj Turkeŝtano, Nepalon kaj Tibeton, kaj de tie plue disvastiĝis.

El *gnostika* ekkono originas la nocio „Logos“. Sed tie ĉi, en la „Vorto“, kiu estas *el* Dio kaj *estas* Dio, staras antaŭ ni nenio alia ol la *mem-elparolo de la eterna, nekaptebla pralumo en individuigita spirita formo*, kaj tiu ĉi ekkono de spirita realo eniĝis en la instruon de la *kristanismo*, kie ĝi plene intermiksiĝis kun la tute diferenca nocio de „filo de Dio“ rilate al la majstro de Nazareto, tiel ke la „sanktoleito“, la *Kristo* de la evangelioj, jam de antaŭ preskaŭ du mil jaroj estas rigardata kaj adorata kiel: Logos „fariĝinta homo“.

Sed la gnostika-aleksandria Logos-instruo fakte montras en tuta klareco nur la ekkonon de *realo*, kiu donas *plenan rajtigitecon* al ĉiuj imagoj pri Dio kiujn oni kutimas nomi „personaj“, kondiĉe, ke ili ne degeneras en antropomorfan nespiritecon, kiu tiam kondukas al tio, ke oni reve imagis al si „personan dion“ super la nuboj, kiu estas nur tereca-trotereca potenculo ekipita per diecaj ĉiopovaj fortoj.

Ĝenerale trovebla kristana opiniado pri Dio bedaŭrinde ne estas tre malproksima de tiu imago.

Tiuokaze ekzistas nur du eblecoj proksimiĝi al tiu ĉiela „reĝo“.

Aŭ oni timas ne *esti aŭdata* de li, se oni volas alpaŝi al li persone, *sen* pledanto, kaj tial serĉas, laŭ bona, malnova, kortega maniero, *spiritajn perantojn*, – aŭ oni en fiera mempritaksado *forrifuzas* ĉian peradon kaj opinias sin rajtigita komenci la rilaton *sole* kaj *sen* pledanto.

Ambaŭ opinioj baziĝas sur nedireble malvasta, terece ligita imago pri Dia esenco, eĉ se oni kredas, ke oni sentas sian Dion en tute „laŭspirita“ maniero.

Tio, kio tiumaniere estas sentata: – la „Dio“, kun kiu oni opinias sin kapabla ekrilati laŭ unu el *tiuj ĉi* du manieroj, ĉiam estas *reve kreita Dio*.

Kiom malvastspaca, sed ankaŭ *kiom aroganta kaj orgojla* estas imago pri la *eterna origino de ĉia esto*, kiu aŭdacas voli atingi la favoron de sia Dio per *pledado*, aŭ povas delogi al serĉado de rekta dialogo kun la *Pralumo*, sen konsideri, ke tiu ĉi *Pralumo*, kaj ne malpli ties eterna *mem-elparolo* en individuigita formo, tiom *superas ĉian homan komprenkapablon*, kiom la plej granda el la fajrosunoj de la fizika kosmo eklipsas ardetantan fajrero en hejma fornojajro!

Se ne *estus preparita irebla vojo* fare de la eterna, ĉion ampleksanta spirito el la *Pralumo de ĉia esto*, tiam vere *neniu* homa spirito iam povus reveni al sia eterna origino.

Sed tiu ĉi „vojo“ estas la *sama*, kiun la spirita homo iam trakuris, antaŭ ol li unuigis sin al la homa animalo de la tero.

Tiu ĉi vojo estus neirebla al la tera homo, se iam *ĉiuj* spiritaj homoj estus „falintaj“ kune.

Sed ĉiutempe estas nur malgranda nombro, kiu cedas al tiu „falo“, eĉ se temas pri *miriadoj*, kiuj en la fluo de jarmiloj, sur tiu ĉi kaj aliaj planedoj, devas dividi la vivon de la animalo *en sia tempo*.

Sed kelkaj, kiuj *ne* falis en la korpan formon de la animalo, vivas ekde antaŭ praa tempo, *traardate de diaj amo kaj kompatoj*, en *nevidebla* formo propravole tie ĉi sur la tero, por teni malfermita al la falintaj gefratoj la vojon returne al la pralumo, estante gvidataj de unu el la *prageneritaj spiritohomoj de la pramondo de la pura spirito*, kiu neniam forlasis sian pralokon en la „vorto“ kiu estas „Dio“.

Tiuj malmultaj kapablis, ekde antaŭ neimageblaj tempoj, prepari homajn spiritojn, antaŭ ties naskiĝo en homa animalo, tiumaniere, ke ili, post ilia naskiĝo, povis atingi tiun staton, kiu formas por la homa spirito la ponton, sur kiu li povas transpaŝi al la unuaj terlangoj de la beatiga transcenda mondo de la spirito, *el kiu li iam ekzilis sin mem per sia falo*.

Tiuj tiel preparitaj inter la homoj de tiu ĉi tero estas fariĝintaj la „*lumantoj de la Pralumo*“ per tio eterna, kio malkaŝas sin mem en ili, tiuj malmultaj, kiujn oni povas nomi, por uzi ekzistantan esprimon, ankaŭ la „*pli aĝaj fratoj de la homaro*“, „*pli aĝaj*“ tial, ĉar ili estus naskitaj en la homa animalo de la tero jam antaŭ *miĵoj da jaroj*, se ili ne estus libervole – kvankam *ankaŭ ili* apartenas al tiuj spiritaj homoj, kiuj ne kapablis kontraŭstari al la *falo* – prezentintaj sin al siaj *nefalintaj fratoj*, tie ĉi vivantaj en spirita formo, por esti preparataj al kvazaŭ homaj konverĝigaj lensoj por la radioj de la Pralumo.

Sed tiu preparado kondiĉis ankaŭ, ke ili *jam ekde antaŭ jarmiloj* devis *servi* al siaj fratoj, restadantaj spiritaforme en kompatato kaj amo ĉe la teraj homoj, en ilia ilumina kaj sava laboro, kaj tiumaniere helpe agadis sur tiu ĉi tero jam longe *antaŭ* sia naskiĝo en homa animalo.

Ne ĉiu el ili ricevas la *saman* taskon, kiam li ekaperas en homa animalo sur tiu ĉi tero.

Sed ĉiu estas devoligita al *aparta* voko atinginta lin, kaj obeas *sole ĝin*, indiferente ĉu la surtera vivo kondukas lin al honoro, gloro kaj riĉeco, aŭ al malriĉeco, malalteco, turmento kaj malestimo.

Se li sin retiras el tio, kion la surtera vivo devas alporti al li, li falas pli profunden ol li iam falis, kaj estas indiferente, el kiuj formoj de sorto li sin retiris, – ĉu ili estas plej ĝojigaj aŭ

plej malagrablaj, – ĉar neniuj povas tie ĉi *sufiĉi* al *ĉiuj* postuloj de la voko atinginta lin, sen konformi al la speco de vivo kiu okazas al li laŭ saĝa gvidado, *por ke li povu* obei al la voko direktita *aparte al li*.

Tiu ĉi plej subtila unuiĝo de vivantoj en la spirito efikas surtere per speco de „magneta“, ekstere neperceptebla, *pure spirita* forto sur ĉiujn homajn spiritojn jam *kapablajn* por surpreni, kaj tiras ilin supren en spiritan staton, kiu egalas al tiu de la membroj de la unuiĝo, tamen diferencas de ĝi en tio, ke tia vekiginta spirita homo leviĝas nur por *plua suprenirado*, kaj havas *nek la devon nek la kapablon* partopreni la *helpan laboron*, kiun la spirita unuiĝo de la lumantoj plenumas seninterrompe, ĉar, kiel mi jam diris, tio kondiĉas *preparadon dum jarmiloj*.

Homo vekiginta tiumaniere per la nevidebla helpo de la spirita helpantoj fariĝos, *post la morto* de la homa animalo kun kiu li surtere vivis unuigita, tuj kapabla atingi la sekvon-tan spiritan staton, en kiu vivas *spiritaforme* tiuj nefalintaj, el kies laboro rezultis la purspirita komuneco vivanta surtere en homanimalaj korpoj, – ĉar ĝi seninterrompe ricevis de ili, dum sia surtera agado, spiritaĵojn, sen kiuj tera homo neniam povus fariĝi malkaŝanto de tio eterna malkaŝiganta en li.

Estas kelkaj inter ili, kiuj dum sia vivo en la animalo „mortis“ al la tero kaj kiuj, *atinginte* tiun pli altan staton, *nevideble restas pro amo kaj kompato*, same kiel tiuj nefalintaj, *ĉe la homoj de la tero*, progresigante la helpan kaj savan laboron de tiuj nefalintaj, laŭ tio kiom ebligas per speco de akumulado de volo.

Sed *preskaŭ ĉiuj, krom tiuj ĵus menciitaj malmultaj* – kiujn la norda budhismo nomas „*bodhisatvoj de kompato*“, sed la pli malnova kristana eklezio nomas siaj „*sanktuloj*“, „*anĝeloj*“ kaj „*arkianĝeloj*“ (ankaŭ la pli malfruaj „dek kvar helpantoj dum mizero“ estu tie ĉi inkludataj) – strebas ekde tiu pli alta spirita stato *plue supren*, kaj homa spirito tiumaniere trapasas iom post iom, dum tempoj ne plu terece mezureblaj, ĉiun pli kaj pli altan staton de la hierarkioj de la spirito, ĝis ĝi alvenas al tiu plej alta praestaĵo, returne al la memelparolo de la pralumo, al la „*vorto*“, kiu estas „*Dio*“, por trovi, *eterne unuigita en ĝi, sian plej altan individuan spiritan homecon por ĉiuj eternecoj*, jam longe antaŭe unuigita kun sia spirithoma erota kontraŭpoluso, kiel „*viro kaj virino*“ en la spirito.

En tiu maniero la iam „*falinta*“ spirita homo trovas la vojon ekde la tera animalo *returne* al sia *prahejmlando en la eterna, pura spirito*, al la „*mondo*“ de *beateco kaj klareco*, en kiu ekzistas „*vivo*“ *tute alispeca* ol eĉ tiu trovebla en la plej misteraj regionoj de la kosma naturo, al kiu tiu ĉi tero apartenas.

Ne „*malproksima*“ de tiu fizika kosma naturo estas la mondo de la *pura spirito*, kaj la maro de *animeroj*, al kiu la homa spirito ŝuldas la eblecon de *sia individua formado*. Tamen oscedas abismo inter *ĉio, kio apartenas al tiu ĉi fizika kosma naturo*, kaj la *mondo de la pura spirito*, abismo kiu *neniam* estus transpontebla, se tiuj nefalintoj, kiuj spiritaforme restis ĉe la falintaj homaj spiritoj, ne formus kaj konservus ekde antaŭe praaj tempoj tiun ĉi solan „*ponton*“, sur kiu la returno al la vivo en la eterna spirito estas *ebla*.

Nur post *kompletiginta* returno, *unuigite kun la „Vorto“ kiu estas „Dio“*, la spirita homo vidas la Diecon tia kia ĝi eterne estas kaj tiel kiel ĝi eterne agas, *„okulon ĉe okulo“*, sed *ne de ekstere*, sed *en si mem*.

Nur *tiam* li „ekkonas“, kiel ankaŭ li „estas ekkonata“.

Sed jam en la unua komenco de tiu nemezurebla vojo lia „*vivanta Dio*“ povas naski sin en li, en formo *terhome sentebla*.

La „*vivanta Dio*“ de la vekiĝanta aŭ vekiĝinta homo sur tiu ĉi tero estas kvazaŭ *nekaptebla fajrero* el la eterna radianta lumo de la „Vorto“ kiu estas „*Dio*“ de eterne ĝis eterne, kaj kiu *mem estas la pralumo* en sia mem-elparolo kiel pravoro, – kiel ĝi „samtempe“ ekkaptas sin *mem kiel eternan „Diecon“*.

Pro plej alta klareco, oni permesu al mi la komparon kun unu el la fortoj de la fizika universo, kiun la homo sukcesis servigi al si.

Kiel elektra forto povas ardigi kaj lumigi harfajnan karbonfadenon, dum la elektra forto necesa por provizi grandan urbon, kaj *uzata en sia tuta forteco, tuj neniigus* tiun fadenon, tiel same la enprenkapablo de la tera homo estus tuj neniigita, se ĝi povus senprezare proksimiĝi *al la radianta brilo de la eterna „vorto“* kaj do *al la pralumo mem*. Sed ja povas terhoma enprenkapablo elteni la *nedireble mildan trafluadon*, kiu kreas en la plejinterno de la anima interno la „*rebrilon de la Patro*“: – la lumantan stelon, en kiu sola lia „*vivanta Dio*“ povas fariĝi surtere *ekkaptebla*, se ĝi ne risku detrui la konscion de la tera homo per la plena abundo de sia brilo.

Se tiam la fine vekiĝinta homo ekiras la solan vojon, kiu vere kondukas returne en la *prahejmlandon* de la spirita homo, tiu ĉi stelo lumas antaŭ li kaj fariĝas *pli hela* kaj *pli radiant*a laŭ ĉiu pli alta stato atingita, ĝis li fine, en la nedirebla brilo de la eterna „Vorto“, – en la eterna pralumo nasanta sin mem, – *unuigas sin kun ĝi mem por ĉiuj eternecoj*.

Tio estas, prezentite laŭ homa kapablo, la vojo, kiu kondukas la spiritan homon post lia falo returne supren.

Tio estas, *kion oni plene ekkomprenu*, se oni volas ekkoni la *realan* vojon al la esenca spirito, la *solan* ireblan vojon por la homa spirito, la vojon, kiun propradire ĉiuj spirite influitaj religioj sur tiu ĉi tero suspektas, kaj volas instrui laŭ sia maniero.

Kiu eble pensas, ke li povas montri *aliajn* vojojn al la spirito, tiu trompas sin mem, – kaj eĉ se li agas plejbonintence, li tamen kondukas sin mem kaj ĉiujn, kiu sekvas lin, al turmentoplena anima konfuzo, jam *ĉi tie*, kaj *post* la tera morto por eonoj, – se ne al plena dissolvo de la konscio, – al la eterna „*spirita morto*“, el kiu *ne* plu ekzistas *releviĝo*...

Neŝanceble validas la „leĝoj“ de la eterna spirita regno, kaj neniu potenco kaj saĝo de la ĉielo kaj la tero povas iam fleksi ilin, ĉar esprimiĝas en ili nenio alia ol *la eterna volo de la pralumo mem*, el kiu elradias ĉio, kio estas.

Vi vidas la armeojn da steloj de la nokto kaj vi ne povas kompreni, kio konservas ilin, kaj tamen tiu ĉi tuta universo kun ĝiaj sennombraj sunsistemoj estas nur la *plej malgranda* atesto pri forto kaj ĝia imanenta volo, forto, al kiu *ankaŭ* vi ŝuldas vian ekziston, kaj kies *pli alta* malkaŝiĝo, ĝis ene de

ĝia propra esenco, *povas* doniĝi al vi, se vi ekiras la vojon, kiun amo kaj kompatato tenas malfermita.

„*Okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis tion, kion Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas.*“ Nenio *fizike tereca* povas ekkoni tion eternan!

Miaj vortoj instruu al vi ami *ĉion Dian!*

Nur kiam vi tion Dian *ekkonas*, laŭ tio kiom vi kapablas en kontemplado, vi ĝin *amos*. Alie vi amas nur *fetiĉon*, kiun vi *kreis al vi mem en via imago*.

Nur kiam vi meditante *sentas* en vi la supren tirantan forton de tio Dia, vi ankaŭ ekkonos en vi la eternan *amon*, per kiu vi povas elfari *ĉion*, kio servas por via spirita savo!

Nur tiam vi ankaŭ lernos mem *uzi* tiun nekompareblan forton, kiu primajstras *ĉiujn* fortojn: – la *amon*, malligitan je *ĉia objekto* de amo!

Tiu diece viva, svingiĝanta praforto el la *spirita* „mondo“, per kiu sola la vivo de la homo sur tiu *ĉi* tero povas esti savata el *ĉia* ligiteco!

Tiu plej alta forto, per kiu vi povas liberigi vin el la ligo, per kiu la nevideblaj potencoj de la fizika kosma naturo, en kiu vi vivas, tenas vin katenita, – ili, kiuj staras *profunde malsupre de vi*, kaj tamen nuntempe estas pli potencaj ol vi, antaŭ ol *la amo en si* faras vin la nevenkebla mastro de via vivo!

Tiam vi lernos kompreni, kion volas diri la vorto:

„*Dio estas amo, kaj kiu restas en amo, tiu restas en Dio, kaj Dio restas en li.*“

La mistero de artisma esprimado

Estis tempo – kaj eble multaj hodiaŭ rigardas ĝin kiel ankoraŭ ne finitan –, kiam oni konsideris „korpon“ kaj „animon“ kiel aferojn ĉiam ekzakte apartigendajn unu disde la alia, preskaŭ anime *hontante* pro tio, ke oni havas *korpon*, kiam oni pretendis aparteni al homoj direktitaj al la *spirito*.

Kiu iam rememoris la animon, tiu preskaŭ opiniis, ke li *ne plu bezonas* la korpon, kaj rigardis ĝin en la plej favora okazo kiel *ĝenan plumbopezajon*, kiu povas nur tiri la animon *malsupren*, – kiel probable necesan sed hororan malbonon: *naŭzan malhelpon al ĉia anima disvolviĝo*.

Oni provis laŭeble „*mortigi*“ la korpon, supozante, ke oni per tio povas „*liberigi*“ la animon, kaj ne sciis, ke la animo estus por la homo de tiu ĉi tero: oscedanta malpleno, senenhava parolado, horloĝo sen ciferplato, metiejo kun miloj da zumantaj, sed idlantaj radoj, aŭ neelfosebla kaj necirkuligebla riĉo, *sen la enhavo* de sia spertado, kiun *tie ĉi sur la tero peras al ĝi la korpo*.

Oni ne sciis, ke ni ne povas formi unu solan *person*, kiu ne havas en la *tera korpo* sian *analogan rilaton* kaj kies enhavo ne estas prezentita laŭ percepto per tereca senso, – ke ĉiuj niaj imagobildoj, eĉ la plej komplikaj, estas *antaŭformitaj* en la *korpo*, kaj ke ni ne povas ekhavi konscion pri iu *sento*, *sen* rilato al la sentokapableco de la *korpo* kaj ties organoj. –

Ankoraŭ hodiaŭ nur malmultaj scias, ke en ĉiu terece konscia anima perceptado kaj en ĉiu pensado ekaktivis *io pli ol* nur la *cerbo*: – kontraŭe, *ĉiu atomo de nia korpo* devas *servi* al ni por *anima perceptado*, tiom longe, dum ni estas ligitaj al tiu ĉi korpo en la *fizika fenomenaj mondo*, – kaj ke la riĉo de la animo, kiel la ebleco uzi ĝin, estas surtere *atingebla* al ni nur per la *kunlaboro* de la tera korpo.

Tio, kion ni nomas „senti“, kvazaŭ estas manifestiĝo de la sama forto, per kiu ni ankaŭ kapablas „pensi“, kaj nia sentado povas esti disvolvata al la sama, eble eĉ al multe pli granda, *akreco de enfokusigo*, sed fakte *al multe pli alta sekureco*, ol la pensado.

La procezoj tie ĉi koncernataj estas kompareblaj al la fulmrapida elsendado de konsciaj kaj duonkonsciaj *demandoj*, al kiuj venas *respondo* kun la sama rapideco, kaj la respondo ĉiam venas al ni – sen tio, ke ni scias – *de la korpo*, eĉ se ni kredas, ke ni ĝin *ne bezonas*, kaj nedankeme opinias, ke ni povas *molestimi* ĝin...

Ĉe ĉiu penso, ĉe ĉiu senta impulso, eĉ se temas pri penso de plej abstrakta, pri sento de plej subluma speco, ni elsendas pere de nia cerbo kvazaŭ skolton en tiujn partojn de la korpo – indiferece ĉu ni konas ilin aŭ ne – en kiuj troviĝas prezentita en *fizika-korpa* formo la *analogo* al tiuj pensaj aŭ sentaj rilatoj, pri kiuj ni tiumomente okupiĝas. Kaj preskaŭ samsekunde la sendito revenas kaj raportas al ni – ree post transformado per la cerbo – pri tio, kion ĝi trovis.

Ne estas tre facile, kompreni tiun procezon. Sed nia tuta perceptado de la fizika mondo estas atingata nur en tiu maniero. La tuta ekstera mondo estus por ni *kaoso*, havus nek mezuron nek limon kaj restus por ni anime *nekaptebla*, sen

tiu ĉi *kunhelpo* de la korpo, ne de la *cerbo* sole, kvankam la cerbo certe estas la centra regejo de la korpo, kaj *nenio korpa povas* penetri ĝis la konscio de nia animo, sen esti *trapasinta* tiun centran regejon por tie ricevi formon, kiu estas sentebla de nia anima perceptado.

Ankaŭ ĉia *artisma esprimiĝo de la animo* estas ebla sur tiu ĉi tero nur per la *kunlaboro de la korpo*.

La *artisma esprimformo* povas – en ĉiu unuopa okazo – fariĝi *lingvo* de la animo *nur tiam*, se konscie aŭ nekonscie *ritmoj* estas estigataj en ĝi kaj per ĝi, kiuj kaŭzas ie en la korpo la *kunvibrado* de *analogaj* ritmoj.

Eĉ la ekstera prezentado de la homa figuro, kaj de aferoj ĉirkaŭantaj ĝin, en la belartoj, estas anime kaptebla nur per la ekigo de certa konscio de rilatoj *en la korpo* de la rigardanto, eĉ se li opinias, ke li enprenas en sin tion rigardatan nur per la *okulo*, kaj helpe de la *cerbo*.

Sed kiu volas ekkapti tion *esencan* en ĉia arto, tiu devos enprenadi *pli pere de la korpo*, ol li scias kaj pretas koncedi.

Certe, *muziko* estas ricevata antaŭ ĉio per la *orelo*, sed la procezo de *konsciiĝo* estas pli komplika ol iu aŭ alia aŭskultanto suspektas! La orelo estas nur *ricevilo* por la sonadoj. Sed por interpreti ilin, ĝi devas konduki la ritman kaj sonan impulson tra la tuta korpo, ĝis ĝi atingas tiujn lokojn en la korpo, kiuj estas analogaj al ĝi: kiuj havas la samajn intervalojn de rilato, la samajn unuojn de vibrado, la samajn ritmojn, kaj, kiel eĥo, resendas la *respondon* al la mekanismo de la orelo, kiu tuj peras la respondon al la *cerbo*, en kiu sola ĝi povas konkretiĝi al *tiu lingvo*, kiu estas *kaptebla al la animo*.

La samo okazas rilate al la *okulo*, kiam temas pri la perceptado de artisma konstruaĵo, de verko de plastiko aŭ de

penrarto, dum ofte *ĉiuj sensoj samtempe* estas bezonataj, sed *ĉiam* la *aŭdsenso*, kiam temas pri la enpreno, eĉ dum silenta legado, de verko de la *poezio*.

Estas ĉiam la sama procezo.

„Mistere en la hela tago ...“

Ĉiu aktivado de „*artismaj esprimformoj*“ estas *signo-*
magio, efikanta per la trovado de la samaj diagramaj de for-
toj, kiujn la *korpo* fizike-reale prezentas en si.

Tio aplikiĝas kaj al la kreiva *formado*, kaj al la anima *ek-*
kaptado, motivita de sentoimpulso, de ĉiu verko de ĉiu arto,
kvankam por la formanto de artisma formo, same kiel por ties
rigardanto, restas mistera tio, kio estigas ilian spertadon.

Okcident-Orienta Magio

La malmultaj *veraj*, same kiel la nur *supozitaj* aŭ la arogante sin tiel *nomantaj* „kabalistoj“, kurioze plej ofte de anti-semita koloro, al kiuj la stirantoj de la „fajra veturilo“ havigas tiun ĉi libron, probable ne inklinos supoziti, ke kaŝa traktato de malnovhebrea mistiko estos tie ĉi tirata al lumo. La novulon, kiu apenaŭ scias, kion li imagu sub „kabalistiko“, mi deziras unue atentigi pri la fakaj libroj, publikigitaj en ĉiuj kulturlingvoj, kiuj traktas la judan mistikon, do la kabalon, por ke li akiru kelkan scion pri tiu ĉi temo. Tio *ne* estas *necesa*, se la regiono, kiun mi nun devas eniri, ne aparte interesas lin.

Mi ne povas trakti tie ĉi la diversajn bazajn hebreajn tekstojn, el kies interna forto nutras sin la mistiko kaj magia praktiko de la strikte ortodoksa orienta judaro, kaj mi ne vidas kaŭzon por fari tion, ĉar tiaj traktaĵoj faritaj de kompetentaj aŭtoroj jam de longe ekzistas.

Posedante sekuran scion pri la forgesitaj nejudaj *prafontoj* de tiuj tekstoj, mi turnas mian atenton al ĝuste tiuj fontoj, por ekspliki el *ties* profundoj tion *esencan* de kabala ekkonado.

Kvankam mi riskas, ke mi, tute kontraŭ mia volo, eble vundos kabalistojn de juda sango, mi estas devigita fari la bazan konstaton, ke *la tuta mistika sistemo* de la kabalo *ne estas de juda origino*; sed ke ĝi radikas en la tradicioj de hinda sekreta instruo, kiu originis en la plej fruaj tempoj de hin-

da saĝo, kaj ke la anoj de tiu ĉi sekreta instruo *ankoraŭ hodiaŭ* siamaniere *praktikas* „kabalon“, sen havi ian scion pri la juda kabalo, aŭ koni nur ties nomon.

Ne estas mia intenco komuniki detalojn pri tio, sed la vere scianta kabalisto apenaŭ povos rifuzi kredi al mi, kiam li finis tiun ĉi libron en ĉiuj ĝiaj ĉapitroj, leginte trankvile, sentaŭjuĝe kaj ankaŭ „inter la linioj“. Sed la novulo provizore konfidu sin al mia gvidado, ĝis ankaŭ li estas kapabla ekzameni, laŭ sia povo, la konstaton de mi faritan.

Tiuj ĉi vortoj nur *konfirmu* la profundajn verojn de la kabalo, sed la respektoplena amiko de la kabalo pardonu al mi, se mi tamen tie ĉi traktas nur la *fundamentajn principojn* de la tuta sistemo en ilia alta valoro, kaj tute ne intencas samtempe doni atenton al la sekretŝajnigaj vulgaraj *formuloj*, kiuj fariĝis karaj al li kaj eble aperas al li mem sanktaj kaj adorindaj. *Vera* kabalo neniam povas fariĝi objekto de profanado, sed ĉiam restas sekreta instruo por nur treege malmultaj.

Tiu ĉi mallonga ekspliko havas la celon *pliprofundigi* la studadon de la kabalo ĉe tiuj, kiuj eĉ hodiaŭ sentas la aŭtentikan kernon de la malnovaj instruoj, kaj igi tiujn starantajn malpli proksime *estimi* la praprofundan saĝon, kiu en la vesto de mezepoka juda mistiko migris ĝis la okcidenta mondo: – saĝo, kiu influis la pensadon de la plej elstaraj homoj de la mezepoko kaj renesanco, – saĝo, kiun nur *malmultaj ekkonis*, sed *multaj* en stupida orgojlo *blasfemis*, kaj kiu eĉ hodiaŭ *vivas*, kvankam nur en elektitoj ie kaj ie, aparte en nordaj landoj, estante rigardata tute inda je alta adorado kaj je la penado de longa vivo de esplorado.

Ankaŭ en la *kabalo* temas, kiel en *ĉiu* praktika mistiko, *antaŭ ĉio* pri tio, ke oni trovas la vojon al *tio spirita* plej alta,

el kiu originas ĉia vivo: – pri la unuiĝo de la animo kun ĝia forlasita fonto de vivo, – pri „*unio mystica*“, la kunfandiĝo de la *disigita* individuo kun la eterna *pra*-individuo, kiu sola estas la komuna estofundo de ĉiuj individuaj ekzistaĵoj.

Apude temas pri pure *magia* agado: aktivigado de forto en la regiono de la *fenomena* mondo, – por kiu al la strikte instruita vera kabalisto doniĝas la kapablo, per vivado en la spirito de kabala disciplino, – kapablo, kies atingo ne estas *celo per si mem*, sed kiu montriĝas tute spontanee, tuj kiam la strebanto plenumas *la kondiĉojn*, kiuj faras lin taŭga por *antaŭe* atingi la supre menciitan *mistikan unuiĝon*.

La tuta sistemo estas malnova nobla *variaĵo* de la joga-instruo radikanta en Hindujo.

Tiu ĉi *speciala* jogopraktiko, kiun ni sur la okcidenta terduono konas en hebreigita formo sub la nomo „*kabalo*“, estas fervore praktikata ankoraŭ hodiaŭ en kelkaj lokoj de centra Azio, kvankam neniu mondvojaĝanto iam sciigis pri tio. Eĉ kelkjardeklonga restado en *Hindujo* apenaŭ havigas al eŭropano tiom da spirita kredito ĉe la tieaj sciintoj, ke ili malkaŝas al li *eĉ nur iometon* de sia mistika scio, kiu estas strikte gardata kaj eĉ al erudiciuloj pleje *neatingebla*, kvankam pasas neniu nokto, en kiu ne estas plenumata la sur ĝi bazita magia praktiko, solene, en tempoj protektitaj kontraŭ ĉia profanado.

Estas preskaŭ nenecese emfazi, ke la hindaj, tibetaj kaj ĉinaj „*kabalistoj*“ staras en plej intime sindonema spirita *interligiteco* kun la alta spirita komuneco, kiel kies spirita, eterne destinita membro mi ekhavis la scion pri tiuj ĉi aferoj, kiuj apenaŭ iam antaŭe estis malkaŝitaj al iu eŭropano, eĉ se li

eble konis ĉiujn ĉi-koncernajn landojn el propra sperto kaj flue parolis iliajn lingvojn.

Dum la parolo estas tie ĉi pri okcident-orienta magio, oni ĉiam konsciis, ke la mezepoka juda kabalo estas speco de „*traduko*“ kaj *transformaĵo* de tiu pra-„kabalo“, kiu, – kvankam *sen* tiu ĉi nomo, sed en ĉiu esenca rilato *identita*, – estas ankoraŭ hodiaŭ *viva* en la interno de Azio. Pri la *efikantaj principoj* en tiu pura kaj nur al ekstreme malmultaj alirebla jogo-praktiko sciigas, en *alia* lingvaĵo, tiu ĉi tuta libro, kaj la treege raraj *veraj* „kabalistoj“ de la okcidento, en kies manojn ĝi eble venas, povos baldaŭ eltrovi, kial mi havas ĉian kaŭzon por eksplicite direkti atenton al la hinda origino de la „kabala“, hebreigita nur ekde la mezepoko.

Sed sub „kabalo“ mi tute ne komprenas la superstiĉan pseŭdo-magion praktikata en certaj rondoj de eŭropaj kaj amerikaj urbegoj fare de rompiĝintaj homoj, kiuj senresponde kaj senhonte *uzurpis* la nomon „kabalo“. Anstataŭe, mi komprenas sub ĝi la *plej profundan spiritan ekkonadon*, kiu troviĝas ankoraŭ nur en la orienta *ortodoksa* judaro, kaj eĉ tie nur *sporade*, kaj pri kiu la nejudaj pseŭdo-kabalistoj – kiuj pleje scias absolute *nenion* pri juda spiriteco, kiuj opinias, ke per siaj strangaj sorĉaj formuloj ili praktikas kabalon, kaj sentas sin kiel piratoj pri juda saĝo, – kreis nur ridindan *karikaturon*.

La respektegon inspirantaj iluminitoj de la mezepoka kaj posta ortodoksa judaro arde strebis al tio, ke la sekreta scio de la kabalo, kiun ili rigardis kiel propraĵon de la juda popolo, fariĝu *neatingebla* al superstiĉo kaj malluma vulgara magio. Ili certe ne estus timintaj, ke post jarcentoj tiom multaj ekstreme antisemitaj nejudoj – ne sciantaj la hebreaan ling-

von kaj senspertaj pri juda pieco – pretus misuzi la kabalajn lingvaĵojn kaj pensadon, kiun ili konis nur el plej dubinda traduko, por praktiki abstruzan sorĉadon nekonatan al ĉiu juda sentado kaj pensado.

Sed tie ĉi oni devas decide averti kontraŭ tre disvastiĝinta timema *trotaksado* de ĉio, kio estas interligita kun la kabalo, kaj aparte kontraŭ la malsaĝa opinio, ke oni devas „scii“ pri ĉiuj ĉi aferoj, se oni ne volas ignorante iri preter sekretoj, kies esplorado estis la plej alta vivotasko por tiom multaj homoj.

Por vere atingi la plej altajn ekkonojn, kiuj kaŝiĝas en la *intence multsignifaj*, ekscese ornamitaj bildoj de kabalaj skriboj, estas bezonata, kiel mi jam diris, tuta homa vivo dediĉita al ilia esplorado. Frivola promenado en tiuj imagoregionoj kondukas nur al abomeninda vulgara okultismo, al kiu estas prezentata nova kaj nova nutraĵo en sennombraj malmultekostaj traktaĵoj fare de senrespondecaj ŝakristoj de kabala saĝo.

La lumo de la spirito en kristanismo

En ĉiuj grandaj religioj, kiuj iam estis donitaj al la mondo per iluminitoj, estas troveblaj *spuroj de spirita lumo*, sed tie ĉi mi ne intencas esplori ĉiujn religiojn pri tiaj montriĝoj de la spirito, ĉar oni devus plenigi foliantojn, se oni volus rigardi, juste kaj prave, nur la *plej gravajn* religiajn instruojn kaj la vivon de la kredantoj agantaj laŭ ili.

Tie ĉi ni limigu nin al la *kristanismo*, kiu – rigardata de multaj kiel *sola vero*, de pli multaj nur *estimata*, aŭ eĉ *mal-amata* kaj *kontraŭbatalata*, – estas por la homo de la *okcidenta* hemisfero sendube la *plej grava* religio.

Sed jen mi aŭdas leganton demandi, *kiun* „kristanisman“ mi celas, kaj kredanto de la pli maljuna sistemo, do eble greka-ortodoksa aŭ romia katoliko, inklinas rigardi *nur sian* opinion kiel „ĝustan“, same kiel kredanto de iu el la sennombraj pli junaj sistemoj estas preta vidi en la pli *maljunaj* formoj de kredo nur „malsaĝan superstiĉon“. La malamo inter kristanoj kaj kristanoj, bazita sur kontraŭaj opinioj, estas multe pli *danĝera* malamiko de la kristanismo ol la tuta, akre kaŭstika kritiko de ĉiuj virtuozoj pri mokado de ĝiaj instruoj.

Kvereloj inter kredopinioj alportis nedireblan malfeliĉon super homoj kaj popoloj, kaj ankoraŭ ne finiĝas la malfeliĉo provokita en *pli malvastaj* rondoĵoj tagon post tago en la nomo de kristana kredado.

Sed tio, kion supraĵaj homoj tie ĉi eble imputas al la *kristanismo*, *verdire* tute ne rilatas al tiu ĉi religio.

Temas pri la rezulto de homa malvasteco, homa partieceo kaj obstina necedemo, kiu originas el misgvidita homa strebado je potenco: la avido regi super aliuloj ĝis la plej sekretaj profundoj de ilia spiriteco, kaj, lastvice sed ne lastrange, el la pardonebla erara supozo, ke oni *sola* „posedas“ la „veron“ kaj devas *trudi* ĝin al aliuloj, eĉ kontraŭ ilia volo, por „savi iliajn animojn“.

Mi ne intencas paroli tie ĉi pri tiuj *eraraj padoj* de kristana kredado kaj pri la agado kutima sur tiuj padoj.

Kion oni povus diri tie ĉi, tio estas sufiĉe konata, kaj eĉ la plej absurda eraro ĉiam trovos siajn sagacajn defendantojn plenajn de, laŭ sia opinio, „pura“ kredfervoro.

La kristanismo estas ankoraŭ *multe tro juna* sur tiu ĉi tero, ol ke ĝi jam *povus* esti ekkonita *en siaj diaj profundoj*, kaj tiuj, kiuj opinias, ke ĝi tute ne plu konformas al la nuna tempo kaj, pro la pekoj de siaj „eklezioj“, montriĝis kiel absurdaĵo, eraras treege, ĉar ili rigardas nur *la ĝisnunan manieron de ĝia praktikado* kaj ne suspektas, ke iam venos tempo, kiu povas rigardi preskaŭ la plejparton de tio, kion oni hodiaŭ nomas „kristanismo“, nur kun *honto en la koro*, same kiel maturiĝinta viro rigardas la brutalajn malsaĝaĵojn kaj arogantajn pretendojn de sia junuleco.

Sed oni ne misinterpretu tiujn vortojn.

Estas vere *tre malproksime* de mi aserti, ke ĝis nun estis trovebla en la mondo *neniom* da vera kristanismo, sed mi ankaŭ ne devas ne fari la atentigon, ke por la *plej multaj* de tiuj nomintaj kaj nomantaj sin „kristanoj“, la *vera kerno de la kristanismo* estas kaŝita ĝis hodiaŭ en sennombraj, pli aŭ malpli malmolaj *ŝeloj*, kaj ke oni ankoraŭ ne gustumis *la de-*

likatan dolĉecon de tiu plej interna kerno, kvankam de tempo al tempo oni sciis kolekti iometon de ĝia riĉa suko tra la fendetoj de la ŝeloj.

Oni ankoraŭ ne scias, kaj oni ofte ne *volas* scii, ke tiu plej interna kerno de la kristanismo estas *esenca spirita realo*, kaj ke oni komence devas ekkoni ĉiujn „*ŝelojn*“ kiel *neesencajn*, antaŭ ol oni povas liberigi de ili *la dian misteron* de la kristanismo kaj ekvidi ĝin *en ĝia pureco*, – antaŭ ol oni kapablas konstrui al tiu plej interna kerno la tabernaklon, en kiu por ĉiam ĝi povas prezentiĝi al la homara adorado, por *formoj* de adorado *indaj* je ĝi. –

Al kredanta animo eble ŝajnas esti familiare kaj agrable, se ree kaj ree oni memorigas pri la *komencaj statoj* de la kristanismo, sed farante tion oni forgesas, ke la *semgrajno* estas io alia ol la *ĝermo*, kaj la *ĝermo* io alia ol la plenkreskinta *planto*, sed tiu ĉi siaflanke io alia ol la *floro*, kaj la *floro* io alia ol la *maturiĝinta frukto*.

Kiu volus ĉiam denove *pritranci* disvolviĝantan planton, por ke ĝia formo neniam transpaŝu la modestan simplecon de la *ĝermo*, tiu certe ne estus rigardata kiel bona ĝardenisto.

Sed ankoraŭ ĝis la hodiaŭa tago la kristanismo estas komparebla al *disvolviĝanta* planto, kaj *ne* estas tasko de ĝiaj anoj, *fortranci* de la radikstaŭdo ĉiun folioŝoson, eĉ se ĝi ŝajnas tro kreskema, sed permesi al la planto *liberan kreskadon*, lasi ĝian formon *disvolviĝi* kaj *ne* malhelpi *iun* formon, kiu eble estiĝas el la fortoj de la radiko, eĉ se per la alproprigo de la sukroj de *la koncerna grundo*.

Tie ĉi „purigaj klopodoj“ estas tre malkonvenaj, ĉar la planto, por resti ĉe tiu ĉi metaforo, *ne* povas nutri sin *el si mem*; ĝi devas asimili „fremdajn“ substancojn, *devas enpreni*

en sin la komence fremdajn sukajn, por *transformi ilin en si mem.* –

La formoj, kiuj ĉirkaŭ la radiknodo kreskigas tromulton da foliaro, velkas tute *sen ekstera faro*, kiam ili plenumis *ilian taskon protekti* la kreskantan ŝoson, kaj *novaj formoj* estiĝas, kiuj plene forgesigas la perdon de la unuaj protektaj folioj, ĉar ankaŭ ili, nun destinitaj fariĝi *esenca parto* de la planto, montras *ĉiujn siajn daŭrajn karakterajn ecojn.*

Kun la plej bona intenco oni tro multe kaj malsperte „pitr-ranĉis“ la planton kristanismo, kaj oni ĉiam denove metas al ĝi la tranĉilon, tiel ke estas kompreneble, ke la planto nun montras nesufiĉan naturan kreskon.

Sed oni povus nomi preskaŭ *miraklo* la fakton, ke la planto *spite* de tiu ĉi amara traktado estas *ankoraŭ viva!*

Oni ne *ĉiam denove* malfortigu ĝian vivoenergion, sed *ĝoju* pri *ĉiuj* ĝiaj *malnovaj* kaj *novaj* ŝosoj, kaj konfidu ĝian kreskadon al la manoj de la *eterna* ĝardenisto, kiu scias, kio utilas al ĝi, kaj oni baldaŭ poste vidos malaperi ĉiujn malutilajn elkreskaĵojn, sed la fortoplenajn ĝermojn disvolviĝi ĝis alta beleco.

Oni pardonu al mi, ke mi tie ĉi devas paroli per diversaj bildoj, sed kiu *volas* kompreni min, tiu facile divenos el tiuj bildoj, kion mi havas por diri, kaj mi ne estas devigita ofendi kredantajn animojn je tiu aŭ alia flanko.

Mi *ne* parolas favore al *iu* el la ekzistantaj kristanaj kredformoj, kaj vidas en *ĉiu* diajn spiritofortojn agantaj, sed malhelpataj de bonintenca *kredopinio* direktita al tro malvasta *partieco*, kaj malhelpataj de tro timema zorgo pri tio, ke oni

devas fordoni ion fariĝintan kara, aŭ ke io ŝajne superita devu tamen esti agnoskata kiel siaspece ne kondamninda.

Sed oni ne forgesu, ke *ĉiu* pravalida vero toleras en sia efikado tre *diversajn* formojn!

Oni *finfine* plene ekkonsciis *tion praesencan* de la kristanismo, kaj lasu la estiĝon de *la formoj de ĝia praktikado* al ĝiaj respektivaj anoj, respektante ties homan diferencecon!

La vivkondiĉoj de la aglo estas aliaj ol tiuj de la najtingalo, sed ĉiu vivaĵo de tiu ĉi tero spiras la *saman* vivdonantan aeron ĉirkaŭantan la terglobon, kaj tiel ankaŭ la bezonoj de la homa animo estas tre *diversaj*, kvankam ĝi bezonas ĉie *la dian lumon de la spirito*, se ĝi prosperu kaj vivu.

En la kristanismo, tia kia ĝi ĝis nun disvolviĝis, *estante kondiĉita historie*, sed ĉiam *nutrita* el *eterna* spirita fonto, aktivis *plej profundaj spiritaĵoj*, malgraŭ ĉiuj supre menciitaj pli fruaj „homaj, tro homaj“ neperfektaĵoj kaj ĉiuj pli fruaj abomenaĵoj. Kaj la elstara *aparta pozicio*, donita al tiu ĉi religioformo de ĝiaj kredantaj anoj, certe baziĝas sur realaĵoj, kvankam la *formoj de praktikado*, kiujn la kristanismo ĝis nun montris, *ankoraŭ ne* vidigas la rajtigon por tiu aparta pozicio.

Praaj *saĝoinstruoj radikantaj profunde en la eterno* estas *kaŝitaj* en ĝiaj kredotezoj, nur rare *ekkonitaj de raruloj* en ilia tuta graveco, kaj eĉ ne svage *suspektita* de la plej multaj el ĝiaj anoj.

Al la fatala spirita sekeco de niaj tagoj multego aperas kiel fosilio de malnova „pagana“ superstiĉo, tio kio iam estis enmetata en la kristanan instruon fare de sunklaraj ekkonintoj

ardantaj en la lumo de la spirito, sed tiam reeltranĉata de nova puritanismo kiel io ŝajne „fremda al ĝia esenco“.

Altaj *inicitoj* de antikvaj misteroj sciantaj pri la realo de la eterno iam konstruis, el saĝa elstara ekkono, la templon de tiu ĉi instruo, – kaj kiom ajn pura kaj korsimpla estis la intenco de pli malfruaj homoj, kiuj ofendiĝis pri la *formoj* de tiu templo, ili rilate al kosma ekkonado *neniom* egaliĝis al tiuj, kiuj iam kreis la planojn de tiu templo.

Kun la plej bona intenco, kaj post certaj okazoj havante ankaŭ la *rajton* kritiki, tiuj pli malfruaj homoj *pekis* kontraŭ la konstruon, ne suspektante tion. La historio tre klare montras, ke *esencaj ŝtonoj de la konstruo* estis forigataj, tiel ke la konstanta depecetiĝado de la masonaĵo estas apenaŭ plu ĉesigebla.

Nur nova *profunda eniĝado* en la *eternajn misterojn*, al kiuj la kristanismo estas vokita krei *vivantajn prezentaĵon*, povas fini tiun konsekvencon plenon interrompon de ĝia disvolviĝo, povas krei reciprokan komprenon kaj toleremon, kaj povas vekti la diversajn konfesiospecojn al reciproka fekundigo kaj renovigo.

Kontraŭaj opinioj restu trankvile ekzistantaj tiom longe, dum ili estas necesaj, kaj oni tie ĉi ne arogu al si oficon de juĝisto, kie sole plej alta spirita gvidado estas kapabla kunigi la kontraŭajn poziciojn en tempo difinita.

La veraj helpantoj en la hodiaŭaj malfacilaĵoj de la kristanismo estas antaŭ ĉio tiuj germanaj spiritaj konigantoj, kiujn oni siaopinie „konas“ kiel „mezepokajn mistikulojn“ – la verajn „teozofojn“ en la senco laŭ Paŭlo: la veraj spiritosciantoj, ekzemple *Ekehart*; *Taŭler*; la laŭname nekonata aŭtoro de la „*libreto pri la perfekta vivo*“ aŭ „*teologio germanlingva*“;

Thomas a Kempis, kiu donacis al siaj kunkredantoj la libron „*Imitado de Kristo*“; kaj, por tiuj, al kiuj liaj kosmaj vidaĵoj ne estas tro grandiozaj kaj premegaj, *Jakob Böhme*, la viziulo el Görlitz. – Kvankam li estas antaŭ ĉio *poeto*, ankaŭ *Angelus Silesius* tie ĉi ne estu forgesata.

Sed vasta kampo de aktivado malfermiĝas ankaŭ al *pli nova teologio*, sen kies *celkonscia helpo* la estiĝintaj damaĝoj estas apenaŭ kuraceblaj.

Antaŭ ĉio estas necese malimpliki la volvaĵon de dogma konfuzo, kiu estiĝis per la religihistoria, do pure *tempe* kondiĉita, egaligo de la *majstro el Nazareto* kun la memprononco de la eterna pralumo, la „*logos*“.

Tie ĉi vera *reformado*, vera *purigo* de la nocioj, estas urĝe necesa.

La prezentado de la *memprononco* de Dio, de la *logos*, de la eterna „Vorto, kiu estas *ĉe* Dio kaj *estas* Dio“, kaj la klare de ĝi apartigenda prezentado de la *spirithoma fortego*, kiu renkontas nin en la *majstro de la evangelioj*, – ĉio ĉi teologie tiumaniere bazita, ke rezulte ĉiu pli frua dogmo estus *ne nulgata*, sed en la plej vera senco *transfigurata*, – tiu ĉi faro ankoraŭ atendas la homon, kiu *kuraĝas* fari ĝin, kiu *kapablas* kuraĝi fari ĝin, kaj la *beno*, kiu povus ekflori el tiu faro, estus *nemezurebla*.

La praaĝa saĝoinstruo, kies koniganto mi estas devoligita esti en la nuna tempo, staras en nenia kontraŭeco al la eterna esenca kerno de la kristanismo, kiom ajn kontraŭa kelkiom de la instruo reprezentata de mi eble komence aperas al supraĵa rigardo.

Kiu komprenis, *el kiu fonto* tiu ĉi instruo originas, al tiu devas ŝajni absurda la nura penso, ke tie ĉi *povus* ekzisti kontraŭeco.

Sed ne estas mia tasko esti pledanto *por iu specifa religio-sistemo* de la homaro, eĉ se temas pri la sublima instruara konstruaĵo de la kristanismo.

Mi devas montri nur la altajn eternajn valorojn, kies atestanto estas ĉiu el la grandaj, spirite fekundigitaj religio-sistemoj de la tero.

Tio ne ekskluzivas, ke mi, – naskita de gepatroj devenintaj de praaĝaj germanaj triboj kaj instruita en la kristanismo, kaj sciante, ke ĉiuj miaj antaŭuloj sentis sin sekuraj en tiu kredo, – metas *al mi mem* la devon kontribui la miaĵon al *vera profundigo* de kristana koncepto pri vivo, laŭ la vidpunkto de la interna vidado ebla al mi.

Jam nun ekzistas ne malmultaj homoj, kaj inter ili ne malmultaj animpaŝtistoj de la du ĉefaj kristanaj konfesioj, al kiuj miaj instruoj fariĝis *gvidiloj* en iliaj serĉaj migradoj tra la mirmondo de kristana instruo. Mi ne havas kaŭzon por dubi, ke *pli kaj pli da homoj* de bona volo ‚tradukos‘ tion, kion mi ofte havas por diri en *alia* formo, en „*kristanan*“ lingvaĵon kaj proprigas ĝin al si en tiu formo, por doni al sia propra kredopinio *netrompan apogon*.

Estas tute ne necese, eĉ estus *en plej alta grado pereige*, se oni volus fondi *novajn* kristanajn aŭ aliajn spiritajn *komunumojn*.

Da paroĥoj kaj konventetoj ni jam havas vere pli ol sufiĉe!

Sed ĉiu, kiu estas ankrita en *iu ajn* de tiaj komunumoj, kaj siaopinie estas konvinkita, ke la *kristana* formo de komuneco

pli profunde tuŝas lian koron ol io alia, tiu *siamaniere* klopodu, per sia *propra* vivo, sia *propra* pli profundigita ekkono kaj kredanteco, servi al la senvualigo de la eterna *dia-spirita kerno* de la kristanismo.

Sed li ankaŭ penu kompreni tiujn *aliajn* kaj eduku sin al *respekto* por ilia spirita gvidantaro, kiuj provas alproksimiĝi al la *kerno* de la kristanismo per *aliaj formoj* ol li.

Kaj *malproksima* estu al li la sinteno de *fariseo*, kiu sian adoradon de la kristana instruaro ne povas esprimi pli bone ol per tio, ke li renkontas tiujn, kiuj serĉas la veron en *ne-kristana* formo, sen komprenemo aŭ eĉ kun malamo!

En la solecaj regionoj de centra Azio *eĉ hodiaŭ* vivas viroj, kun kiuj *neniu* eŭropano krom tiu, kiu parolas tie ĉi, povas eĉ nur formale kompari sin rilate al vera kompreno de tio, kio konsistigas la esencon de la kristanismo, kaj al kiuj tamen estas tre malproksima la intenco aliĝi al laŭdire „kristana“ kredrondo.

„Multaj venos el la oriento kaj la okcidento, kaj sidiĝos kun Abraham kaj Isaak kaj Jakob en la regno de la ĉielo.“

Ĉu estas ankoraŭ necese diri, ke nur ridinda orgojlo kaj blinda aroganteco povas aŭdaci kredi, ke ili povas entrudiĝeme *difini* la intencojn de la dia spirito rilate la estontecon de la kristanismo?!

Ĉie kaj ĉie „la sinjoro de la rikolto sendis siajn laborantojn en sian vinberĝardenon“, kaj *ĉiu fruktodona* branĉo de vinberarbo estos *trovata* kaj *plej zorge gardata* de ili.

La *sama* spirita suno igos la fruktojn de *ĉiuj branĉoj maturiĝi*, en la spirite difinita tempo!

La sekreto de la malnovaj katedralkonstruaj frataroj

Tie ĉi, por necesa heligo, estas la parolo pri la *spiritaj* katedralkonstruaj frataroj, kiuj ĉiutempe serĉis „*laborantojn*“ pretajn kunhelpi je la granda spirita „konstruo“ de la sublima diotemplo, kies planon kaj dimensionojn konas surtere sole la lumantoj de la pralumo, kiuj – malproksime de ĉiuj potencavidoj kaj personaj ambicioj – servas nur *tion eternan* en la homo. „Laboranto“ je la konstruo de tiu homara katedralo povas esti ĉiu tera homo, kondiĉe ke li estas preta *spirite labori je si mem*, ĝis li *konformas* al la pure spirita formo, al kiu li konformi *kapablas*.

En diversa ekstera komuneco, kaj laŭ diversa stranga statuto, tiuj pretaj por ricevo de la instruo kaj por la laboro kunigis ekde plej antikva tempo, kaj la simbola „historio“ de tiaj unuiĝoj de spirite serĉantaj homoj vere ne rakontas fabelojn, se ĝi serĉas la pli fruajn de la siaspecaj inter la unuaj homiĝintaj homanimaloj de tiu ĉi tero, la unuaj veraj „*homoj*“; kaj ĝi multe pli proksimiĝas al la *vero* pri la *origino* de la tie ĉi celitaj komunaj streboj, ol ĉia racionalista moderna esplorado surbaze de plej fruaj fontoj, kiuj ja fluas nur el skriboj de tre malfruaj kronikistoj.

La templokonstruaĵoj de la antikva *Egiptujo* same kiel la *Partenono* kaj, en la tempo de la kristanismo, kelkaj mondfamaj *katedraloj*, estis kreitaj de veraj konantoj de tio spirita en la homo *por la disfaldado de la animo*. – Ĉiuj tiuj *eksteraj* templokonstruaĵoj montras en *videblaj* formoj *animajn* sim-

bolojn el la eterna *nevidebla* templokonstruo, kiu *instruis* konstruadon pro la disfaldado de la *animo*. Ne senkaŭze originas el la antikva *konstruarto* la simboloj de spiritaĵoj, kiuj estis rigardataj kiel tro sanktaj por povi eniri en la parolmanieron de la ĉiutaga vivo. *Artistoj de la konstruarto* estis *mem* kreintaj la simbolojn. Ankaŭ la kreintoj de la grandaj artismaj konstruaĵoj de la antikva kaj mezepoka *oriento* estis, same kiel la arkitektoj de la malnova Meksiko, tradiciaj spiritaĵoj disĉiploj de tiuj „sciintoj pri konstruado kaj ornamado“, kion eĉ hodiaŭ klare atestas sennombraj konstruaĵoj kaj ruinoj.

Sed la origino de la *impulsoj* al reciproka spirita helpo estas io alia ol la origino de la diversaj *nomoj*, sub kiuj oni unuigis sin. – La nomoj *ŝanĝiĝis*, sed la memstarigita tasko konduki sin reciproke al Dio restis esence la sama.

Sed oni ne pensu, ke oni iam renkontas spirite perfektigintan „scianton“ de eterna saĝo en iu el la diversaj spirite direktitaj metiejoj.

Hodiaŭ tiuj ĉi spiritaĵoj laborkomunumoj estas plejfavora- okaze nur gardejoj de la *laboriloj*, planoj kaj konstruŝablonoj – *konservejoj* de la praaj, sanktaj *simboloj*, kies *interpretado* vere *kapabligas* la iniciatojn alpreni la instruon, dum estante inter la homoj unuigintaj por reciproka instruado plu neniu *povas*, plu neniu *kuraĝas* interpreti ilin, – krom en filistra-humanisma-*racionala* maniero, aŭ eĉ en iu ajn malsaĝe *fantasta* senco.

Malgraŭ tio, ĉiu vera spirita katedralkonstrua metiejo restas *sankta loko*, kaj perdiĝos *nenio* el tio, kion oni tie nesciante *gardas* trankvileme por *pli malfruaj* tempoj, – eĉ se ie kaj ie homoj, agantaj en manio pri persekutiĝo, eble ekstere

detruas simbolajn objektojn, – eĉ se hodiaŭaj gardantoj eble mem respektas nur *pro pietato* tion, kion ili ne plu scias uzi spirite.

Ree aperos *veraj* „konstruantoj“ *spertaj* pri la laboriloj kaj spirite iluminataj, kiam estos „*veninta la tempo*“, kaj ili iam certe *dankos* la hodiaŭajn gardantojn de la malnovaj instruaj trezoroj, se tiuj konservantoj almenaŭ *ne disĵetis* tion, kio ŝajnis al ili, estantaj *nespertaj* pri la plej sankta metio, „signifi“ plu nenion.

Estas eble, ke tiuj *novaj* animspertuloj ankoraŭ portas la *nomojn* de siaj antaŭuloj tra la jarcentoj de venontaj generacioj, sed tio *ne* estas *kondiĉo* por reciproka laŭmetia spirita „edifado“, same kiel tio neniam estis kondiĉo en *pli fruaj* jarcentoj. La *nomoj*, kiujn en pli novaj tempoj oni donis al si kiel komunumo, aŭ la *misuzo* de iuj nomoj, havas absolute nenian rilaton al la tie ĉi traktata afero.

Ankaŭ estas ne nepre necese, ke ĉiu vera spirite gvidata „ŝtontajlisto“ laboranta je la konstruo de la templo de Dio estu *formale aligita* al iu laborkomunumo; oni eĉ povus kompreni, ke iu submetas sin por „laboro“ nur al la lumantoj de la pralumo, *la gardantoj de la spirita konstruopiano*, kaj aliĝus al la *gardantoj de la laboriloj nur tiam*, se li trovus inter ili *tiajn*, kiaj sciis mem *uzi* la laborilojn. –

Kio do estas tiuj spiritaj „laboriloj“, – kio la spirita „*laboro je la ŝtono*“, – kaj kio la spirita „*templokonstruo*“? –

Mi kuraĝas fari la provon, favore al la plej sublimesa arto, la arto de *memformado*, doni *respondon* al ĉiuj kapablaj, kiom estas eble, sen perfidi al *neprudentuloj* artajn sekretojn, kiuj malfacile estas *akirendaj*, kaj misterojn de la templopla-

no, kiujn ekkaptas nur sanktigito, rememorante la vorton: „Ne donu sanktaĵon al la hundoj, nek ĵetu viajn perlojn antaŭ la porkoj!“ (Ankaŭ *eksterkristanaj* komunumoj de la antikveco kaj de la oriento minacis per la plej severaj punoj tiujn, kiuj iam provis malatenti tiun ĉi konsilon.)

En la laboro je la sublima katedralo, kiu estu spirite konstruata, ĉiu laboranta je ĝi estas samtempe *laboranto*, *laborilo* kaj *konstruŝtono*.

„*Laboranto*“ per sia libera volo, li fariĝas „*laborilo*“ per la akirita „*arto*“: – per *interpretado de la simboloj*, kiuj montras al li sian aplikadon, kaj fine „*konstruŝtono*“ per *la laboro je si mem*, helpe de la laŭkonstrua preparado kaj la ĝusta uzado de la laboriloj.

Nur el ŝtonoj laŭarte *tajlitaj* laŭ spirite donita instrukcio de la *konstrugvidantaj* „ŝtontajlistoj“, povas estiĝi la katedralo de la homaro laŭ la eterna konstruplano donita el la amo, kiu estas *Dio*.

Ĉiu, kiu helpas „konstrui“ je tiu alte sankta templo tiom bone kiom li povas, volas enigi *sin mem* kiel portantan konstruŝtonon en ĝian strukturon, konforme al la instrukcioj de tiuj, kiuj mem, per propra volo tajlitaj por fariĝi altaj *kolonoj*, devas porti kiel *monolitoj* la altan *volbaĵon* de la templo.

Por fariĝi „*konstruŝtono*“, ĉiu alstrebanta tion devas lerni *la metion*, devas ricevi *instruon* de iu jam *konanta* la metion, por ke li kapabliĝu *uzi* la laborilojn kaj *prilabori sin mem* laŭ la preskribo de la spirita plano.

Ankoraŭ li estas malglata, neregulforma ŝtono, tia kia prenita el la ŝtonminejo. Li devos *per propra laboro tajli* kaj *glatigi* sin, por ke li fariĝu *laŭmezura konstruŝtono* alĝustigita al sia laŭplana loko.

Fariĝinte tio, li volonte lasos sin *enmeti* en la rezervitan al li lokon en la sankta spirita templokonstruaĵo.

Sed li *ankoraŭ ne* estas *je la fino* de sia laboro.

Li ankoraŭ estas *interne malluma*, sed li fariĝu konstruŝtono *lumanta*, ĉar la konstruota katedralo estas konstruata el *interne lumantaj* ŝtonoj, por ke ĝi ekradiu per sia spirita lumo en la nemezureblaj vastaĵoj de la eterneco.

Nun komenciĝas por li la *interna* laboro, al kiu kondukas lin la sanktaj *simboloj* de la spirita katedralkonstrua frataro, kun kiuj li jam komence familiariĝis kaj kiujn li ankaŭ nun, – fariĝinte *konstruŝtono*, al kiu la laboriloj ne plu utilas, – konservas *en si* kiel netrompajn konsilojn.

Malgraŭ tio, li povus, *el si mem kaj sola*, nur malfacile kaj nur post nemezureblaj tempoj atingi propran lumon.

Li bezonas enpreni la radiojn, kiuj eliras de la *aliaj* „ŝtonoj“ kiuj same kiel li iam formis sin, sed *jam fariĝis lumantaj*, – kaj antaŭ ĉio li bezonas *la lumon de la kolonaj monolitoj* starantaj en la *interno* de la templo.

Sen sia *propra* interna laboro, al kiu kondukas lin la simboloj *ekkonitaj* en lia plejinterno, li neniam fariĝus taŭga por *enpreni* la lumon ĉiuflanke ĉirkaŭradiantan lin, kaj povus okazi, ke la altaj arkitektoj devus ekkoni en li „mortan“ ŝtonon; ke ili do devus *forigi* lin el la strukturo de la konstruaĵo kaj meti *alian* ŝtonon en *lian lokon*. –

Sed se li sukcesas, per *propra* interna laboro, progresi tiom, ke la lumo ĉirkaŭe radianta *povas* fari ankaŭ *lin* interne *lumanta*, tiam li *radios en sia propra lumo por eterne, lumante al ĉiuj venontaj generacioj, atinginte la celon de sia penoriĉa laboro*.

Per aliaj vortoj: unu el la homaj spiritoj antaŭe falintaj en la nokton de neekkonado de animaleca ekzisto, retrovis sin mem en la lumo de la eterneco, nun estante konscia pri si mem kiel iu eterne vivanta!

La tie ĉi priparolata katedralkonstruo vere ankoraŭ ne estas finita, kaj estos finita nur tiam, kiam la lasta de la terligitaj homaj spiritoj, kiuj restrebas al sia prahejmlando, returnis en la lumon.

Tial ankaŭ *hodiaŭ* estas bezonataj novaj *laborantoj je la katedralkonstruo*, novaj „konstruŝtonoj“.

Kiu havas la honestan volon „tajli“ sin mem en „konstruŝtonon“ per streĉa laboro, *tiun oni trovos* en tio eterna, li estos *spirite* instruata kaj gvidata, kaj *spirite* li lernos malkovri kaj senvualigi *aliajn* simbolojn, ĉar en la loko de konservado de la *malnovaj prasimboloj* hodiaŭ bedaŭrinde mankas spertuloj, kaj la *ekstera aparteneco* al laborunuiĝo *ja ne* povus fari el la serĉanto laŭmetian spertulon pri spirita konstruarto.

Sed se tiu spirite strebanta hodiaŭ *apartenas* al la formalaj *gardantoj* de la trezoro de la malnovaj metiejoj, li sciu, ke ĉio, kion li nur *pro pietato* ankoraŭ honoras kaj konas kiel *tradician uzokutimaron* sen „kompreni“ ĝin en sia plejinterno, entenas kaŝita en si *profunde spiritan saĝon*, kaj ke li povas *mem* instrui *al si* la plej profundan sekreton de la spirita konstruarto helpe de la sanktaj simboloj konfiditaj al li, eĉ se *neniu* el liaj konsilantoj povus iam senvualigi ĝin al li.

Sed ve al la nunaj *gardantoj de la laboriloj* kaj *malnovaj simboloj*, se ili ne scias teni *sankta* la konstrumetiejon, la lokon de ilia konservado! Ve al ili, se ili instruas ne plu *kon-*

strui, sed *detru*i tion, kion iliaj grandaj antaŭuloj formis por la savo de animoj!

La saĝo de plej malnovaj kultoj, la plej profunda spirita scio, pri kiu la homaro iam povis fieri, ankoraŭ estas konservita en vualitaj vazoj ene de la katedralkonstruaj metiejoj. Kiu ne scias *interpreti* tion, kion li havas por konservi, tiu almenaŭ sciu gardi ĝin kontraŭ *profanado*.

La mondo iam ree vidos verajn konantojn de spirita vero je ilia laboro, kaj estos konstruata finfine saĝo, kiu reale, meze de tenebro kaj trompaj lumoj, staras kvazaŭ *lumturo de la eterneco*.

Sed *tiam vere ne al ĉiuj*, kiuj hodiaŭ ankoraŭ neelprovite trovas aliron al iuj misteroj el la tempoj de prapatroj, estos permesate proksimiĝi al la sublimaj eternaj simboloj.

Oni bezonos *pli striktan* ekzamenadon, se oni volas apartigi la ventumaĵon disde la tritiko, – se estu kreata la *spirita atmosfero*, kiu estas necesa por *vere spirita* laboro je la katedralkonstruo.

La venontaj veraj strebantoj nun iom post iom ree trovu la *antaŭkondiĉojn*, kiuj solaj estas favoraj por la renovigo de la praa ekkonado de la realo!

Sed ĉiu ekzamenu sin mem, – indifereinte ĉu li sentas sin proksima al la spiritaj katedralkonstruaj frataroj, aŭ ne, – ĉu ne estas permesate al li dediĉi sin al ilia sublimesa *origina fina celo* tenita sankta tra jarmiloj, ĉu li ne povus fariĝi *laboranto je si mem, konstruŝtono de la lumanta spirita templo de la homaro?*!

Kiu ajn sentas sin kapabla laborante transformi sin mem el kruda ŝtonbloko en laŭmezure tajlitan *konstruŝtonon de la templo de la homaro*, tiu trovos *el sia interno* sian spiritan

gvidon, eĉ se *neniu* ekstera gvidanto staras konsilante je lia flanko.

Ankoraŭ certe ne venis la tempo, en kiu *ĉiuj* povus ricevi la spiritan enrigardon, kiun la malnovaj katedralkonstruaj frataroj, kies verkoj estas la malnovaj katedraloj de la kristanaro, donis al strikte provitaj homoj. Sed al tiuj, kiuj en sia koro digne preparas sin al tio, tamen iam denove aperos, pro spirita neceseco, la *flamanta stelo*, kiu iam antaŭe staris super la „staltrogo“, en kiu *la lumo de la eterneco*, inter la povraj animoj de tiu ĉi tero, ree venis al la homoj.

Pri la ĝusta diservo

Dum la fluo de jarmiloj la homo elpensis sennombrajn specojn de adorado al dio, kaj depende de lia imago pri „dio“ ĉiu homa eblo de sentado tie ĉi trovis sian esprimiĝon, de plej sovaĝa krudeco ĝis la plej sublima spiriteco.

Sed ĉiuj ĉi specoj de adorado al dio baziĝis kaj baziĝas sur la antropomorfisma penso, kvazaŭ „dio“ *bezonas* la *servon* de la homoj, – kvazaŭ tiu ĉi dio *atendas* de homo, ke li *servu* lin, – kiel la morta diobildo *bezonas* la *servon* de la homo, se ĝi ne perdu *la vivon en la fantazio kaj subkonscio de sia servanto*.

Certe, la *pli altaj* specoj de tia diservo estas taŭgaj por fekundigi kaj suprenlevi la animon de l' homo, ofte ŝire malfermi plej profundajn ŝaktojn de praspirita sentado, krei en kultoj simbolojn de plej sublima ekkonado, kaj tamen ĉio ĉi estas nur *homoservo*, estiĝinta nur el la homa bezono alporti al sia propra spirito *stimulon por suprenleviĝo, klarigi* al si mem en kultaj formoj la propran rilaton al revita, suspektita, kredita aŭ jam ekkonita fundo de la mondo.

Ĉio ĉi eble *plej forte progresigas* la homon sur sia vojo en la spiritan mondon, sed restas *servo al la propra animo*, nur *erare nomiĝas* „Dio-servo“, kaj ne estas la „ĝusta diservo“, pri kiu mi tie ĉi parolas.

Tiu ĉi ĝusta diservo estas *ne servado* al la dieco, ne *kulto* celebrata laŭ la opinio, ke per tio oni pagas al la dieco *ŝuldatan tributon*, sed *libervola prezentado* de ĉiuj fortoj kaj ka-

pabloj de la homo, por ke ili fariĝu *servantoj de la dia volo*, por ke ili *senkondiĉe* subordigu sin al la *direktado* fare de la vivanta dio en *la propra eterna spiriteco de l' homo*, – kio estas liberigo el la kaoso de sovaĝaj deziroj, procezo de kristaliĝo, en kiu ĉiu fortoatomo *lasas sin* al la eterna kosma formanta forto, por tiel atingi sian laŭordan lokon.

Kvankam la homo eble serĉas sian *edifon* en eksteraj kultoj, kvankam la animo eble estas *tuŝita* en sia profunda interno per kultaj ceremonioj, tamen vera unuiĝo de la animo kun la dieco estas trovata nur per tia *fordonado de ĉiuj fortoj de la homo* en ties manon.

Tie ĉi estas postulata „servopreteco“, kiu *sola* povas konduki al la plej alta *libereco*; servado, kiu *lernigu* al la homo la *regadon* en si mem; subordigado, por *asimili* ĉion malaltan al tio plej alta, por ke ĝi povu svingiĝi *en la ritmo* de tio plej alta, kaj tiel restu *konservita* tra ĉiuj eonoj de eterna vivo. –

Tiu ĉi *konservado de la individueco*, de la abunde riĉa konscio, trans la morton de la korpo, sed ne tuŝita de ĝi, tra eterno kaj eterno, – tiu ĉi *harmoniigado* de ĉiuj fortoj kun la *eterna diofajrero*, ĉirkaŭ kiu kristaliĝu laŭorde ĉiom de tio konscia, estas por la scianto la fina celo de *ĉiu* ĝusta spirita strebado de la homo sur tiu ĉi tero.

Kion utilas ĉiuj *okultaj kapabloj*, eĉ la plej mirigaj faki-raĵoj, se ĉio ĉi ja rilatas nur al la *fizika* fenomena mondo, kiu forlasas nin tuj kiam la cerbo de la homanimala korpo ĉesas esti al nia dispono kiel transformilo de sentado?

Kion utilas ĉiu talento de *ekstersensora perceptado*, se ĝi ja plejfavoraokaze ekkonigas nur la alie nepercepteblajn bildojn de la astrala tera „*aŭro*“, normale fizike nevidebla, kaj subfaligas la tiel perceptantan personon al plej kruda *tromp-*

iĝo, kiam li lasas sin delogi al la opinio, ke tio, kion li vidas, jam estas proksima al *la mondoj de la pura spirito* aŭ eĉ imanenta en ili?

Kion utilas ĉiu *racia* ekkonado, ĉiu scio *pri* la mondoj de la spirito, se kun la ĉeso de la cerbofunkcioj ĉio ĉi ja sensone disiĝas en nenio kaj plu neniam povas esti trovata en anima konscio, se tiu anima konscio ne atingis *antaŭe, dum* ĝi havis la cerbon al sia dispono, *la eternan volon al unuiĝo kun sia vivanta Dio*, sia dia spiritfajrero en sia plej interna interno?

Tiu unuiĝo de *ĉiuj* animeroj, *ĉiuj* ebloj de sentado, ankaŭ tiuj donitaj *sole* per la korpo, en la plej interna „*mi*“, – en la plej alta regiono de interna sentado, regiono kiu *sola* atingas la diecon kaj *povas* atingi ĝin *nur en la homo mem*, kiel *la en li vivantan Dion*, – estas por la homo la *sola* spirita tasko, kiu montriĝas vere valoranta ĉian penadon.

„La regno de la ĉielo toleras perforton, kaj *nur* perfortuloj *kaptas* ĝin.“

Vere, „perforto“ estas necesa por rifuzi ĉiujn ĝenajn obje-tojn de la *intelekto*, limigita al la *fizika* mondo kaj al la spekulativoj derivitaj el ĝi, por ke estiĝu la *interna kvieto*, kiu igas nin senti la prabildon de nia „*mi*“, nian vivantan Dion, kiu en ĉiu momento de nia esto *kreas* nin ĉiam denove laŭ sia bildo, – la *esprimo* de kies eterna kreado ni spirite estas, – al kiu ni plene *asimiliĝu*, por ke ni el *lia* konscio fariĝu kapablaj konservi *nin mem en konscio-identeco* tra ĉiuj eternoj!

Tie ĉi temas ne pri konvulsie troa streĉado de la volo aŭ turmente atingita „koncentriĝo“, sed pri konstante maldorma, energia rifuzado de ĉiu laŭta trudo de la intelekto, bridado de ĝia aroganta pretendo pri tio, ke ĝi rajtas havi la parolon en

regiono, kiu *neniam* estas alirebla al ĝi! – Sed tiu rifuzado estas absolute necesa, por ke ebligu *la granda lasado*, kiu – kiel *antaŭkondiĉo* – devas esti atingita, se ĉiuj niaj sentadaj fortoj fariĝu volonte pretaj servantoj de nia interna *Dio*, el kiu ni vivas kaj estas, – se la eterna homo en la tera homo leviĝu el sia tombo, nove naskite el la spirito: – *bildo kaj komparaĵo de sia „patro“* kiu en li estas en sia „ĉielo“.

Sed en tiu strebado la intelekto povas antaŭenigi nin „kiel tirbesto“, tuj kiam ni *bridis* ĝin! Certe estas ankaŭ permesite, *konsideri* tion spirite sentitan, *post kiam* ĝi estis sentata, ankaŭ en *intelekta* maniero: – fari al si kvazaŭ pensokonstruaĵon laŭ la logiko, kiel ordan „*trezorejon*“, en kiu ni povas konservi la juvelojn de nia interna sentado. *Sen* tia memkonstruita trezorejo nia interna spertado, la trezoro de nia spirita sentado, ja tre riskus *perdiĝi* al ni en la ĉiutaga vivo, disĵetiĝi en ĉiun ventodirekton, anstataŭ esti ĉiam laŭorde disponebla al ni.

Sed *neniam* la *intelekto* ricevu la *gvidon*, kiam ni en la matenruĝo de fora antaŭsento ekiras la vojon de serĉado, serĉante tion, kio estas la daŭranta nedetruenda vivokerno de ni ĉiuj, la plej interna hejmlando de ni ĉiuj, la plej nekomprenebla miraklo de ni ĉiuj: – la „juvelo en la floro de lotuso“.

La intelekto estas bona skolto, kiam oni volas malkovri la vojospurojn, kiuj kondukas al la ekkono de tiuj aferoj, kiuj *en la fizika mondo de la sensoj* montras sian lastan efikon, kaj *ĉi tie* oni vere *fidu* ĝin, donu al ĝi ĉiun oportunon por disvolviĝi, ĉar ankaŭ la intelekto estas de *dia* origino kaj aganta *bonfare* en *sia*, al ĝi rezervita loko.

Sed se ni volas atingi *Dion*, ni devas serĉi *ne ekstere*, – nek en *tio* ekstera, kio al la plej multaj jam ŝajnas esti „*io interna*“, ĉar plu neniu el iliaj sensoj kapablas kapti ĝin.

Eĉ se la homa spirito volus serĉi *Dion* en la plej altaj spiritaj regionoj dum eterneco, ĝi neniam renkontus *Dion*, ĉar kiel en la tuta fizika naturo neniam estas trovebla *naturforto en si* kaj tamen estas ekkonata en ĉiu atomo de la videbla mondo, tiel same *Dieco* manifestiĝas *nur* en la *spiritaj estaĵoj* generitaj de ĝi, – en ĉiu *individue kaj aparte nur* en la maniero de manifestiĝo celita *nur en ĝi sola*, – kaj neniam, eĉ ne en *unu* el la *plej altaj* spiritaj mondoj, povas esti trovata *izolita kaj ekzistanta por si mem*.

Ni devas malkovri *Dion en ni mem*, en lia eterna, generanta *vivo*, kaj por ke ni *povu* malkovri lin en ni mem, sen krei al ni mem *idolon* el ni, kaj tiel subfali al granda *trompiĝo*, ni tie ĉi devas fidi la gvidadon per *tiuj*, kiuj jam *vivas* en la konscio de Dio, kiuj donis siajn fortojn al Dio kiel *servantojn*, kaj *unuigis* sin al la eterna prabildo, kiu generas ilin.

Sed estus malsaĝa kredo, se oni volus atendi, ke en tiu ĉi tera vivo, determinita de tute alispecaj leĝoj, oni povus renkonti la *plej altajn spiritajn estaĵojn*, kiuj unuiĝis kun Dio, kiel videblajn formojn. Krome, la homa animo, kiu tie ĉi unuigis sin al sia vivanta Dio kaj fariĝis reganto de siaj fortoj el sia Dio, al kiu ĝi konsekris tiujn fortojn por servado, *neniam liberiĝas de teraj ligoj*, dum ĝi restas ligita al la korpo de la homa animalo, kaj povas, *eĉ plej alte perfektigiĝinte*, atingi nur la plej malaltan ŝtupon de unuiĝo kun la dia spirito. Eĉ tiu unuiĝinto kun Dio, el kiu lumanto de la pralumo kreas al si la

malkaŝanton, estus *el si mem nekapabla* supreniri la pli altajn ŝtupojn malfermitajn al li!

Vivas en la *spirita* regiono de tiu ĉi planedo ankaŭ spiritaj estaĵoj, kiuj staras sur ŝtupo multe *pli alta* ol estus alirebla al ili en fizika enkorpiĝo, sed ili aŭ estas jam de longe *liberigitaj* de tera korpo, aŭ neniam estis *ligitaj* al ĝi, ĉar ili ne estis *subiĝintaj* al la falo de spiritoj.

Sed ili povas fariĝi sentebla al ni nur *el interne*, povas laŭ eternaj leĝoj fariĝi, en certaj raraj cirkonstancoj, videblaj kaj aŭdeblaj nur al homa animo plene unuiĝinta kun Dio.

Ekstreme raraj estas la malmultaj okazoj, en kiuj tera homo ligita al siaj sensoj kapablis percepti tiujn ĉi spiritajn estaĵojn, – sed *sennombraj* estas tie ĉi la ebloj de trompiĝo, sennombraj la raportoj de homoj, kiuj vidis *formaĵojn de trompiĝo* kaj simple ne povis eviti kredi, ke *spirita estaĵo* malkaŝis sin al iliaj sensoj.

Apenaŭ elradikigebla estas la eraro, ke tiuj ĉi spiritaj estaĵoj povas videbliĝi al „klarvidantoj“, kaj miloj volas „lerni“ la klarvidadon, opiniante, ke se ili scipovus ĝin, ili kapablus percepti *ion spiritan* per internaj sensoj.

Sed oni ne povas „lerni“ la klarvidadon, kaj klarvidanto *neniam* vidis ion alian ol tion, kio estas trovebla en la *malalte astrala*, tute ne „spirita“ aŭro de la tero: trompajn formaĵojn kaj trompemajn estaĵojn de *tute ne spirita speco*.

Certe ekzistas metodoj por *superstimuli* la fortojn de la *plastika fantazio* de la homo tiugrade, ke ili igas lin vidi kaj aŭdi kiel ŝajnan realon ĉion, kion li *volas* vidi kaj aŭdi. Certe povas doniĝi al tiumaniere trompita homo „internaj klarigoj“, en kiuj vero kaj falso estas groteske intermiksitaj. Certe li povas ekvidi grandiozajn fantaziaĵojn de aliuloj, aŭ memkreitajn trompajn bildojn, kiel ŝajnan „realon“. Tamen, kiu povus

dubi, ke tia homo estas multe pli bedaŭrinda ol *vera* klarvidanto, kiu kunportas sian dubindan „talenton“ *ĉiuokaze ekde sia naskiĝo* kaj kiu perceptas ion fakte *terece* „*reala*“, eĉ se li erare kredas, ke la mondoj de la *spirito* estas malfermitaj al li!

Estas tute malĝusta orientiĝo de deziroj, se homo kredas esti strebanta al tio spirita kaj samtempe esperas akiri, pli aŭ malpli baldaŭ, *fiziksense percepteblajn* pruvojn pri la ekzisto de spiritaj mondoj.

Aparte de tio, ke li neniam spertus progresigon sur sia vojo, eĉ se ĉiuj „mondoj“ de la pura esenca spirito estus malfermitaj al lia *fizika* okulo, – ke eĉ centjara kontinua interparolo kun la plej altaj spiritaj estaĵoj igus lin restadi ĉiam sur la sama ŝtupo, sur kiu li komencis la interŝanĝon, – li ankaŭ neniam devas kredi, ke li post sia morto, fariĝinte libera de sia korpo, povos tuj ekkoni tion spiritan sur ĉiuj spiritaj ŝtupoj.

Reciproka ekkonado estas ebla nur al estaĵoj, *kiuj estas de la sama speco*, kaj eĉ homaj spiritoj tute unuiĝintaj kun Dio povas en spiritaj mondoj atingi nur *tiujn* ŝtupojn, kiuj konformas al ilia *propra* spiriteco.

Kie estas necese, estaĵoj *malsupreniĝas* de *pli alta* ŝtupo, por instruante sciigi pri tio, kio estas malfermita *al ili*, kiel estas neeviteble en la kreado de la tera unuiĝinto de lumanto de la pralumo, – ĉar *pli alta* spiriteco povas dumtempe rezignacie eniri *pli malaltajn* ŝtupojn, dum la estaĵoj sur tiu pli *malalta* ŝtupo detruus sin mem, se ili provus – kondiĉe ke tio estus *ebla* – penetri en sferojn de la spirito, por kiuj *ili ankoraŭ ne estas preparitaj*. (La malaltaj mensaj influoj, kiujn ĉiu tera homo povas sperti, originas ne el *spiritaj*, sed el la regio-

noj de la nevidebla *fizika* mondo.) Ĉie regas *plej striktaj spiritalaj leĝoj*, al kiuj senplende submetas sin tio, kio vere estas de la eterna spirito.

Saĝe la eterna pralumo, kiu lumas en ĉio spirita, protektante envolvis siajn radiojn por ĉio, kio ne estas unuigita kun la spirito tiumaniere, ke ĝi kapablas ankaŭ *elteni* la esencan lumon de la dia spirito!

Kion do utilis al la homo de la tero, se li povus vidi ion spiritan, dum li en si mem ankoraŭ ne estis *absolute* unuigita al la spirito?

Tio fariĝus al li nur *nedirebla turmento*, kaj neniu infera torturo iam elpensita de animalhoma torturemo estas tiom kruela, ke ĝi egalus al la sufero, kiun devus senti homa konscio, kiu kapablus *vidi* ion spiritan, antaŭ ol ĝi *mem, unuiginte* al la spirito *ankaŭ laŭ substance*, estas kapabla partumi la *vivon* de la spirito.

Restas *nur unu* afero, kiu necesas: – *prezenti* ĉiujn fortojn de la animo, ĉiun sentokapablon de la korpo, ĉiun impulson kaj ĉiun eksenton al la spirito, – al la *vivanta Dio* en ni, – *libervole kaj senrezerve por servado al ni*, por ke estu *eble* al la eterna, dia spirito iom post iom *unuigi sin kun nia homa konscio* kaj redoni al ni *el si mem* tiujn fortojn, impulsojn, eksentojn kaj sentokapablojn kiel obeemajn servantojn, – post kiam ni estis preparataj por *primajstri* ilin el la luma kerno, eterne generanta nin, de nia esto.

Tio ĉi estas la „*ĝusta diservo*“, kiun devas plenumi *ĉiu*, kiu volas kunpreni kun si transen sian terhoman konscion, ne nur por ŝajne senfinaj tempoj, sed *por la eterneco!*

„Laboru, dum estas tago, ĉar venas la nokto, kiam neniu povas labori.“

Tie ĉi en la tera vivo estas *eble* al la homo „labori“. – Sed post la foriro el la fizika mondo li troviĝas *en la stato, kiun li mem kreis al si*, kaj devas resti *pasiva*, ĝis tio lia anima sen lia faro puriĝis – eble dum mallonga tempo, eble dum jarmiloj, se paroli laŭ teraj nocioj – tiugrade, ke spiritaj estaĵoj substance unuiĝintaj kun Dio sukcesas vekti en li la konscion pri la *esenca imanenteco* de lia dia kerno, lia vivanta Dio. *Nur tiam* povas okazi en li la *volo-returniĝo*, per kiu li lasas ĉiujn fortojn al sia „vivanta Dio“ por servado. *Nur tiam* la unuigo de lia konscio kun la eterna konscio de la dia spirito estas okazigebla en li, kiun unuigon eĉ „akto de graco“ de la Dieco ne kapablas iam okazigi aliamaniere.

Certe, li estas „*savita*“, sed lia surtera vivo kun ĝia tuta strebado, ĝia feliĉo kaj ĝia penado por eterne fariĝis al li *ne plu rememorebla*, li *ne* akiris por si la premion de la venkinto, *la plivastigon de la konscio de tiu, kiu trakuris la plej eksterajn regnojn de dia memmanifestiĝo*.

Ankaŭ *li*, – tiam fariĝinte manifestiĝa formo al la dia spirito kaj unuigite kun sia samspeca vira aŭ virina spirita kontraŭpoluso, – vivos *la vivon de la pura spirito* en la abundeco de senfina feliĉo, sed *nekompareble pli alta* estas la speco de memsentado de *tiuj* eterne spiritaj estaĵoj, kiuj en sia tuta senfina feliĉo restas kapablaj konscii la *plej profundan profundon*, en kiun ili estis mergiĝintaj, ligite al la terhoma animalo.

Kiel homo veninta de ebena regiono staras skuite kaj feliĉigite en sia tuta animo antaŭ la mirakloj de la montaro, kelkfoje en sia kvazaŭa adorado apenaŭ komprenate de montaranoj, tiel same nur *tiu* spirito, kiu ankoraŭ kapablas kons-

cie rememori ankaŭ *ĉiujn profundojn*, povas aprezi la tutan altecon de sia feliĉo, kaj ju *pli altaj* fariĝas la ŝtupoj, kiujn li atingu, eĉ se nur post eonoj, des pli malmulte li povus malhavi la *eblecon rememori* sian plej profundan ŝtupon.

Ĉar *io spirita* neniam estas *ŝanĝebla* en sia naturo, la ascendo de la animo neniam signifas ian ŝanĝiĝon de ĝia dia-spirita esenca kerno eterne generanta ĝin.

La „vivanta Dio“ en la homa plejinterno, al kiu la homo kapablas unuigi sin en sia konscio jam dum la surtera vivo, estas la *sama* sur *ĉiu* spirita ŝtupo, kiu iam estas atingita, tra ĉiuj eternecoj.

Plivastiĝas nur *la stato de la animo*, la stato de la homanima *konscio*, por ke oni atingu *pli kaj pli altan* spiritan konsciecon, por kapabliĝi *sent* *pliaj kaj pliaj* nemezureblecojn de spirita esto.

Se la celo estus nur la formado de *iu ajn* individua konscio de anima speco ĉirkaŭ la spirita, generanta esencokerno, tiam ĉiu strebado al la unuiĝo de la konscio kun la spirito, tie ĉi dum la surtera vivo, estus *tute superflua*, ĉar la unuiĝo *povas*, escepte de la okazoj de plena dissolviĝo de la konscio, ankoraŭ okazi laŭ eternaj leĝoj imanentaj al la dia vivo, eĉ se nur post eonoj.

La vekvoko de ĉiuj veraj spiritaj instruantoj eliris en ĉiuj tempoj *tial*, ĉar la plej alta feliĉo de la animo en la tuta eterneco konsistas en tio, ke la animo konservas en si *sian teran konscion* kaj tiumaniere *la kapablon rememori*, kaj ĉar nedirebla anima *sufero*, kiu povas eki post kiam la animo forlasis la teran korpon, fariĝas *evitebla* per ĝia unuiĝo kun la spirito dum la surtera vivo.

Gvidi la homaron ĉiutempe per siaj vokitaj parolantoj *sur tiun padon de plialtigita feliĉo*, estas la tasko de tiuj, el inter kiuj mi diskonigas tiujn ĉi instruojn, kaj ĉiu vorto de tiu ĉi libro instruu al siaj legantoj nenion alian ol tiu ĉi speco de „*ĝusta diservo*“.

Neniu el tiuj legintaj tiujn ĉi vortojn forpasu el tiu ĉi vivo de tera penado, antaŭ ol lia konscio *estis unuigata kun sia „vivanta Dio“!*

Neniu eniĝu en tiun „nokton“ de *neebleco de propra laborado*, el kiu eblas nenia eskapo, antaŭ ol la ŝuldo de la atendanto estas pagita „ĝis la lasta monero“.

Ankoraŭ estas „*tago*“, kaj helpemaj manoj estas agantaj por alkonduki spiritan helpon al *ĉiuj*, kiuj sopiras ĝin. – Estas bezonata *neniu aparta trejnado* por altiri tiun ĉi helpon, kaj *neniu persona individua instruado* por proprigi ĝin al si.

„Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu!“

Tradukoj de pliaj libroj
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:
<http://www.a-rehfeldt.de>